

FERENCZ MOLNÁR



**LA SEKRETO
DE LA ARBARO ARUVIMI
KAJ ALIAJ SATIROJ**

**Hungaria Esperanto-Asocio
Budapeŝto 2025**

Ferenc Molnár

**La ŝekreto
de la arbaro Aruvimi
kaj ceteraj ŝatiroj**

**Hungaria Esperanto-Asocio
Budapeŝto 2025**

Originala titolo: Az aruvimi erdő titka és egyéb szatirák

Eldonis: Légrády Testvérek. Budapest, 1916

Tradukis el la hungara originalo: Jozefo Horvath

Eldonis: Hungaria Esperanto-Asocio, 2025

Titolpaĝo: Jozefo Horvath

ISBN 978-963-571-518-3

@Horváth József 2025

e-libro HEA

LA SEKRETO DE LA ARBARO ARUVIM

ANTAŬPAROLO

Afable leganto, akceptu de mi ĉi-foje tre mallongan hororromanon. Ĝi etendiĝas nur al kelkaj ĉapitroj, kaj kiam ni ambaŭ tediĝos, ni simple finos ĝin. Mi promesas nenion eksterordinaran, nur ke se vi okaze pli frue ĉesos legi ol mi verki ĝin, mi eksentos tion, kaj iom poste ankaŭ mi finos ĝin. Vi do ne bezonas zorgigi vin. Kaj ankoraŭ nur tiom, ke la arbaro Aruvimi troviĝas en Afriko kaj ricevis sian nomon de la rivero Aruvim, kies fluon kaj sirenojn la ĵurnalistoj H. M. Stanley, honora membro de la londona Reĝa Geografia Societo, esploris en 1887. Tra la arbaro Aruvimi aŭ alinome Granda Afrika Arbaro baraktis H. M. Stanley dum cent kaj sesdek tagoj koste de plej grandaj korpaj kaj animaj turmentoj.

UNUA ĈAPITRO

Oni sonorigis.

– Certe Paĉjo – diris knabeto kaj transkriis en la apudan ĉambron: – Panjo, he, Paĉjo venas hejmen.

El la alia ĉambro elvenis s-ino Honest, la edzino de Paĉjo kaj parolis jene:

– Terinjo, malfermu la pordon por la sinjoro, poste tuj vi povos surtabligi la vespermanĝon. Kaj vi infanoj, Geoĉjo, Steĉjo, Aleĉo, Fraĉjo, Luĉjo, Deĉjo, Daĉjo, Niĉjo, Geĉjo, Joĉjo, Elinjo, Anjo, Injo, Enjo, Henjo, Genjo, Manjo, Etenjo kaj Magdanjo sidiĝu bele ĉe la tablo, kaj ne alsturmu, kiel kutime, vian kompatindan Paĉjon, kiam li venas vespere laca el la oficejo!

La infanoj altabligis. Paĉjo enpaŝis kaj brakuminte sian edzinon, li turnis sin al la infanoj:

– Saluton, infanoj!

– Bonan vesperon, Paĉjo! – ili eĥis ĥore.

Paĉjo sidiĝis inter ili, kaj baldaŭ mergiĝis en la kulerado de la vaporanta supo.

– Ludoviko – diris lia edzino, post kiam ŝi disdonis la supon al la infanoj –, sinjoro vizitis nin posttagmeze kaj postlasis ĉi tiun koverton.

Ŝi transdonis koverton al sia edzo, kiun li tuj malfermis. Tri dudek-kronoj¹ falis el ĝi, nenio alia.

– Kio estas tio? – demandis Paĉjo.

– Mi ne scias. Iu sinjoro alportis, lasis ĝin ĉi tie kaj li nur diris, ke li sendas al vi sian honoran saluton. Lia nomiĝas Braunauer.

– Ĉu Bernardo Braunauer?

– Jes.

– Mi jam scias.

Sur la vizaĝo de Paĉjo trakuris hela ruĝo, kaj remetinte la tri dudek-kronojn, li enpoŝigis la koverton kaj kuleris plu la supon.

Ludoviko Honest estis ŝtata oficisto. Li estis hungara reĝa financa vicflaristo en la Ŝtata Benzinfortor-Konstata Oficejo. Afabla leganto, vi, kiu ne orientiĝas en la amaso da labirintoj de oficejoj, akceptas certe kun kapskua la nomon de ĉi tiu malofte menciata oficejo. Kvankam ĝi ja ekzistas, nome en Buda², sub n-ro 4B de la strato Ĉevalo, en ludomo, kiun la ŝtato luis de parlamenta deputito ekskluzive por la celoj de ĉi tiu oficejo. En ĉi tiu oficejo faksportaj viroj konstatas oficiale la gradon de benzinodoro, inter kiuj la vicflaristo Ludoviko Honest estis tre ete salajrata oficisto, plenumanta tie cetere ne elstare gravan postenon.

La estiĝo kaj funkciado de la oficejo estas sufiĉe interesa kaj nekonata, por povi rakonti ĝin per kelkaj vortoj. La oficejo (plennome: Hungara Reĝa Ŝtata Benzinfortor-Konstata Stacio) estas privata firmao, establita laŭ iniciato de Uniformo-Sekpuriga A.K. B. Braunauer & Komp.

Kial iniciatis ĝuste ĉi tiu firmao la establon de la oficejo?

Por tio necesas scii, pri kio okupiĝas la Braunauer-firmao. La ĉefo kaj fondinto de la Braunauer-firmao, Bernardo ekhavis iun tagon la ideon, ke li fondos entreprenon, kiu alprenos la taskon sekpurigi la vestojn de ĉiuj

¹ Krono (1892-1926): hungara valuto.

² Buda, situanta sur la dekstra bordo de Danubo, estas parto de Budapeŝto.

uniformitaj ŝtataj dungitoj, loĝantaj en Budapeŝto. La ideo estis bonega. Miloj kaj miloj da leterpoŝtistoj, telegramportistoj, poŝtveturigistoj, pedeloj, pordistoj, provosoj, asignistoj, policistoj, doganistoj, financistoj ktp, ktp portas la uniformon de la ŝtato. La ŝtato estas interesita, ke ĉi tiuj vestoj estu ĉiam puraj, ja la multaj miloj da homoj ne havas monon ĉiusemajne por sekpurigo. La firmao pretas do konstante, en difinitaj tempintervaloj, sekpurigi ĉi tiun amasegon da uniformoj: kepojn, pantalonojn, jakojn, mantelojn, por kio li petas abundan rekompencan de la ŝtato. Ne pasis pli ol tri monatoj, kaj la deputito d-ro Gurnemancz intervenis por la afero; tiutempe la partia kaso ricevis beletan sumon, kaj d-ro Gurnemancz fariĝis jurkonsilisto de la entrepreno, kaj la ŝtato komisiis la firmaon per la sekpurigo de la vestoj de la ŝtataj uniformitoj, portempe kaj porprove per la purigo de tri milionoj kaj sepcent mil pecoj. „Se tio pruvigis bona”, diris la ŝtatssekretario kun dolĉa rideto, „oni subskribos la definitivan kontrakton.”

La firmao instaligis. Sian grandegan funkciejon ĝi establis en Buda en tri-etaĝa ludomo. La uniformitaj dungitoj devis liveri siajn vestojn unufoje semajne al la funkciejo de la firmao en certaj tempintervaloj, kaj sekvatage ili povis rericevi ilin. Post kiam la firmao transigis novajn sumojn al la partia kaso, kaj d-ro Gurnemancz luktis kiel ido-gardanta leonino, la firmao ricevis la definitivan kaj ekskluzivan kontrakton por okdek jaroj. Samtempe ĝi definitivigis sian provizoran funkciejon.

La puriga laboro okazis laŭ tre simpla, moderna ĥemia principo. Oni transprenis la vestaĵojn en ejo kun la surskribo DEPONO, oni eĉ ne tuŝis ilin, kaj sekvatage redonis ilin al la reaperantaj posedantoj en ejo kun la subskribo ELDONO. Krom la ŝtata subvencio la firmao enkasigis de la vestoposedantoj por ĉi tiu ĥemia procezo takson de kvardek fileroj por persono. La firmao alprenis garantian por la ĉe la purigado malboniĝintaj vestaĵoj, sed tio neniam okazis, ĉar, kiel ni ne povas sufiĉe emfazi, la funkciado de la firmao limiĝis nur al tio, ke lunde ĝi kolektis la vestojn kaj marde – sen eĉ tuŝi ilin – redonis ilin al la posedantoj. Bernardo Braunauer la pli maljuna dume akiris hungaran nobelan titolon, nome kun la postnomo „el Tabakŝton” kaj Bernaĉjo Braunauer el Tabakŝton la pli juna verkis sub la nomo Beĉjo Barnóczy de B. poemojn kaj teatraĵojn, kaj tenis vetkur-ĉevalan stalon sub la nomo Kapitano Bernardo.

Ĉio ĉi progresis glite glate, la familio riĉiĝis, kaj la leterpoŝtiston, kiu plendis, ke makulo restis en lia uniformo, oni elĵetis kune kun lia plendo tiel, ke neniam venis al li en la menson submeti plendon. La Braunauer-firmao fundamentis sian negocon sur du bazoj:

- 1) neniam tuŝi uniformojn, do ĝiaj elspezoj limiĝos al minimumo,
- 2) la supre listigitaj miloj da ŝtataj dungitoj neniam lasos fali sur sian uniformon nutraĵmakulojn (konsistigantajn la plej altan procenton de la makul-kontingento) pro pluraj kaŭzoj, inter kiuj ŝajnas sufiĉa tiu, ke ili havas nenion pro manĝi.

Kaj tiel ili vivis feliĉe tra jaroj, ĝis iu maldungita oficisto de la firmao denuncis la firmaon pro malnobla venĝemo, asertante en sia denunco, ke tiu ne purigas la uniformojn, ĉar dum sia ekzisto ĝi eĉ nur litron da benzino ne aĉetis. La firmao ne timigis ĉi tiu fia kalumnio. Onklo Braunauer faris viziton ĉe la najbaroj, kaj per ducent dudek kronoj li persvadis la privatan oficiston Benedikto de Fiŝlag kaj per cent okdek kronoj la veturantan malkleriston Schmeckedig, submeti denuncon kontraŭ li ĉe la magistrato, en kiu ili plendas pro la nazotorda benzinfetoro, haladzanta el la purigejo, kaj postulas, ke oni transloku la purigejon en la tiel nomatan malbonodoran fabrikon zonon. En la ministerio, kien estis sendita la denunco de la maldungita oficisto, onklo Braunauer defendis sin per la oficialaj aktoj de la du fetordenuncoj. Sed tiam la diskonata ŝtatsekretario Tordomens igis voki al si onklon Braunauer.

– Estimata – li diris al li –, io misas.

– Mi scias, mi scias – aprobis la onklo –, oni denuncis min, ke ni purigas sen benzino.

– Ne, ne – diris ruze la ŝtatsekretario –, ni ne donas krediton al ĉi tiu kalumnio, ni ja vidis la du denuncojn, kiujn la najbaroj submetis pro benzinaladzo.

– Nu? – demandis onklo Braunauer trankviligita.

– Nu – reagis la ŝtatsekretario kun oblikva alrigardo kaj diable rikanante –, la tubero malglatas ne tie, sed tie, ke la najbaroj plendas pro la neeltenebla benzinfetoro de via purigejo. Se vi ne faros ion kontraŭ tio, ni igos transloki vian funkciejon eksterurben.

– Pro Dio – skandaliĝis onklo Braunauer –, mi diras tion private nur al via moŝto: eĉ unu guto da benzino ankoraŭ ne metis sian piedon en mian purigejon. Kion oni volas de mi?

– La proksimiĝantaj elektoj – klarigis la ŝtatsekretario –, ili vere proksimiĝas...

La cetero mallaŭtiĝis al diskrete murmura konversacio. Onklo Braunauer pagis al la partia kaso, pagis al la s-roj De Fiŝlag kaj Schmeckedig, por ke ili revoku siajn plendojn, kaj ĉio reordiĝis.

Pli ĝuste, Braunauer kredis, ke ĉio estas en ordo. La firmao ankaŭ plu ne enlasis eĉ decilitron da benzino en la funkciejon, sed la najbaroj eksciis, ke De Fiŝlag kaj Schmeckedig gajnis centojn per la denunco. Ne pasis pli ol monato, kaj oni prezentis tricent kvardek ses denunciojn al la magistrato, pentrante per akraj koloroj en ĉiu denunco tiun naŭzan staton, ke la benzinfetoro, haladzanta el la Braunauer-purigejo, faras neeltenebla la aeron de la ĉirkaŭaĵo. En sia teruro Braunauer prenis krajonon kaj elkalkulis, ke se li subaĉetos la tricent kvardek denunciojn, poste subaĉetos tiujn sescent, kiuj tuj anoncos sin, kiam ili ekscios, ke oni povas gajni per tio, tiam li eldonos duoble pli da mono, ol li elspezus, se efektive li purigus per benzino la uniformojn. Li trafis en plej teruran situacion. Subvencii ĉ. mil najbarojn de jaro al jaro estas amaso da elspezoj. Reveni sur la honestan vojon kaj purigi vere per benzino, estas same granda elspezo, kaj krome restos ĉiuj plendoj. Kiuj sentas benzinfetoron sen benzino, tiuj estos tre sentemaj, se vere estos uzata benzino. Ĉu forloĝiĝi? Ĉu aĉeti novan parcelon, konstrui fabrikon? Ĉio ĉi kostos multege da mono. Onklo Braunauer terurite kuris al la jura konsilanto de sia entrepreno, al la parlamenta deputito d-ro Gurnemancz. Post longa konsultiĝo ili veturis al la ŝtatsekretario kaj proponis kovri 80 procentojn de la kostoj de establota ŝtata oficejo, kaj donos certan sumon por la celoj de la partia kaso, se la ŝtato starigos etan oficejon, kiu la unuan tagon de ĉiu monato konstatos pri la benzino, uzata por purigo fare de la Braunauer-firmao, ke ĝi estas senodora, kaj per tio ili deturnos ĉiuspecajn ĉantaĝojn kaj denunciojn fare de la najbaroj. Rekompence la firmao Braunauer devigos sin, ke ekde nun ĝi tuŝos la uniformojn nek per benzino, nek per ajno cetera, kaj uzos benzinon nur por tio, ke la unuan tagon de ĉiu monato montros specimenon el ĝi al la Ŝtata Benzinfetor-Konstata Stacio, kiu sekve deklaros, ke la odoraĉo de

kunprenis la zonlardon en sia buŝo por la vojo, ĉar ties ronĝado postulis certan tempon kaj persiston.

Li desupris en la trian etaĝon kaj pruntepetis de sia bofrato ok krejcerojn³ por tramo. Li skribis prie bilon, kaj post nelonge fajfetante eliris tra la dompordo. Por la tempo de la fajfetado li metis la zonfrandaĵon en sian veŝtopoŝon, ĉar la du delicoj ekskludis unu la alian, kaj cetero Ludoviko ne apartenis al tiuj voluptemuloj, kiuj avide kumulante plezurojn, samtempe volas diboĉi per ĉiuj. Sed lia konscienco estis freŝa kaj refreŝiga kiel glaso da viena akvo⁴, kaj tenis ĉi tiun viron en konstante ekvilibrata bonhumoro.

Li devis atendi ĉe la tramhaltejo.

Li ne ŝatis iri inter homojn. Li havis la fiksan ideon, ke en Peŝto⁵ eĉ tiam gluiĝas koruptiĝo sur la homo, se li simple trairas straton. Kaj Ludoviko volis konservi sian senkulpecon, do li rigardis nek dekstren nek maldekstren, retiris la kolon en la kolumon kiel stratpurigisto dum neĝoŝtormo. Sed ĉio estis vana klopodo.

La tramo alvenis kaj Ludoviko eniris. Li donis la ok groŝojn al la kondukto, ricevis bileton, kiun li zorge faldis kaj ŝovis en sian butontruon. Chamberlain portis orkideon en sia butontruo, Ludoviko bileton. Sed li ne malkontentis. Li staris vagonfine sur la platformo kaj rigardis la moviĝadon de la mondo, tremante, ke ia koruptaĵo gluiĝos sur li. Post mallonga rapidveturo okazis la unua malicaĵo. Sur la postbufron grimpis infano, tiel volante trompi la tramkompanion. Ludoviko pesis kaj konsideris la aferon, kaj trovis tiel, ke oni devas fari ion kontraŭ la misago de la junuleto, li do malfermis la ŝovofenestron, elklinis sin kaj fingropuŝis teren lian ĉapelon kalkulante tiel, ke la infano desaltos por sia ĉapelo kaj ne plu atingos la vagonon. Ludoviko bone kalkulis. La infano unue kaptis al sia kapo, poste levinte siajn senkulpajn blujajn okulojn al Ludoviko, sputis sur lin kaj forsaltis de la bufro. Al Ludoviko venis unue fama diraĵo de Kálmán Tisza⁶ en la menson: se io ŝprucas sur onin, oni atendu, ĝis ĝi sekiĝos, ĉar tiam ĝi

³ Krejzero: ŝanĝmono de forinto inter 1858-1892.

⁴ En Vieno fluas vera fontakvo el la kranoj.

⁵ Budapeŝto konsistas el Buda (dekstraflanke) kaj Peŝto (maldekstraflanke de Danubo). Ofte sub Peŝto oni komprenas la tutan Budapeŝton.

⁶ Tisza, Kálmán (1830-1902): longtempa ĉefministro.

de si mem defalos. Sed poste li ekmemoris, ke tio rilatas nur al la politika vivo. Li do viŝis sin kaj elpoŝiginte la delican ledpeceton, silente li daŭrigis sian matenronĝon.

Sed en la sekva stacio okazis io tia, kio ŝajnis pravigi la homevitan sinte-non de Ludoviko. Eta, dika sinjoro kun cilindra ĉapelo envagoniĝis kaj staris, apogita en angulo de la platformo, ĝis la konduktoro alpaŝis lin.

– Ĉu mi povas peti vian bileton? – diris la konduktoro.

– Ĉu vi ne rekonas min, bovo? – diris la fremdulo en riproĉa tono. – Mi havas monatbiletan!

La konduktoro palpebrumis.

– Mi petas vin – li respondis –, bonvolu montri ĝin!

Ludoviko konjektis jam el la elpaŝo de la fremdulo, ke li ne havas monatbiletan, kaj la suspekto de la konduktoro nur pravigis ĉi lian opinion.

La fremdulo ĵetis pikan rigardon al la konduktoro kaj komencis fosi en ĉiuj siaj poŝoj, eĉ en poŝetoj, en kiujn ne eniĝas monatbiletan. Li serĉis ĝin ĉie, en sia monujo, alumetskatolo, nazpinĉilujo, subŝtofo de sia ĉapelo, sub la kovrilo de sia poŝhorloĝo, en siaj ŝuoj, ŝtrumpoj, en la faldoj de sia poŝtuko.

– Eble ĝi glitis en la subŝtofon – rimarkis kun bonvolo Ludoviko Honest, kiu ne ĉesis ĝislaste supozi iom da bonkredemo ĉe la homoj.

Je tio la dika fremdulo trapalpis ĉiujn siajn subŝtofojn, poste frapis al si sur la frunton, kvazaŭ tie li trovus la bileton.

– Mi lasis ĝin hejme! – li ekkriis. – Ĝi restis sur la litŝranketo.

La konduktoro ridetis acide. Li elprenis sian notlibreton kaj lekis sian harditan montrofingron.

– Kien vi bonvolas? – li demandis

La fremdulo respondis kun bonvola rideto:

– Nur ĉi-proksimen, mi bezonus okgroŝan bileton, sed ne donu bileton, mi tuj eltramiĝos, prefere mi donos al vi tri krejcerojn, vi gajnos per tio, ankaŭ mi gajnos, kaj la kompanio havas ja cetere sufiĉe da milionoj.

La montrofringro de la konduktoro preskaŭ sekiĝis, li do relekis ĝin dirante:

– Ne eblas, sinjoro.

Kaj li etendis la manon por bileto.

– Ne... Ne! – diris la dika hometo kaj retenis lian manon, por ke tiu ne povu deŝiri la bileton. – Se vi ne akceptas la negocon, almenaŭ gajnu vi, jen la ok krejceroj, mi ne bezonas la bileton.

– Ne eblas, sinjoro – ripetis la konduktoro kun rigida honesteco, li deŝiris la bileton, donis ĝin al li kaj tenis sian mankavon. La fremdulo ridetante levis la ŝultrojn kaj metis dekkrejceron en la manon de la konduktoro. Tiu volis redoni du krejcerojn. Sed la fremdulo reprenis nur unu krejceron, la alian li degne forgestis. La konduktoro enpoŝigis la krejceron, stariĝis en atentopozon, kun la maldekstra mano sur la ŝnuro de sia pantalone, kiel li lernis en la armeo, kun la dekstra mano ĉe la viziero de sia kepo, kaj plenkulme li muĝis:

– Humile mi dankas, sinjora moŝto!

La fremdulo ree degne kapjesis.

Ludoviko Honest resumis la okazintaĵon:

1) la fremdulo mensogis pri la monatbileto, volis vojaĝi senpage. Ĉar tio ne sukcesis al li,

2) li volis veturi por tri krejceroj, kaj ŝpari kvin krejcerojn, instigante la konduktoron al ŝtelo kaj defraŭdo. Ĉar ankaŭ tio ne sukcesis,

3) la fremdulo volis pagi la plenan veturprezon, sed li instigis la konduktoron al defraŭdo nur pro tio, ke li povu esti ĝentlemano senkoste, t.e. per aliula mono. Ĉar ankaŭ tio ne sukcesis al li,

4) la fremdulo pagis la plenan veturprezon, sed dekalkulis kvindek procentojn de la kutima bakŝiŝo, ĉar li volis ĉiupreze gajni, samtempe volis resti supera en la tuta afero kiel ĝentlemano.

– Kiom da korupto – murmuris en si Ludoviko Honest –, kiom da fiaĵoj ĉirkaŭ simpla trambileto, kaj kiom sublime estas, ke je la honesteco de simpla kaj kompatinda konduktoro ĉio ĉi rompiĝis, dispolviĝis kaj reŝrap-iĝis en la senfinan fiecon de la fremdulo kiel ondo de nigra rifo.

– Vi estas brava homo – flustris Ludoviko en la orelon de la konduktoro, por premii lin en la nomo de la homaro –, vi estas brava homo. Tre bone vi faris, kion vi faris.

– Nu jes – reflustris la konduktoro –, ne eblas scii, ĉu li estas detektivo de la estraro!

Kaj kun ruza rikano li reiris en la vagonon. En la brusto de Ludoviko leviĝis acidaj sentoj kaj strangoladis lian gorgon. Sed li diris nenion. Li metis la konduktoron en sian memoron inter tiujn homojn, pri kiuj li trompiĝis.

Kontrolisto suprensaltis en la vagonon. Li rigardis la veturateston, skribis ion sur ĝi kaj ekiris kontroli la biletojn.

– Bonvolu diri – li rimarkis, kiam li rigardis la bileton de Ludoviko – ĉu ne de la tero vi prenis ĝin?

Ludoviko ruĝiĝis.

– Pardonu – senkulpigis sin la konduktoro –, la numero ne akordas, ĉar...

Kaj li montradis ion sur la veturatesto. La kontrolisto kun sovaĝa rigardo redonis la bileton al Ludoviko, venĝe duoble pli grandan pecon li deŝiris, ol necesis, kaj fingrominacis Ludovikon. Poste ekvidinte la pufventrulon kun la cilindra ĉapelo, li stariĝis en streĉa atentopozo kaj laŭte salutis lin:

– Bonan matenon, eminenta moŝto!

La fremdulo kapjesis kun degna rideto. La tramo kuris plu. La kontrolisto elvagoniĝis, kaj la eminenta moŝto turnis sin al la konduktoro:

– Diru..., kiam ni alvenos proksimume en Buda?

– Pardonu – diris la konduktoro –, la bileto de via moŝto validas nur ĝis la ponto...

– Bone, bone, amiko – diris la dikuleto –, ne kompliku tiom la aferon, vi ĉiupreze volas dikigi la kompanion... mi ja veturos nur du haltejojn plu trans la ponto.

Li do tamen gajnis ĉe la negoco. Ludoviko estis elbuŝigonta la ledon, por povi sufiĉe skandaliĝi, kiam la fremdulo ekparolis:

– Kaj atentigu, amiketo, tiun s-ron kontrolisto, ke se li jam alparolas min, donu al mi la konvenan titolon. Mi ne estas eminenta sed ekscelenca moŝto.

Pro teruro Ludoviko glutis la ledon. Dum sia longa oficista kariero nun unuafoje okazis al li, ke la frandaĵo senronĝe glitis malsupren tra lia gorĝo. Feliĉe sekvis stacio kaj li eltramiĝis. Iom seniluziigite li turnis sin en flankan strateton, kaj rapide iris ĝis tiu domo, en kiu troviĝis la centra oficejo de ĉiuj entreprenoj de la firmao de Bernardo Braunauer el Tabakŝton, sur kiu ĉe la dompordo, laŭ franca kaj angla modeloj, nur nigra marmortabulo de poŝtkarta grandeco indikis kun belaj, kursive skribitaj malhele oraj literoj:

BRAUNAUER

Li elkaptis el sia poŝto la hieraŭajn sesdek kronojn, kiuj ankoraŭ troviĝis en la origina koverto, kaj iom ekscitite li malfermis la pordon de la antaŭĉambro.

TRIA ĈAPITRO

En la antaŭĉambro akceptis Ludovikon Honest livrea ĉambristo.

– Mi volas paroli kun s-ro Braunauer – diris Ludoviko al la ĉambristo.

– Bonvolu ĉi tien, al la s-ro sekretario.

Kaj li puŝis lin tra verddrapa pordo. Ludoviko trovis sin en atendejo, kie la sekretario ĝuste elakompanis pseŭdoĵurnaliston. La sekretario tiel parolis al la pseŭdoĵurnalisto:

– Ĉu vi permesas, s-ro redaktisto, prezenti al vi d-ron Sepsi. Li estas la bufedisto de nia entrepreno.

– Ĉu bufedisto? – demandis ekstreme la pseŭdoĵurnalisto.

– Jes. La s-ro redaktisto nun ricevis la okcent kronojn, kiujn vi petis, sed antaŭ la mondo ni devas konservi iom da ŝajno, kaj tial nun la bufedisto de nia entrepreno, d-ro Sepsi elĵetos kaj depuŝos la s-ron redaktisto per la piedo sur la ŝtuparon. Malsupre de la ŝtuparo sidas reĝa notario, kiu redaktos protokolon pri la kazo, poste la s-ro redaktisto povos foriri. Ni volonte donas monon, sed se en iu skandalproceso tio evidentiĝus, ni volas pruvi,

ke ni elĵetis la s-ron redaktisto. Bonvolu ne timi, la eĝoj de la ŝtuparo estas malakrigitaj, la tutan kovras dika, nodita, netondita tapiŝo.

– Dankon – diris la pseŭdoĵurnalisto iom ĝene ridetante –, ankaŭ sen tio mi estas bone remburita, ĉar de ĉi tie mi iros en bankpalacon, kie estas marmora ŝtuparo. Sed mia kapo, sinjoro, mia kapo ne plu toleras ŝtuparojn. Ĝi frapiĝadas terure, saltadas de ŝtupo sur ŝtupon, kaj ne forgesu, ke mi estas kalva!

– Tre domaĝe – diris la eleganta sekretario kun societa rideto –, ni ne povas preteratenti la depuŝon... maksimume ni povas fari, ke ni donos al vi la favoraĵon, kiun ricevas nur esceptokaze tri-kvar pli aĝaj, meritplenaj, malnovaj pseŭdoĵurnalistoj...

– Kaj kio estas tio? – malvelkis fulme la alia.

– Tio signifas – respondis la sekretario –, ke ni donas al vi skermomaskon por la kapo. Ĝi ŝirmas de laŭtaj frapiĝoj. Rondeĝaj ŝtupoj, komforta tapiŝo, kapŝirmilo... ni vere per ĉio favoras pseŭdoĵurnalismen.

Je gesto alvenis servistoj kaj provizis la kapon de la pseŭdoredaktisto per skermomasko.

– Dio estu kun vi! – diris la sekretario. – Mi ne ŝatas rigardi ion tian.

Li rapidis en sian kabineton.

– Adiaŭ! – postkriis lin la pseŭdoĵurnalisto kaj turnis sin al d-ro Seps:

– Ĉu ni povas iri?

– Tuj – diris la bufedisto kaj paŝis al paroltubo, kies ekstremo elstaris el la muro. D-ro Seps staris antaŭ la tubo, kvazaŭ li pasie kiskus ĝin.

– Ha lo! – aŭdiĝis obtuze. – Ĉu s-ro notario?... Bonvolu gardi vin! Alvenos pseŭdoĵurnalisto. Bonvolu noti: F. Elemér Elastagum, naskita en 1873 en Vámospércs, edzigita, patro de ses infanoj, senhava. Ĉu vi notis? Dankon.

Estis interesa kaj liberala kutimo ĉe la firmao, ke pri religio oni neniam demandis.

– Bonvolu stariĝi meze! – petis en negocista tono la bufedisto de la entrepreno. – Tiel. Dankon. Mi rekomendas min.

– Je via servo – balbutis la pseŭdoĵurnalisto kaj tremante atendis la okazontaĵon. Li ne kuraĝis retrorigardi.

La bufedisto blekis kun tedita voĉo:

– Malaperigu vin, fia ĉantaĝisto!

Kun tio li subite trempis sian dekstran piedon en la almetita forta kokain-solvaĵo, malsensigante tiel la viktimon, kaj puŝis lin tiel sur la punkto, kiun la ekvilibras rilatoj de la homa korpo preskaŭ antaŭvidas por ĉi tiu agospeco, kaj kie ankaŭ la pseŭdoĵurnalisto atendis la movon kun certa praa instinkto, ke li ekruliĝis kun laŭta klakado al la teretaĝo.

– Dek unu sekundoj! – suprenkriis la tempomezuristo, staranta malsupre kun kronometro en la mano.

– Brave! – laŭdis sin d-ro Seps. – Tio estas rekordo. Ne ĉiu pseŭdoredaktisto ruliĝas tiel rapide. S-ro redaktisto Speichel ruliĝis dek ses sekundojn longe.

D-ro Seps memkontente reiris en sian kabineton, sur kies pordo legeblis la surskribo: BUFEDISTO. Propre li ne tro ŝatis ĉi tiun novan oficon sian, en kiun la firmao Braunauer dungis lin el unuaklasa futbalteamo, kies elstara arierulo li estis. Liaj potencaj piedpuŝoj vekis la atenton de Bernardo Braunauer, kiu estis amiko de la sportoj, kaj kiam oni proponis al li altan salajron, li forlasis la teamon. Sed ĉi tie, en ĉi tiu burokrata kaj maŝineca kariero li konsolis sin per tio, ke li donis certan sportecon al sia rolo. Tiel ekzemple laŭ lia peto la firmao dungis tempomezuriston, kiu sportece mezuris la vojon de la flugantaj pseŭdoredaktistoj. Li estis elstara talento ĉi-kampe, kiu surprizis la firmaon per multaj novigoj. Ankaŭ la kokainsolv-aĵon oni aĉetis laŭ lia konsilo, kio atestas pri evoluinta humaneca sento. Ja vivas nur malmultaj, tre maljunaj pseŭdoĵurnalistoj, kiuj kapablas rememori la tempojn, kiam oni piedbatadis sen kokaino en la bankoj. Ĉi tiuj scias, ke la merito de d-ro Seps estas la aplikado de anestezo en la ĉantaĝaj aferoj. Li havis objeton nur kontraŭ la titolo „bufedisto”. Sed Bernardo Braunauer insistis pri la titolo sonanta internacie, kaj pro nenio en la mondo li emis aprobi, ke la doktoro alprenu la avide deziratan titolon „gazetar-direktisto” aŭ la ankaŭ de aliuloj proponatan „vic-pugopuŝisto”. Por kontentigi la vantecon de Seps li kompletigis la titolon „bufedisto” per la

titolo „batsekretario”, kiun li ofte ankaŭ uzis, por la delica ĝojo de la doktoro.

– Aĉa metio – murmuris d-ro Sepsi en sia kabineto, dum li ŝanĝis la koka-intrempitan boton per same delikata amerika lakŝuo, kian li havis sur la maldekstra piedo. La pedelo pendigis la gazetaran boton sur hokon, kaj la doktoro almetis sin al sia matenmanĝo, kiu konsistis el kelkaj tranĉoj da sengista pano, t.n. maco, kiujn la doktoro pecigis kun vigla krakigo en kafon, ĝis la kafo superŝvelis la glason.

Ludoviko Honest senvorte observis la tutan scenon en la atendejo, poste modeste alparolis alian serviston:

– Mi volus paroli kun s-ro Braunauer.

– Bonvolu iri al la sekretario – diris la servisto, kaj enpuŝis lin tra tiu pordo, tra kiu ĵus malaperis la sekretario, kiu „ne ŝatas tion rigardi”.

La sekretario sidis ĉe amerika skribotablo, kaj kiam Ludoviko enpaŝis, li skribis sur netan paperon, kuŝantan antaŭ li, jenon: „Budapeŝto, Budapeŝto, Budapeŝto, Budapeŝto, Budapeŝto, Budapeŝto, Budapeŝto, poste per nuraj majuskloj: BUDAPEŝTO, nur por ke Ludoviko atendu, timu, staru kaj tremu antaŭ la tablo timzorge, kiam venos lia vico. Poste li alskribis ankoraŭ: Budapeŝto, Peŝto, Buda, kaj denove, malrapide per kaligrafiaj literoj: Bbbudapeŝttttttto, poste Bukareŝto, sekve: BBBBBB, pli malfrue li alskizis desegneton, konsistantan el ĉiam pli malgrandaj cirkloj kun punkto meze de la plej malgranda cirklo. Kiam li ĉion ĉi plenumis, li faldis la paperfolion laŭlonge, ekstere li surskribis: Budapeŝto, la 12an de februaro 1914, kaj sube: B, b, B, b, 1914. Fininte ĉion ĉi, li flankenmetis ĝin sur la tablo kiel aranĝitan akton, trempis la plumon kaj almetis novan paperfolio-n, skribante supre jenon: bbbudapppppeŝto, poste subite sulkinte la brovojn, etendis sian maldekstran manon, kvazaŭ li volus transpreni peticion, alparolis kun senpacienca, urĝa voĉo la timide atendantan Ludovikon:

– Kion vi volas?

– Mi volus paroli kun s-ro Braunauer – diris Ludoviko respektoplene.

– Ĉu persone?

– Persone.

– En kia afero?

Ludoviko rigardis altere:

– Privata.

La sekretario tirvoĉe parolis al li, dum li rapide pluskribis sur la nova folio, surpaperigante ĉi-foje ĉ. centfoje jenon: Braunauer BBB. Braunauer BBB. Li eĉ ne suprenrigardis dume:

– Ĉu privata afero?

– Jes.

– Bonvolu al mi iom ĉirkaŭskribe indiki – diris la sekretario –, pri kiu speco de privata afero temas, ĉar mi estas la sekretario de s-ro Braunauer kaj mi lasas iri neniun antaŭ lin, dum mi ne scias proksimume, pri kio temas.

– Nu, bone – diris Ludoviko kun plialtigita voĉo –, se estas tiel, mi ne povas fari el ĝi sekreton. Mi estas Ludoviko Honest, ŝtata vicflaristo kaj mi reportis al s-ro Braunauer sumon, kiun li lasis ĉe mi dum mia foresto.

La sekretario pluskribis, rapide. Per sia maldekstra mano li dume premis butonon, je kio enpaŝis servisto en la ĉambron. Sen suprenrigardi, la sekretario trankvile instrukiis al la servisto:

– La psikiatron.

La servisto klinis sin kaj eliris. Estiĝis silento, nur la plumknarado aŭdiĝis, dum la sekretario desegnis grandajn majusklojn B sur la papero.

– Bonvolu klarigi – ekparolis Ludoviko –, kion tio signifas!

– Sidiĝu, amiko – diris la sekretario. – Oni liveros vin al la frenezulejo en Lipótmező.

Ludoviko tre ekmiris:

– Ĉu min?

– Vin.

– Tion ne! – kriis Ludoviko. – Mi ne estas freneza. Mi ripetas, mi reportis la monon, per kiu s-ro Braunauer, jes ja, mi eldiras, volis subaĉeti min!

La sekretario kunfaldis la paperon.

– Bonvolu ne kriegi – li diris –, ĉar per tio vi nur pligravigas vian situacion. Vi ricevos malvarman duŝon.

La pordo malfermiĝis, kaj enpaŝis okulvitrita junulo.

– S-ro doktoro – turnis sin al li la sekretario –, ĉi tiu sinjoro reportis ian monon. Bonvolu liveri lin en la observan sektion, kaj se montriĝos necesa...

– Saluton! – diris Ludoviko al la kuracisto. – Saluton, Viktor. Li estis lia iama samlerneano.

– Saluton! – diris la kuracisto. – Ĉu do vi estas la frenezulo?

Poste li turnis sin al la sekretario dirante:

– Sinjoro, ĉi tiu estas mia amiko Ludoviko... li havas neniun mankon.

La sekretario rondigis la okulojn.

– Ĉu neniun mankon?

– Neniun.

– Li ja reportis monon!

Ludoviko ridetante ekparolis:

– Sinjoro, estos plej bone, se vi kondukos min al s-ro Braunauer.

– S-ro Braunauer – respondis la sekretario – troviĝas eksterdome en la fabrikejo. Ŝarĝe de la respondeco de la s-ro kuracisto mi kunprenos vin, ĉar ankaŭ mi eliros al li, por fari la laŭvican tagmezan raporton. Se vi volas, venu kun mi!

– En kiu fabrikejo? – demandis Ludoviko.

– Li restadas en la panamaĵfabriko⁷.

Kaj li jam prenis sian palton.

– Ĉu en la panamaĵfabriko? – demandis mire Ludoviko Honest.

– Tie ja – konfirmis la sekretario. – Venu!

⁷ Ekzistas panama ĉapelo, panama teksaĵo; ĉi tie la aŭtoro aludas al la financa skandalo dum la konstruado de la Panama kanalo.

Ili adiaŭis la menskuraciston de la entrepreno kaj desupris la ŝtuparon. Surstrate staris granda, nazkatara aŭtomobilo, kramfe tusanta. Ili ensidiĝis.

– En la panamaĵfabrikon! – instrukciis la sekretario al la ŝoforo.

La veturilo komencis muĝi, knaradi, knaladi, poste ĝi skue ekiris. Post kelkaj minutoj ili jam flugis sur ekstera vojo al Soroksár, kun bruo simila al fusilkrakado. Je la dek-dua horo ili haltis ĉe pordego, entranĉita en barilo el altaj, oleimpregnitaj tabuloj, kiun la aŭtomobilo preterbruis jam de kvin minutoj.

– Giganta fabrikejo! – diris Ludoviko gapmire.

Malantaŭ la barilo staris, sub dudek ĝisĉielaj, fumvomantaj tubegoj, labirinta, fumnigra domkomplekso kun turoj, pontoj, kaldronegoj, de kies grandeco kaj ĥaoseco Ludoviko preskaŭ teruriĝis.

– Ne timu – kuraĝigis lin ridetante la sekretario –, ĝi estas timiga nur de ekstere. Ni estas en la panamaĵfabriko.

Ili elaŭtomobiliĝis. Estis la dek-dua horo. La panamaĵfabriko staris apud la Unua Hungara Efektiviga Dramfabriko, kaj en la sunplenaj tagmezaj horoj videblis, ke el la dramfabriko po miloj eltumultas gajaj, blukitelaj, fulgovi-zaĝaj hungaraj dramverkistoj por tagmanĝi. Kelkajn iliaj edzinoj atendis sur la vojo kun tagmanĝo en poto, man-kondukante etinfanojn.

La sekretario ĝentile lasis antaŭeniri Ludovikon Honest. Ili enpaŝis la korton de la panamaĵfabriko.

KVARA ĈAPITRO

– Kie estas la ĉefo? – demandis Ludoviko la sekretarion, gapante impresite al la grandega, ĥaosa fabrikejo.

– La s-ro ĉefo troviĝas en la transa parto de la fabriko, en la kontoro.

– Do ni iru – diris Ludoviko kaj ekiris flanke, preter la fabriko.

– Ne tien! – postkriis la sekretario.

– Kien do?

– Tra la fabriko.

– Kial do?

Tremo trakuris Ludovikon, kiam li ekvidis la rikanan vizaĝon de la sekretario. Nur nun li rimarkis, ke ĉiu dua dento de la sekretario estas el oro, ke liaj oreloj estas ne nur pintaj sed ankaŭ haraj.

– Pro Dio – li diris terurite –, kion do oni produktas en ĉi tiu timiga fabriko?

– Panamaĵojn – kriĉis la sekretario.

– Ĉu panamaĵojn?

– Ĝin. Purajn panamaĵojn.

– Kaj el kio oni faras ilin?

– El homoj.

– Kaj ĉu mi devas tie trairi?

– Se vi volas veni antaŭ la ĉefon, jes.

– Ĉu alimaniere mi ne povas veni antaŭ lin?

– Ne.

La sekretario ridis kriĉe. Kaj li aldonis:

– Ĉi tiu fabriko estas tiel konstruita, instalita kaj konstruĉiita, ke kiu eniras honesta tra ĉi tiu fronta pordo, tiu, transirinte ĝin, elpaŝas tra la malantaŭa pordo jam kiel preta panamisto. Kaj la malantaŭa pordo malfermiĝas rekte en la kontoron de la ĉefo. Tial sidas la ĉefo malantaŭ la fabriko. Kaj ĉiufoje, kiam tia flavbeka afektulo volas anonci sin ĉe li, tiun ni kondukos tra la fabriko. Tiel do, kiam vi alvenos antaŭ s-ro Braunauer, vi jam povos paroli kun li, ĉar tiam vi estos perdinta vian honestecon. Ĉu vi vidas tiun nigran rivereton?

– Mi vidas.

– Ĝi estas la rubakvo de la fabriko. Tie elfluas el la fabriko tiuj multaj honestosentoj, kiujn la vaporkaldronoj forkuiras el tiaj azenoj kiel vi! Vi volas redoni sesdek kronojn da subaĉeta mono al la ĉefo.

– Jes.

– Nu do, antaŭen...

Malrapide sed sekure li puŝadis lin al la enirpordo.

– Karmemora patro mia – diris Ludoviko kunmetinte la manojn kaj rigardante al la bela printempa ĉielo –, vi scias, ke mi devas redoni ĉi tiun malpuran monon, mi ne povas kotŝmiri per ĝi la nomon de miaj dek naŭ infanoj. Donu do al mi forton, amen!

Antaŭ ol enpaŝi tra la pordo, Ludoviko ankoraŭ unufoje promenis sian rigardon tra la fabrikejo. Sed ne longe li rigardis ĝin, ĉar li preskaŭ stuporiĝis, vidante la nigrajn fumtubegojn, vaporvomajn tubserpentojn, rulpontojn, ĝisĉielajn ferbrakojn, gruojn, kiuj baŭmis, altiĝis inter strikte konstruitaj pavilonoj, grimpis de muro al muro. Li devis ŝtopi la orelojn, tiel laŭta estis la bruoj. La malgrandaj fertuboj, elstarantaj el la muroj, sputis vaporon laŭtakte, kun koleraj ruktoj, dum oleaĉa likvo gutadis el ili. Ŝrika muĝado de dinamomaŝinoj, menstorda klakado de transmisiaj rimenoj, gluglado de bolkuirataj gudraj, terure fetorantaj sukaĉoj, sonanta kvazaŭ po miloj oni fritadus revolverojn, aŭ kvazaŭ en ruĝe ardantan, fajrofundan valbasenon oni subite enlasus ansergras-niagaron tra grandaj klujoj; sovaĝe stridantaj vaporfajfiloj, el kiuj ŝprucegis vaporoj kun tia forto, ke ŝirante en ĉifonojn la ekstremon de la tuboj, ĝi kuntrenis ferpecojn inter la eĥe tondrantajn nubojn. El la flanko de la granda meza halo aŭdiĝis tia krakeganta kaj tamen maŝinece ratlanta ferbruego, kvazaŭ frapadus kolere de supre, kontraŭ la vitran tegmenton de fervoja stacidomo lokomotivojn en rapida unu-post-alio pro fia venĝemo maldungita relvoĵgardisto, kies brakojn la kolera dio de malriĉuloj kreskigis tiel gigantaj kiel la bulvardo Múzeum, liajn manplatojn tiel vastaj kiel la placo Kálvin kaj liajn kvin fingrojn tiel longegaj kiel la kvin, el ĉi tiu placo disbranĉiĝantaj stratoj Baross, Üllői, Rádai, Várház kaj Kecskeméti. En ĉi tiu kakofonio, kompare kun kiu la jubilea erupcio de vulkano sonus kiel korkopafilo, kiam ĝi mispafas, en ĉi tiu kakofonio, komparebla al kiu estis nur la bruego, per kiu en la praepoko la naskantaj Alpoj, post kiam la maro retiriĝis de super Budapeŝto, antaŭenŝovis la monton Gellért ĝis tiu malgranda ferkrado, kiu ankaŭ hodiaŭ ne lasas ĝin plugliti, en ĉi tiu kakofonio, en kies orkestro la plej maljuna turnoventa marŝtormo povus ludi maksimume nur hobojojn, kaj la susureganta fajra diofulmo nur triangulon, en ĉi tiu kakofonio, el kiu

nur la voĉo de Vilmos Sümegi⁸ elaŭdiĝis pure, dum, eĉ ne streĉinte sin, li kriis „Salo, salo, salo!”, en ĉi tiu kakofonio staris Ludoviko Honest kun tridek forintoj en la mano, sen recedo kaj timo kiel Sankta Johano antaŭ la templo, kiam la sep anĝeloj elverŝis sur la teron la sep pelvojn de la kolero de Dio, dum „okazis fulmoj kaj voĉoj kaj tondroj, kaj grandaj tertremoj”⁹, sen dubo kaj hezito, ĉar lia konscienco estis pura, li staris, staradis, ĝis li ekparolis kaj diris:

– Do ni iru, s-ro sekretario.

Ili enpaŝis tra malgranda vitropordo, kiu de si mem fermiĝis post ili, kaj sur kiu interne ne estis klinko. Reiri de ĉi tie ne eblis. Sed interne estis afabla kaj trankvila silento, la eta pordo ekskludis la apokalipsan bruegon de la fabrikejo, ĝi aŭdiĝis ĝis ĉi tie nur kiel dum silentaj noktoj la fora marmurmuro al la Karsta montaro, kiam ĉe Kameral-Moravica la rapidtrajno haltas. En malfermita kameno kraketadis gaja fajro, kaj antaŭ la fajro staris sinjoro en ĵaketo, leganta la oficialan gazeton.

– *Zabrugom schevalijé bu bu, spronc!* – diris la sekretario en nekomprenebla kaj proprecia lingvo al la sinjoro en ĵaketo, kiu post ĉi tiuj vortoj ridetante okulmezuris Ludovikon kaj respondis bonvole:

– *Gru, gru, kartum spronc.*

Kaj skribinte lian nomon en granda libro, klaralingve, ĝentile li diris al Ludoviko:

– Bonvolu ĉi tien!

La sekretario malfermis dualan pordon, lasis Ludovikon antaŭeniri. Ili alvenis en bone hejtata, bela, hela salono. En la salono staris en konsiderinda distanco kvar fajnaj amerikaj skribotabloj. Ĉe ĉiu sidis pomruĝe sana, dika sinjoro en tre eleganta vesto.

– Kia salono ĝi estas?

– Ĝi estas akceptejo – respondis la sekretario.

– Kies akceptejo?

⁸ Vilmos Sümegi (1864-193): deputito, ĵurnalisto, socialemo homo.

⁹ Biblio: Apokalipso 16:18.

– Nenies – diris la sekretario –, ni nomas ĝin tiel, ĉar je ĉi tiuj kvar sinjoroj oni demonstros al vi, kiel aspektas oficisto, kiu akceptas subaĉetan monon, anstataŭ senpripense rifuzi ĝin. Post tio sekvos – ni rigardos ankaŭ ĝin, ho, terure! – la rifuzejo. Sed portempe ĉirkaŭrigardu en la akceptejo!

Ludoviko ĉirkaŭrigardis. La oficistoj, senescepte ĉiuj kvar, pikpurigadis siajn ungojn. Apud ĉiu staris fajne prilaborita, orita rubujo el arĝento, en kiun ili fingropuŝis ĉion, kion per la cizelita, ortenila, ebura manikura garnituro, farita laŭ iamaj planoj de Benvenuto Cellini, ili pikpurigis el sub siaj rozecaj ungoj. Sed ili estis tiel belaj, dikaj, puraj kaj flegataj, ke elvenis nenio alia el sub iliaj ungoj ol iometo da bonodora, neĝblanka haŭtero. La buŝo de Ludoviko restis nefermita. Kiel por ĉiu ŝtatoficisto, ankaŭ por li estis unĝopurigado la sepa ĉielregno.

– Kiel bone ili vivas! – li balbutis.

– Ĉar ili akceptis la monon – flustris rapide la sekretario en lian orelon.

Mi diras, Ludoviko forgesis fermi la buŝon. La kvar modeloficistoj, kredante, ke li oscedas, same malfermis la buŝon. En la aero aŭdiĝis frapiĝo de flugiloj. Kun ŝanceliĝa, puŝiĝada flugado, kiel la korvoj de Votano venas, kvar frititaj kolomboj flugis al la buŝoj de la oficistoj. Palatotikla fritodoro disetendiĝis en la ĉambro. Ludoviko pensis pri la somera ledzono de sia edzino, kiun, salitan, paprikitan li kutimis matenmanĝi anstataŭ lardo. Kaj tiuj kolomboj! Ili ne enflugis tuj krude en la buŝon de la oficistoj, por kaŭzi maloportunon. Unue ili enŝovis unu sian femureton, kaj atendis, ĝis la oficisto manĝas ĝin. Poste la alian femureton, kaj baldaŭ altenis ankaŭ la du flugiletojn. Kun gracia movo, kiel patrino etendas sian mamon al sia infano, ili altenis sian bongustan bruston, kaj kiam la vorema buŝo ankaŭ ties viandon deronĝis, subite ili turnis sin, kaj kun la gracio, kun kiu kanzonetistino kaptas malantaŭe en nodon kaj eklevetas sian krispan, mallongan jupeton laŭ la frapoj de bastamburo, subite, sed pudore ili alproponis ankaŭ sian postaĵon al la oficistaj lipoj.

– Tiel ili intermanĝetas – flustris la sekretario kun varmega spiro en la orelon de Ludoviko –, tiel intermanĝetas tiuj, kiuj akceptas monon.

La oficistoj viŝis sian buŝon per parfumita poŝtuko, kaj la restaĵoj de la kolomboj per siaj skeletaj flugiloj mallaŭte klaketante elflugis tra la ventumilo. Nur la ungoj de la oficistoj videblis el sub la multaj ringoj, kiuj kovris

iliajn fingrojn; nu ne tial, kvazaŭ ili ne havus ringojn por siaj ungoj, sed ĉar oni devis ilin pikpurigadi. Iliaj fingroj aspektis pro la multaj orringoj kiel la longa, fleksebla dentkuracista tubo, kiu transdonas pelforton al la dentoborilo. Sed tia malĝoja afero eĉ ne venis en ilian menson. Ili ridetis volupte unu al la alia, kaj unu el ili mallaŭte ekparolis:

– Atentu! – diris la sekretario al Ludoviko.

– Adolfo – rakontis unu dikulo al alia –, oni konstruis etaĝon sur mia vilao.

La alia tedite respondis:

– Sur la mia jam estas. Mi nun muntigas kunfaldeblan liton en mia aŭtomobilo.

La tria aldonis:

– Mi jam ankaŭ tediĝis de ĝi. Mi nun instaligos elektran kuirejon en la pli malgranda motorŝipo de mia tria amatino, ĉar en ŝia pli granda ŝipo estas gaskuirejo.

– Ĉu gaskuirejo en la ŝipo? – demandis la unua.

– Jes – respondis leĝere la tria –, ĉar mi aĉetis al ĉiuj miaj kvin amatinoj po unu tian pli grandan ŝipon kun kuirejo, kaj se ni ĉiuj kvin samtempe ekskursas, venas post ni sesa gasprodukta ŝipo, el kiu la gaso iras tra tuboj al la aliaj kvin, por hejti kaj lumigi. Tre praktika solvo. Mi proponas ĝin ankaŭ al vi.

Du el ili skribis en sia notlibreto, ke ankoraŭ ĉi-posttagmeze ili aĉetos ĝin por siaj pupinoj. La kvara ne havis notlibreton, li ligis oran nodon sur sia poŝtuko el brusela punto, por ne forgesi ĝin.

– La malgrandan gasproduktan ŝipon – rakontis la tria – mia plej malgranda filo aĉetis al mi el parto de sia ŝparita kolazion mono.

Li turnis sin al la kvara:

– Kaj vi pri kio cerbumas?

– Ĉe la rekontrolo de mia proprietaĵo – diris la kvara – mi trovis grandan superfluan, per kiu mi jam vere ne sciis, kion fari.

- Donu ĝin por bonfaraj celoj – konsilis la unua.
- Ba – diris la kvara levante la ŝultrojn –, hieraŭ mi konstruigis hospitalon por malriĉuloj kun du mil litoj. Kaj la tuta superfluo sumas mizerajn dek kvin mil kronojn. Sed mi jam scias, kion mi faros per ili.
- Vi ĵetos ilin en Danubon.
- Ne... hieraŭ mi ĵetis tien kvin mil kronojn. Mi elspezos ilin por alia celo. Ankaŭ vi legis, ĉu, kiajn perturbojn kaŭzis la dujara fermo de la Ĉen-ponto. Mi do riparos ĉi tiun situacion.
- Ĉu per dek kvin mil kronoj?
- Per malpli multaj. Per dek kvar mil sescent.
- Kiel?
- Nu, imagu, hieraŭ mi volis veturi al Buda, kaj kiam mi alvenis ĉe la Ĉen-ponto, oni ne lasis veturi mian aŭtomobilon eĉ sur la antaŭponton placon. Tiam mi pensis: oni ne permesas al mi enveturi, ĉar la ponto estas fermita kaj la takso estas do neenkasigebla. Kio estas tio, se ne procedo pro neenkasigebleco? La art. XL de 1879, tria alineo de § 22 de la Kriminala Kodo pri Deliktoj deklaras, ke unutaga fermo en ĉelo egalas al dek forintoj. Estas do nenio pli simpla ol mi pagos la sep mil tricent forintojn, pagendajn pro lezo de dujara fermo, t.e. dek kvar mil sescent kronojn, kaj tiam ĉio estos en ordo, oni povos enveturi kaj la fermo ĉesos. Mi miras, ke la urbo ne divenis ĉi tiun simplan manieron de aranĝo. Ankaŭ al mi ĝi estas bona, ĉar ofte mi veturas al Buda, mia haremo ja troviĝas tie.
- De ekstere aŭdiĝis bleko.
- Kio estas tio? – demandis Ludoviko.
- Nenio – diris la sekretario –, nur la pedeloj elĵetas klientojn, por ke ili ne ĝenu la oficistajn moŝtojn. Eĉ subaĉetantoj ne povas enveni. La mono glitas tra tubopoŝto sur la tablojn de ĉi tiuj sinjoroj.
- La murhorloĝo batis la trian horon.
- Kiel? – miris Ludoviko –, kiam ni enpaŝis, estis la dek-dua tagmeze. Apenaŭ tri minutojn ni restadas ĉi tie, kaj la horloĝo jam batas la trian?

– Nu jes – ridaĉis la sekretario –, tia estas ilia oficeja horloĝo. Unu minuto egalas unu horon.

Tra kaŝpordoj livreitaj ĉambristoj portis multekostajn peltmantelojn al la kvar sinjoroj.

– Ni iru – ekparolis la sekretario –, la oficiala horaro finiĝis.

Ili direktis sin al la pordo kontraŭflanke de la salono.

– Ĉi tiu pordo – diris malsereniĝinte la sekretario – kondukas en ĉambron de oficistoj, kiuj akceptas monon de neniuj. Kiuj estas tiaj kiel vi.

– Ni iru, ni rigardu ĝin! – ekkriis Ludoviko kun ekbrilantaj okuloj kaj malfermis la pordon.

Trans la pordo estis malhele, sed el la profundo, kien la pordo malfermiĝis, frapis tia fetoro, ke Ludoviko recedis. La fetoro estis malvarma kaj memorigis pri la odoraĉo de malpuraj vestoj, putrantaj legomoj.

– Tiel aspektas – flustris la sekretario – la vivo de honestaj oficistoj.

Ludoviko superis sian naŭzon kaj enpaŝis la humidan obskuron, saturitan de terura aero. La sekretario fermis post li la pordon.

MAJSTROJ

Antaŭ ol transiri al la kvina ĉapitro, la aŭtoro de la romano enhejmigas novigon en la enlandan literaturon de romanoj per daŭrigoj. Pri sia jena romano li ne asertas, ke ĝi apartenas al la majstroverkoj de la mondliteraturo, sed fiere li konfesas, ke rilate al la atentema traktado de la legantoj ĝi okupas lokon inter la unuaj. Elirante de ĉi tiu principo li ne procedas tiel, kiel aliaj romanistoj, kiuj subite, neatendite finas sian romanon, sed, konante decon, jene li anoncas, kiel en kartludo, la tri majstrojn, kio signifas, ke la degnan paciencon de la leganto li pretendas ankoraŭ por tri ĉapitroj kune kun la sekva. Kaj post ĉi tiu eta devojiĝo sekvas

KVINA ĈAPITRO

Kiam ili enpaŝis el la agrabla, hela, feliĉa, bone hejtata, bonodora kaj komforta salono de la subaĉetebaj oficistoj en la blinde malhelan, humidan, fetoran grotaĉon de la honestaj oficistoj, la spiro de Ludoviko Honest ĉesis por momento. La vigla sekretario ektenis fortan anglan salon en verda fi-

olo sub lian nazon. Tio refreŝigis Ludovikon, kiu volis ĉirkaŭrigardi, sed en la obskuro li vidis nenion.

– Atendu – diris la sekretario kaj elpoŝigis elektran poŝlampon. Li premis ĝian butonon, kaj bela blanka lumeto komencis krepuski antaŭ ili. Malrapide konturiĝis la bildo. La pordo, tra kiu ili enpaŝis, kondukis sur specon de malgranda balkono, elklininte sin tra kies apogrelo, oni povis rigardi en la profundon. Ĉi tiu groto estis almenaŭ dekoble pli profunda ol normala kelo en Peŝto. Kaj super iliaj kapoj la tegmento estis tiel alta, ke ĉi tiun alton la poŝlampo eĉ ne povis prilumi, nur el la eĥo de siaj eldiritaj vortoj ili povis konkludi, ke la groto estas pli alta ol kiu ajn preĝejo. De la balkono plukondukis mallarĝa ferponto, kiu superabismis aŭdace la kapturnan nigran profundegon. Super kaj sub ili, dekstre kaj maldekstre videblis humida nigro de putranta odoraĉo, antaŭ ili troviĝis nenio alia ol la mallarĝeta ferponto, tra kiu ili devis iri por veni al la transflanka truo, elkondukanta el ĉi tiu terura spaco.

– Dio mizerikorda – balbutis Ludoviko –, kie estas ĉi tie la homoj?

– Malsupre – klarigis la sekretario.

Ili ambliis kun eĥantaj paŝoj ĝis la mezo de la ponto, kaj ĉi tie la sekretario turnis malsupren la lumon de la poŝlampo. Post nelonge malproksime, tre malproksime sube, en tia profundo, ke ili aspektis tute miniaturaj, kiel formikoj, videbliĝis en la luktanta, febla lumo cento da oficistoj, skribantaj kurbigitaj super kadukaj tabloj. La aeron plenigis stranga bruoj: ĉi tiu bruoj estis, kvazaŭ ia tre densa, monotona pluvo aspergus.

– Ĉi tiu sono – ekparolis la sekretario – estas la frotado de tiu amaso da plumoj, per kiuj ĉi tiuj kompatindaj homoj diligente skrapadas la paperon.

Ludoviko prenis la binoklon, kiun la sekretario donis en lian manon. Tra ĝi li rigardis malsupren. Konsternite li vidis, ke ne nur centoj kaj centoj sed miloj kaj miloj da etaj, magraj, malbone vestitaj hometoj sidas kaj skribas ĉe almenaŭ dek mil etaj tabloj, kaj neniuj eĉ nur levetas la kapon. Subite la binoklo malklariĝis, ekstremis en liaj manoj, kaj li devis forpreni ĝin de siaj okuloj, kaj varmege kaj neatendite ekinundis larmoj liajn okulojn. Li ekvidis sin mem inter la formiketoj, sin mem persone, kiel li sidas ĉe la ŝanceliĝanta tablaĉo de la Ŝtata Benzinfetor-Konstata Stacio, kaj sulkas per sia plumo, per ĉi tiu damnita nigra plugileto, la eternan plugokam-

pon de ĉiuj mizeroj de la homaj mensoj – la blankan paperon. Liaj elŝprucantaj larmoj, kiel pluvo sur teron, faladis sur lian blankan paperon. Tiam subite li remetis la binoklon antaŭ siajn okulojn kaj rigardis malsupren sur sin, por vidi, kion li faras. Malsupre, la formike eta Ludoviko, sidanta ĉe sia eta skribotablo, kiu estis tiel malgranda kiel nigra kvadrato de ŝakenigmo, sekigis per sorbopapero siajn falintajn larmojn sur la papero kaj viŝis siajn okuletojn per poŝtuko, granda kiel blanka kvadrato de pepita pantalone. Lia kapo estis tiel eta kiel papavero kaj ankaŭ ĝia koloro estis tia, sed ne de freŝa nigra papavo, sed griza kiel de papavo, kiu videblas sur papava paneto ĉe bakisto. Tiam li konsciiĝis, ke de sube eksonis ia sufokita, profunda tondro kaj flugis por formorti sub la altega, malhela volbo. Ĉi tiun tondron sekvis muĝa ventatako, kiu forkaptis la ĉapelon de sur la kapo de Ludoviko kaj ekskuis la mallarĝan ferponton.

– Kio estas tio? – demandis Ludoviko ektime.

– La bruo simila al tondro – klarigis la sekretario – estas la grumbletoj de multe multaj stomakoj, kiuj unuiĝinte ekmuĝas al la ĉielo, sed la tegmento, remburita per korko, sorbas la sonon, tiel neniu aŭdas ĝin.

– Kaj la muĝanta vento?

– Ilia suspiro – diris la sekretario –, ĉar kiam ili metas punkton post la pretigo de akto, ili ĉiuj eksuspiras. Tial estas farita ĉi tiu ponto el fero, ĉar la malnovan, kiu estis farita el ligno, ilia suspiro forŝiris ĉirkaŭ Kristnasko. Tiam ili eligas la plej fortajn suspirojn, Kristnasko estas la ventoŝtorma sezono de ĉi tiu groto.

– Kaj la flakoj malsupre, en kiuj ekbriladas la lumo de la poŝlampo?

– Larmoj, kiujn ili, tute malĝuste, elploras sur la teron. Unufoje oni jam klarigis al ili, ke ili ploru higieno en la kraĉujojn, sed la sentaŭguloj ne povas retenigi ĝis tie siajn larmojn, kaj daŭre plenploras la plankon. De ties vaporigo estas tiel humida, malseka ĉi tie la aero.

Ludoviko frostotreme suprenfaldis la kolumon. Ili silentiĝis. La lastaj ondoj de la formortanta ventomuĝado nun silentiĝis en la nigra malproksimo. Poste ree aŭdiĝis nenio alia ol la rapida, diligenta skrapado de dek mil plumetoj.

– Kaj la fetoro? – reprenis timide Ludoviko la parolfadenon.

La sekretario respondis kun ironia rideto:

– Ĝi estas laodoro de la honesta malriĉeco. Kulpo havas varman parfumdoron, kiel la hejtata dormoĉambro de koketulinaj, kiam la damoj enlitiĝas; honesto havas brasikan odoron kiel nehejtataj studentaj ĉambretoj dum vintraj matenoj, kiam la studentoj ellitiĝas.

Malrapide ili iris al la elirejo. Ludoviko riskis ankoraŭ unu demandon.

– Kaj kial regas mallumo?

– Tial – respondis la sekretario –, por ke ĉi tiuj ne vidu unu la aliajn.

– Ĉu por ke ili ne vidu unu la aliajn?

– Tial.

– ???

La sekretario klinis sin al lia orelo:

– Tiel ili vidas nur sian plej proksiman najbaron, kaj la fakto, ke ankaŭ ilia najbaro estas tiel same mizera kiel ili, konsolas ilin. Sed se foje estiĝus helo, kaj ili subite ekvidus, kiom multmilope ili estas, ili konsciiĝus, ke unuigitaj ili povus forbalai ĉion, kaj tiam ĉio ĉi tie kolapsus. Vi ja ĵus sentis... de iliaj nuraj suspiroj la ferponto komencis ŝanceliĝi kaj ektremis la plafono. Kaj se ili komencus kriegi...

– Kio okazus tiam?

– Pri tio prefere ne demandu! Feliĉe, ili ne kriegas, ĉar en la obskuro ili ne vidas, kiom multegaj ili estas.

Nova ventoŝtormo ekmuĝis el la profundo. Ili devis kroĉi sin al la fera apogrelo de la ponto. La tuta konstraktaĵo eksanceliĝis, balanciĝis kun ili super la timiga abismo.

– Ni foriru de ĉi tie – diris Ludoviko ekscitite. – Ĉu vi havas cigaredon?

– Ekstere mi donos – diris la sekretario –, ĉar ĉi tie estas malpermesite ekbruligi alumeton.

– Kial?

– Dio mia, ja ankaŭ tio estas helo. Ĉiufoje, kiam senatenta vizitanto ekbruligis alumeton, aro da mizeraj formikoj tie sube ekvidis unu la aliajn. Foje la fervojistoj kunkuris, aliffoje bankoficistoj ekvidis ĉe ekbrulanta lumo, kiel multaj ili estas, okazis ke eĉ ŝtataj oficistoj ekmovis sin, sed rapide ni estingis la alumeton. Dum tempeto ankoraŭ aŭdiĝis ilia svarmado, poste ili silentiĝis. Ili rigardis dum tempeto en la direkto, kie la helo eklumis kaj estingiĝis, sed poste ili suspirante rekurbiĝis unu post aliaj super sian skribotablon. Tiam okazis, ke la lignoponton forblovis la ŝtormo. Sed de tiam ni atentis, do delonge ne okazas miso, kaj ankaŭ la suspiroj ne estas tiel tempestaj. Plie pli profundaj kaj pli longaj. Sed malpli bruaj.

– Ĉu la poŝlampo ne ĝenas ilin?

– Ne, ĉar ĝi ĵetas sian lumon sur malgrandan areon. Kaj tiuj eĉ ne rigardas al poŝlampo, ili ja estas honestaj oficistoj, kiuj, se oni metas la manon en la poŝon, tuj forturnas sian vizaĝon. Ili ne scias, ke mi elprenas lampon, ili nur vidas, ke mi eltiras ian brilan objekton el mia poŝo, kaj tio sufiĉas al la kompatinduletoj, por unue spite forturni sin, kaj poste ili jam ĉiuj klinas sin super sian paperon kaj sovaĝe pluskribas.

Kune kun la blanka lumo ili atingis la finon de la ponto. Ĉi tie la ponto finiĝis per simila ferbalkono, per kia ĝi komenciĝis. Malantaŭ la ferbalkono troviĝis la elireja pordo.

– For de ĉi tie! – sufokiĝadis Ludoviko kaj elkuris tra la pordo. La sekretario post li.

Post la profunda silento, kiun nur fojfoje interrompis la stomakotondrado kaj la suspira ventego, subite ili venis en inferan kakofonion. En granda ĉambrego kun vaksita planko tumultis, kirligadis, nigradis miloj kaj miloj da homoj. Orefenda, konstanta bruego plentondris la imponan, maŭrstilan halon. Post kelkaj minutoj, post kiam la oreloj de Ludoviko komencis kurtimiĝi al la terura bruego, li rimarkis, ke la amaso, tumultanta en la maldekstra flanko de la halo, ripetas nur unu vorton, kaj la dekstraflanke kirligantoj same ripetadas unu vorton, tamen alian.

La sekretario kondukis Ludovikon sur pado, lasita malplena inter la du amasoj sur la brila pargeto. Akre kaj rekte, kiel la tondilo de la versaĵla ĝardenisto tondis la frondon de la arbospaliroj, apartigis la pado dekstre

kaj maldekstre la du amason, inter kiuj la vojo kondukis sagorekte sen ajnaj manreloj.

– Ĉi tie ni rapidu – klarigis la sekretario –, ĉar tio ne estas tre interesa. Dekstre svarmas malhonestaj oficistoj, intermiksiĝante kun riĉaj klientoj, entreprenistoj, bankieroj, deputitoj, magistratanoj, avidaj komercistoj, kaj ili trae-kvere trinkas kun ĉiuj por ciumado. La tsi-tsia vorto, kiun ĉiuj senlace ripetas, ĝis ilia lango elpendas, estas „ci”. Ĉi tie ili ciumas dek horojn tage. Tiel longe daŭras, ĝis ĉiu malhonestulo „priciumas” ĉiun influhavlulon.

– Kaj aliflanke?

– Tie svarmas honestuloj, kaj tiu sombra, grumbla vorto, kiun ili senlace ripetadas, estas „stulta”. La samaj riĉaj klientoj, entreprenistoj, bankieroj, deputitoj, magistratanoj kaj avidaj komercistoj, kiuj dekstre ciumas, priciuminte ĉiujn, transiras tra subtera tunelo transflanken, kaj kolere pristultumas de kapo ĝisplande la honestajn oficistojn, kiuj sombre repristultumas ilin.

Ludoviko orelumis dekstren. Kiel muĝanta vento en arbardenso aŭdiĝis:

– Ci...ci... ccciii... ccccciiii... cici...ci...

Kaj de maldekstre aŭdiĝis, kiel ellastubo de base ratlanta granda eksplodmotoro:

– Stultastultastultastulta...

Dekstre ridetoj, maldekstre sovaĝe fulmantaj rigardoj, dekstre mankavoj, maldekstre pugnoj, dekstre dikuloj, maldekstre magruloj, dekstre varma ci-odoro de bonfarto, maldekstre la supre menciita malvarma stult-odoro. Ludoviko kuris kun tremanta koro tra la mallarĝa hom-aleo kaj jam laca, pelita, senspira, malfermis la elirejan pordon. Konsternite li haltis. Terure ĉiel-strebanta, densa praarbaro muĝis antaŭ li, plena de el libroj konjektataj sed neniam viditaj mirakloj, haladza, varmega vaporo, sovaĝaj kaj acerbaj odoroj.

Ĝi estis la arbaro Aruvim.

SESA ĈAPITRO

Trans la pordo, kiel mi jam diris, prezentiĝis al Ludoviko la bildo de la arbaro Aruvim, pli ĝuste ĝia kopio, kiun la panamaĵfabriko farigis laŭ la arbaro. De ekstere ĉi tiu arbaro videblis kiel la granda meza vitrohalo de la fabriko, kaj fakte la firmao Braunauer konstruigis, sen domaĝi kostojn kaj laboron, ĉi tiun potencon vitrohalon, egalan al dek ĝis dek kvin fervojaj stacidomoj por la celo, ke ĝi akceptu en si la precizan kopion de la fama afrika arbarego. La vapormaŝinoj, pumpiloj, dinamoj, kiuj faris la neimag-eblan bruegon de la fabriko ekstere kaj en la maŝinhaloj, servis ĉefe por teni en konvena temperaturo ĉi tiun, el la tropika regiono transplantitan arbarparton, por provizi ĝian teron per la ĥemiaj kondiĉoj de la afrika humo kaj por aspergi pluvon de konvenaj kvanto kaj kvalito sur la senteman plantaron. La zorgemo de la firmao estis tiel granda, ke eĉ la atmosfera elektreco estis precize tia en ĉi tiu terure granda forcejo, al kia la afrika pr-arbaro estas kutimiĝinta. Zorga laboro de longaj jaroj, laciĝon neglektanta lukto de ĝardenistoj kaj famaj scienculoj ebligis, ke ĉi tiu transveturigita arbarparto fine enradikiĝu, eĉ pluvivu. La arbarkopio kostis al la firmao dudek tri kaj duonon da milionoj, sed kiam Bernardo Braunauer la pli mal-juna ekvidis siatempe ĉi tiun buĝeton, jene li ekkriis:

– Volonte mi oferas por ĉi tiu celo eĉ pli multe, ĉar se nur unusola oficisto ekŝanceliĝas en ĉi tiuj ejoj, ne dudek tri sed kvardek ses milionojn povas gajni tiu, kiu kompetentas pri la kieloj kaj kialoj.

Kvankam la arbaro havis tre proprecen, prefere nur idean signifon en la panamaĵfabriko. Por kompreni ĝian signifon, ni enpaŝu kun Ludoviko kaj lia akompananto, la sekretario en la arbaron.

Ĝi konsistis el arboj kun densa frondaro, kiuj kreskas trioble, eĉ kvaroble tiel altaj kiel niaj ordinaraj arbaraj ekzempleroj. Se ni imagas ĉiutagan, densan hungaran arbaron, en kiun tra la densa frondotegmento la suno apenaŭ kapablas penetri, ni povas havi nur ioman-duonan bildon de tiu mistera kaj sombra malhelo, kiu regis en ĉi tiu afrika arbaro, kaj pri kies atmosfero ni povas krei al ni ideon nur tiel, se ni imagas tri etaĝigitajn, densajn hungarajn arbarojn. La ridanta, orkolora sunlumo, fariĝanta ie kaj aliloke malhele verda krepusko, sed plurloke nur profunde violkolora ombro, lasas nur konjekti, ke supre, super la arboj regas taglumo. Kaj se ni metus tri el ili unu sur la aliajn, la miliono da zigzagaj radikoj de la du su-

praj arbaroj pendus en la sube densiĝantan frondaron, penetrante eĉ trans ilin, kaj ili pendigus siajn tuberaĵn, kurbajn, kapricajn branĉojn ĝis la tero de la plej suba arbaro, ĝuste tiel pendas, balanciĝas, interplektiĝas la fantaziaj lianoj, aerradikoj, grim pantaj plantoj, brakdikaj volvotigoj en tiel densa ĥaoso, ke kelkloke, en pluretaĝa alto la folioj, falintaj en la densan vepron, fariĝas putranta humo, vera nova tero, el kiu pli nova tero elkreskas pli novaj grimpoplantoj, arbustoj, arboj, veraj etaj junaj pendoarbaroj super la kapo de la homo, enboriĝante en la frondaron kaj farante la supran parton de la tuta arbaro tiel kompakta, ke pri tio eŭropa homo povas havi ideon nur, se li imagas terure grandan, tiel grandegan verdan spongon kiel Budapeŝto. Direkte al la tero ĉi tiu spongo maldensiĝas, ĝiaj poroj plivastiĝas, sed senpere super la tero ĝi ankoraŭ restas tiel densa, ke truoj, tra kiuj homo povus transŝovi sin, nenie videblas.

Vojo mankas. Sur la tero kreskas arbustoj, vepro kun dornoj tiel dikaj kiel la meza fingro de homo; falintaj kaj putrantaj trunkoj ŝvebas, nur kies bazoj povis resti surtere, la supraj ekstretoj restis post falo pendantaj tra la rampantaj kreskaĵoj, disputante en pecetojn. Verdas grasa, karna musko, kreskinta kiel arbusto; elstaras tiom da radikoj, kiom povas havi lokon unu apud aliaj sube kaj supre implikiĝinte. Jen tie kaj aliloke videblas polviĝantaj, neatendite aperantaj, disfalantaj ŝtonblokoj kun grandeco de kamparana domo, pri kiuj neniu scias, kiel ili venis en la profundon de la arbaro. Jen ĉi tiu estas la grundo, tra kiu oni devas barakti tiu, kiu volas transpasi la arbaron.

Estas varme. Ne seka sed vapora, humidoplena, kun varmega nebulo. Kiel en fermitaj kameroj de vaporbanejo. Ĉu pluvos, ĉu ne, en la arbaro Aruvimi ĉiam gutadas io de supre. Tepidaj gutoj frapiĝadas, la trunkoj briladas pro humideco en la malhelo, ĉio estas malseka, vaporplena, glitiga kaj varmega. Se pluvos, tio rimarkeblas nur tiel, ke varma akvo fluas, rojas ĉie. Temas ne pri libere falantaj pluvogutoj. Temas pri tio, ke ĉi tiu terura, verda spongego suĉplenigas sin eĉ pli humida, pli akvoplena. Tiufoje eĉ dum hela tagmezo fulge nigras en la arbaro. Ke ĉesis plui, tion oni povas rimarki nur tiel, ke ie kaj tie reaperas la malhele violkolora krepusko aŭ kelkloke en la supra frondoetaĝo ekbriladas dise malhele verdaj lummakuloj.

Spiri estas nekutime lacige en la pezodora, saturita vaporo. Naŭza fetoro de mucida, acida ŝlimo miksiĝas kun fortaj kaj sintrudaj rezinodoroj, el la denso leviĝas varmega haladzo, kiu unuigas en si la odorojn de diserigitaj laŭrofolioj, karamelo kaj malvigla marakvo, putrantaj en la borda sunvarmo. Ĉi tiu atmosfero narkotas kaj langvorigas, el la nazotruoj penetras rekte en la cerbon, ĝi estas tiel varma, sufoka kaj prema, ke la oreloj ŝtopiĝas, estas tiel pika, ke larmoj inundas la okulojn, la vizaĝo ardiĝas, la pulso batas super cent, ne estas do mirinde, ke Ludoviko recedis, kiam li ekvidis ĉi tiun arbaron.

– Kio estas tio? – li balbutis terurite.

La sekretario respondis:

– La arbaro Aruvimi. En ĝia transa flanko troviĝas la elirejo.

– Kiu kondukas al s-ro Braunauer?

– Ho ne! S-ro Braunauer ne estas tiel malsaĝa, por tiom malfaciligi la aliron al si. La arbaro estas du kilometrojn longa, tiel vasta kiel la Margitinsulo aŭ la tuta longo de la avenuo Andrásy. Kiu venas ĝis tie kiel vi, kiu vidis la larmohumidan mizeron de la honestaj oficistoj kaj la parfuman bonstaton de la subaĉetebloj kiel vi, antaŭ tiu nun malfermiĝas du vojoj.

– Ĉu ne eblas reiri?

– Ne. Ĉi-flanke de la pordo mankas klinko.

Ludoviko terurite rerigardis. Fakte, sur la peza ferpordo videblis nenio. La sekretario viŝis sian ŝvitantan frunton kaj daŭrigis:

– Du vojoj malfermiĝas. Unu ĉirkaŭiras la arbaron, ĝi estas glata kaj gruza, kondukas rekte al la subaĉeta kontoro de s-ro Braunauer. La alia vojo estas la arbaro mem. Nur ĉi dua vojo kondukas sub la liberan ĉielon. Sed vi devas trabarakti ĉi tiun arbaron...

Kun malgaja rideto li montris al la senfunda, malhelverda denso.

– Kaj se mi baraktos tra ĝi? – demandis Ludoviko.

– Tiam vi povos hejmeniri.

– Kaj se mi ne povos transpuŝi min.

– Vi havas la eblon reveni sur la glatan vojon, ĉar ĝis kie vi tranĉos al vi vojon, de tie vi ĉiufoje povos reveni. Kiam la firmao konstruigis ĉi tiun panamajfabrikon, ĝi estigis la arbaron, por rompi per ĝi la lastan, ankoraŭ restintan obstinon en la ĝisvenintaj homoj. Iam antaŭ longe s-ro H.M. Stanley, simpla angla ĵurnalisto transpuŝis sin per tranĉilo, hakilo, ĵurnalista ambicio, per la senindulga kaj konkera sobreco de anglaj vojaĝantoj tra la vera afrika arbarego, kiu pasas laŭ la direkto de la rivero Aruvimi sur la terparto de Kongo al Nilo, kaj kiu estas eĉ pli abunda, pli sovaĝa, pli malhela kaj pli murda ol ĉi tiu. Ĉi tio do estas homa laboro. Se vi estas vere honesta, kaj post tio, kion vi vidis, ankoraŭ plu restis en vi sufiĉa forto, por elekti ne la glatan vojon, kondukantan al feliĉo, sed ĉi tiun arbaron, kondukantan al malfeliĉa malriĉeco, tiam ekvoju. Nia firmao ja eĉ tiam ne rezignos vin, ĉar ĝis nun tiuj esceptuloj, kiuj entreprenis la transbarakton, bele, laŭorde revenis. Sed persvadi vin por ajna vojo mi nun jam ne licas. Eĉ ĉi tie mi jam forlasos vin.

– Ĉu vi forlasos min?

– Jes, tiel, tio estas regulo. En la momento de la fina hezito la viktimo restas sola. Kaj kiun ajn vojon vi elektos, vi sola trairos ĝin. Dio vin helpu!

– Ne, ne... – ekĝemis Ludoviko – ne lasu min ĉi tie!

La sekretario ne respondis. Li paŝis apud la ferpordon kaj malfermis alian, malgrandan pordon, kiun Ludoviko ĝis nun ne rimarkis. Malantaŭ la pordeto estis bela mahagona lifto kun ruĝa, velura sofeto, ŝlifitaj speguloj, elektra lampo kaj subvitre alnajlitaj uzindikoj. Ludoviko volis paroli, sed la pordo frapfermiĝis antaŭ lia nazo, kaj li konkludis el ĉiam pli foriĝanta zumado, ke la lifto leviĝis ien kun la sekretario. Li restis sola ĉe la arbarando, kaj rigardis maldekstren, kie la glata, gruza vojo kondukis laŭ la muro ĝis la angulo de la arbaro, kaj ĉirkaŭirante de tie evidente la arbaron, ĝi tiriĝis laŭ la alia muro tute ĝis la kontoro de Bernardo Braunauer.

Li rigardis antaŭen, en la varmege spirantan, mistike muĝantan, gutantan, pluvmalsekan densegon. Antaŭ li sur la tero kuŝis ĝardenista tranĉilo, segilo kaj akra adzo. La firmao, ŝajnis, ne deziris, ke la honesta homo transbaraktu la arbaron per la nuraj dek ungoj.

– Patrinjo – diris Ludoviko duonlaŭte, kaj sub Patrinjo li komprenis sian edzinon –, Patrinjo, mi pensas pri vi en ĉi tiu momento, kiu estas momento

de hezitado. Pri vi, Patrinjo kaj pri la dek naŭ infanoj. Donu konsilon, montru la vojon!

Li diris, sed en la malhelo venis de nenie ajna optika aŭ akustika fenomeno, pri kiu li povus aserti, ke ili indikas la starpunkton de Patrinjo. Ankoraŭfoje li ekparolis, nun jam pli laŭte kaj senpacience per jenaj vortoj:

– Patrinjo, kion mi faru?

Venis nenia respondo.

– Patrinjo! – blekis Ludoviko ekplorinte en la varmega obskuro –, vi kompatinda, magriĝinta, frue maljuniĝinta Patrinjo, vi iama balreĝino de Buda kun disfama, rondeta, rozeca bebovizaĝo, kiu nun havas pikan, malmolan kaj ruĝan nazon, humidajn kaj blurandajn okulojn, maldensiĝintajn harojn, klinitajn dentojn kaj kies oreloj kun ĉiu jaro disstariĝas je du milimetroj pli... Patrinjo, vi, kiu estas nuraj ostoj, kaj tamen via ventreto estas pli pufa ol viaj mametoj..., Patrinjo, vi magravizaĝa, magrabrusta, magradorsa, magratalia, vi karega, fidela, infaneduka, malgaja kaj serioza Patrinjo, la plej bona kaj la plej valora Patrinjo en la tuta mondo, vi, kiu malbeliĝis pro miaj dek naŭ infanoj kaj unusola honesto, kies jupo malantaŭe estas pli longa ol antaŭe, vi, kiu komencas havi lipharojn super viaj maldikaj kaj rektaj lipoj, vi birdobrusta, timokula, malmulte parolanta, malbone nutrata, anĝelkora Patrinjo de Buda, vi, kiu estas tiel for de la maldikigaj dietoj de la nekomprenataj belulinoj de Budapeŝto kiel la ĉielregno, kie vi alvenos, disde la fetora infero, kie la patrinjoj de premieroj, divorcoj, mallarĝ-jupaj patrinjoj de filharmoniaj koncertoj kuirigis eterne, kiuj pro kruela ideo de Belzebuto ĉiam pli dikiĝos kaj dikiĝos malgraŭ la kuirigo... vi bona Patrinjo, nun diru al mi, kion mi faru!

Respondo ne venis.

Ludoviko hezitis.

LASTA ĈAPITRO

Ludoviko vane vokis la spiriton de sia fidela edzino. Vane li orelumis al la vaporiganta, obskura, haladza arbaro, venis nenia voĉo. Li staris tie forlasita, kaj en ĉi tiu momento li ne sciis, kion fari. Se li elektos la glatan vojon, kondukantan al la kontoro de Bernardo Braunauer, li ne alvenos tie tiel firma, kun tiel pura animo, kia li ekiris. Li teruriĝis, ke la sovaĝa kaj perforta

subaĉetanto facile fiturnos lian kapon, en kiu febre kirliĝis ĉio senescepte, kion li ĝis nun vidis en la terura fabriko. Ĉu li lanĉu sin kontraŭ la vastega kaj netravigebla arbardensigo, por fuĝi en la liberan aeron, de kie li povas eventuale resendi ankaŭ per poŝto la monon al la subaĉetanto? Ĉu li havos sufiĉan forton por tio?

La fabriko estis efektive sagace konstruita. Jen, ĉi tie staris Ludoviko Honest, kaj sen iĝi malhonesta, li estis tiom timigita, ke li ne kuraĝis ekiri sur la glata vojo al la kontoro. Kaj li estis tiom malfortigita, ke li ne sentis en si sufiĉan forton por eskapi per veprohakado.

Dum li tiel staris kaj meditis, li konstatis en si, ke li ne povas rigardi en sian propran animon. Li estis simpla homo, kiu ne multe okupiĝis pri psikologio, kaj kiu ne havis praktikon, por alfronti sin mem en certaj minutoj, por komenci diskuti kun si, li ankoraŭ neniam troviĝis en tia situacio. Ĉiu senlabora, dancema junulo en Budapeŝto kompetentas pri tio, ĉe ĉiu malgranda amo, ĉe ĉiu ĉifona problemeto de la supraĵa te-danca vivo budapeŝta junulo povas sidiĝi sur la rando de sia lito, kaj dum li detiras siajn lakŝuojn, li alfrontas sin mem, faras bilancon, eĉ venas ankaŭ al decido. Ludoviko havis ĝis nun aliajn farendojn en la vivo, ol solvi krizojn. Li staris ĉi tie kiel azenino de Bileamo¹⁰ kaj pensis pri tio, ke se io ne intervenos, starante ĉi tie, li elsekiĝos, kaj post jarmiloj oni trovos lian mumion, apogitan al la muro.

Io tamen intervenis.

Dum li tiel meditis kaj komencis malrapide sekiĝi, el la implikita vepro de la arbaro hometo elŝovis sin. Li estis tiom eta kiel trijara infano, havis malhele ruĝan haŭton, kiun dense trakreskis haroj. Stanley trovis en Avatiko ĉi tiun nanan homrason, pri kies ekzisto Hekataesus sciis jam en 500 antaŭ la naskiĝo de Kristo. La fabriko igis alporti ĉi tiun hometon el Afriko, ne por fari la praarbaron pli laŭstila, sed ĉar estis sciate, ke ĉi tiu nana popolo estas unu el la plej granda danĝero de la ĝangalo, kiu faras eĉ pli malfacila la trapason de la arbaro. Ili batas en la teron palisetojn kun la pintoj supren, kiuj estas venenitaj. Kiu paŝas sur tian lignonajlon, tiu mortas post horo. El frondo, de malantaŭ arbotrunko ili precizege pafas per

¹⁰ Azeno de la biblia Bileamo; ĝi ne volis pluiri, ĉar anĝelo de Dio ekstaris antaŭ ĝi kun glavo, nevideble por Bileamo.

siaj sagoj kun venenita pintoj, kaj kun maŝina precizo ili ĵetas siajn akrajn lancojn en la korpon de siaj malamikoj. Krome ili estas inteligentaj, ruzaj kaj kruelaj. Por tagmanĝo ili konsumas homon, se ili ne havas ion alian.

Ludoviko fikse rigardis la nanon.

– Mi estas la sekretario de la arbaro – diris la nano. – Vi probable vidas en mi arbaran spiriton aŭ arbaran koboldon, sed tio pruvas nur vian mankhavan klerecon. Mi estas ĉi tie sekretario kaj estas pagata, por atentigi la trapasontojn pri la malfacilaĵoj kaj danĝeroj de la vojo. Krome estas ankaŭ mia devo, malkaŝi al vi la sekreton de la arbaro.

– Ni aŭdu! – diris Ludoviko kun iom da espero en la koro.

– La sekreton de la arbaro – vortgalopis la nano –, s-ro Stanley, la persista raportisto divenis. La ŝlosilo de la sekreto estas, ke la arbaro estas nur tiam terura, se oni alrigardas ĝin tutan kaj imagas, ke oni devas superi samtempe ĉiujn obstaklojn. S-ro Stanley transpasis tiel la arbaron, ke li detranĉis aparte ĉiun sarmenton, trasegis aparte ĉiun radikon, trampis manpiede ĉiun kruce kuŝantan arbotrunkon, kaj tiel li venis al la rando de la densego kun multmonata pena laboro. Oni povas ektimi la tutan arbaron, sed unusolan radikon neniel. En s-ro Stanley flegis la esperon, ke kiam li pasis, li neniam rigardis la tutan arbaron, neniam li pensis pri ĝia tuto, sed ĉiufoje li okupiĝis nur pri tiu unusola peco da arbo aŭ branĉo, kiu ĝuste baris al li la vojon. S-ro Stanley mortigis en si intence la emon ĝeneraligi kaj evoluigis la interesiĝon pri la detaloj. Se li estus alfrontinta ĉiuminute la tuton, li senesperigis. Sed ĉar li ĉiam rigardis nur antaŭ siajn piedojn, li gardis sian kuraĝon kaj parolis jene: „Ĉi tiun mizeran radikon elstarantan mi povas superi.” Kaj tiel li superis ĉiun radikon, sarmenton, ŝtonpecon, trunkopecon, ĝis iun belan tagon li rimarkis, ke li transpenetris la plej teruran arbaron de la mondo. Kaj tiam li repensis pri la tuta arbaro. Tiam estis jam permesite okulpreni samtempe la tutan.

– Je honorvorto – ekkriis entuziasme Ludoviko –, se la Di-Sinjoro liberigos min de ĉi tie, mi rakontos ĉion al Vázsonyi.

– Vere – rimarkis la nano –, vi ĝuste agos. Ĉi tiu arbaro estas bonega simbolo por tiuj, kiuj emas batali kontraŭ la koruptoĝangalo. Kaj la de vi menciita eminenta politikisto utiligos bonege la metodon de s-ro Stanley, kiu malkaŝas la eternan sekreton de ĉiuj arbaroj.

– Mi rakontos ĝin al li! – ekkriis feliĉe Ludoviko.

– Bone vi faros malkaŝi ĝin al li – aprobis la nano –, ĉar ĉi tiu publike aganta viro, inter kies ecoj estas unu el plej belaj, ankaŭ en lia matura aĝo, la senĉesa evoluo, faris en la lasta tempo ofte tiajn deklarojn, kiujn li publikigis laste ankaŭ en ĵurnaloj, ke li rigardas kun malĝojo ĉi tiun ĝangalon da koruptoj, kiu baras la vojon al lia laborado. Li ne devas rigardi ĝin kun melankolio, ĉar tio signifas, ke ĉiuminute li rigardas la tuton, kaj se li rigardas la tuton, li devas konsideri sin malforta por tiel granda lukto. La evoluo en sentoj, spertoj, scioj, homkono ne devas konduki tien, ke la samtempa observado de ĉiuj aferoj kaj koneksoj instigu ĉi tiun viron al memkritiko. Tia povas esti la evoluo de scienculo kaj poeto, sed ne de agitisto, batalisto, esplorvojaĝisto. Batalpreta agitisto, al kiu destiniĝis, neniam levi la rigardon alĉiele, sed daŭre okupiĝi pri teraj aferoj: homoj, rilatoj, mil detaletoj de la realo, do tia agitisto devas sekvi la metodon de s-ro Stanley: mallarĝigi sian horizonton, konsideri ĉiun afereton grava, progresi de paŝo al paŝo, de tago al tago, iusence malaltigi industrio la penson, kiu lin ardigas, iom burokratecigi la moralan ideon, por kiu li vivas. Moderna batalisto devas deskui ĉiuhore la poezion de sia metio, ĉar ĝi mortigas, revemigas kaj pigrigas lin. Kiel en la modernaj militoj restis nenio el la tempesta poetiko de la malnovaj bataloj, tiel ankaŭ la laboro de soldato de la moderna publika vivo devas esti senornama, seka, senpoezia, preskaŭ robota. La batalo por moralaj ideoj estas niatage teda, bagatela sed persista laboro, kies heroo levu nur tiam sian kapon, se li retrorigardas. S-ro Stanley estis en la arbaro hakisto, kuiristo, apotekisto, konstruisto, ŝuflikisto, rubisto, vojmezuristo, kokinisto, panisto, kuracisto, remisto, ĉio, nur ne heroo. Sed kiam li revenis en Londonon, kaj reĵetis rigardon de tie al Afriko, li jam povis klare vidi, ke li estis unu el la plej grandaj patruj-okupantoj de la angla mondpotenco, senmorta soldato de la angla ekonomio kaj de la feliĉo de la angla popolo, kaj li estis pli eminenta torĉoportanto de la homaro ol Kristoforo Kolumbo, kiu finsume malkovris Amerikon hazarde, kiel ankaŭ tion, kiel ovo staras fikse sur sia pinto. Stanley kapablis fari tion, ĉar li rekonis: ankoraŭ ne naskiĝis homo, kiu sentus sin sufiĉa alfronti la grandajn fortojn de la mondo. Tio estas: iam naskiĝis unu, sed Li mortis sur kruco, ĉar Li estis ne batalisto sed pensulo. Lian laboron povis efektiviĝi nur homo kiel Sankta Paŭlo, ĉar li aliris la homojn po unu kaj po grupoj. Se Sankta Paŭlo estus vidinta la mondon samtempe

en ĝia tuto kiel Jesuo, tiam ankaŭ li estus fininta sian malĝojan kaj mildan vivon sur la kruco, de kie la vojo kondukas apud Dion. Sed Paŭlo rigardis la detalojn. Paŭlo estis agitanto, Paŭlon senkapigis la soldatoj de la imperiestro. Paŭlo vivis tiel kaj mortis tiel, kiel soldato kaj partiestro, kaj li neni-am sciis, sed ni nun jam scias, ke kristanismon fundamentis li. Kaj de tiam ĉiu sur ĉi tiu tero, kiu iam ekiris kontraŭ Malico aŭ Nekonataĵo, devis re-koni, ke li povas atingi rezulton, nur se li daŭre rigardas la teron. Rigardi alĉiele estas afero de dioj, sed tio necesas nur unufoje en ĉiu dek-mila jaro. Kaj poste tra dek mil jaroj oni povas batali kun honesto por tiu unusola ri-gardo laŭ ĉies propra forto.

Dirinte tion, la nano malaperis. Lin glutis la densa vepro de la malhela arbaro. Kaj el la terura profundo estiĝis muĝanta, varmega vento.

Ludoviko ne plu hezitis. Senvorte li klinis sin, prenis la ĝardenistan tond-ilon, la segilon kaj komencis forigi la unuan radikon.

* * *

Li vekigis.

– Maltrankvile vi dormis – diris apude lia edzino. – Ĉu vi eble sonĝis ion malbonan?

– Kioma horo estas? – demandis Ludoviko, dum li viŝis la okulojn per la maniko de sia dormoĉemizo.

– Nun krepuskas – respondis la edzino –, devas esti la kvara horo... dor-mu, Paĉjo!

– Jes – diris Ludoviko –, pro tiuj mizeraj sesdek kronoj mi ne povis tran-kvile dormi.

– Sed vi ja diris, ke vi reportos ilin al s-ro Braunauer!

– Ne, ne – ekkriis Ludoviko –, mi ne reportos sed resendos ilin. Matene, apenaŭ la poŝtofiĉejo malfermiĝos, mi resendos ilin per poŝtmandato. Mi ne volas vidi lin.

Patrinjo eksuspiris.

– Jes – diris Ludoviko, nun jam iom trankviliĝinte –, mi ne povas ripari la tutan mondon, mi povas fari nur tiom, kiom mi kapablas. Mi resendos la sesdek kronojn kaj per tio mi almenaŭ tranĉos etan radikpecon.

– Ĉu radikpecon? – demandis Patrinjo surprizite.

– Vi ne komprenas tion, kara mia – diris suspirante Ludoviko Honest –, vi ankaŭ ne povas kompreni. Tiel multaj ni estas, tiel multege multaj ni estas... kaj se ĉiu el ni fortranĉos nur unusolan radiketon aŭ vergeton, la arbaro heliĝos kaj ni povos transpasi ĝin... kaj kiuj venos post ni, trovos vojon...

Patrinjo sidiĝis en sia lito:

– Vi parolas konfuze, Ludoviko. Vi sonĝis ion malbonan. Se mi ne estus vidinta, ke vi disdonis vian tutan vespermanĝon inter la infanoj, mi devus kredi, ke vi troŝarĝis vian stomakon, ke vi manĝis tro multe.

Ludoviko ridetis:

– Ĉu mi manĝis multe? Anĝela Patrinjo, diru, kiam mi manĝis multe en mia vivo?

Patrinjo respondis mallaŭte:

– Neniam.

Ekstere krepuskis. Laktoĉaroj klakadis preter la domo. Ludoviko returnis sin kaj silente, dolĉe endormiĝis. Patrinjo ellitiĝis, kovris siajn dek naŭ infanojn, elprenis la pugneton el la buŝo de la plej malgranda, por ke ĝi ne sufokiĝu, poste regrimpis en la liton kaj ankoraŭ longe vigilis super Ludoviko rigardante, ĉu ankaŭ nun li havas maltrankvilan dormon. Post kiam ŝi vidis, ke lia edzo dormas senmove, profunde kaj spiras regule, ŝi kisis lin, kaj ankaŭ ŝi kuŝiĝis. Sed kiam ŝi kisis lin, ŝi sentis, ke varma kaj sala larmomo fluas tra la vizaĝo de la dormanto. Unue ŝi hezitis por momento, ĉu ŝi veku lin, tamen ŝi lasis lin plu dormi.

– Nu, estas egale – ŝi diris en si, dum ŝi klinis la angulon de la kuseno sub sian vizaĝon –, matene je la oka, kiam oni malfermos la poŝtoficejon, lia trankvilo revenos, ree ĉio estos en ordo. Morgaŭ li jam ne ploros dumdorme.

Kun tio ŝi eligis suspiron kaj ankaŭ ŝi dormiĝis en la blueca krepuskiĝo.

MANLIBRETO DE LA BUDAPEŝTA KLAĈO

por komencantoj en mallonga kaj trarigarda resumo,
ilustrita per ekzemploj
Unua eldono, Budapeŝto 1916

ENKONDUKO

Ĉi tiun mallongan laboraĵon mi publikigas, por doni fideblan gvidfadenon en la manon de tiuj, kiuj ankoraŭ ne sentas sin tute certaj sur la kampo de klaĉoj. Sen malmodesto mi notas, ke mi havas unu el la plej kompletaj klaĉaroj de Eŭropo, kaj dum la aranĝado de ĉi tiu riĉa kolekto lanĉiĝis en mi la ideo: redakti simplan, en popoleca lingvaĵo skribitan manlibron por tiuj, kiuj havas inklinon al ĉi tiu sciencobranĉo, kaj pro siaj ceteraj okupoj ili ne povas studi la rilatajn elstarajn faklaboraĵojn.

La aŭtoro

UNUA ĈAPITRO

Celo de klaĉo. Pli gravaj bezonaĵoj de klaĉo

La celo de klaĉo, kompreneta en pli alta arta senco, estas malpligrandigi iun per ĝi. Ni devas teni en vido, ke ju pli da homoj ni premas sub akvon per klaĉoj, des pli alta iĝas nia valoro. Pri ju pli da homoj ni disvastigas malicajn kaj humiligajn onidirojn, des malpli multope ni restas, kaj des pli ni elstariĝas inter la ceteraj homoj. Sekve ĉiu klaĉo estas maltaŭga klaĉo, kiu estas flata por alia homo.

Ekzemplo: „La bela s-ino Burmányi havas amrilaton kun d-ro Ede Rakamazovits.” Ĉi tiu estas netaŭga klaĉo, ĉar kvankam ĝi kalumnias la belan s-inon Burmányi, kaj kvankam humiligas lian edzon Burmányi, ĝi flatas d-ron Ede Rakamazovits.

Male: „La bela s-ino Burmányi havas amrilaton kun d-ro Ede Rakamazovits, sed Rakamazovits akceptas monon de ŝi” estas bona klaĉo, ĉar en ĝi ĉiuj estas premitaj sub akvon.

La sama klaĉo proksimas esti perfekta en la sekva varianto: „La bela s-ino Burmányi havas amrilaton kun d-ro Ede Rakamazovits, sed Rakamazovits akceptas monon de ŝi, Burmányi scias tion, kaj retro-eltrudas la monon de Rakamazovits, sed la tuta klaĉo originas de Csákóberger, kiun la bela s-ino Burmányi apogas per mono.”

Kiel videblas el ĉi tiu ekzemplo, klaĉo estas ne simpla kalumnio, kiel sen-sciuloj kredas, sed tiu pli alta kaj pli kunmetita speco de kalumnioj, kies komponentoj interplektiĝas kaj plifortigas sin reciproke. Ĝia matematika formulo estas, se ni signas klaĉon per Kl kaj kalumnion per Ka: $Kl = Ka (Ka + Ka) + Ka (Ka + Ka) \dots \infty$

Kie ∞ indikas malfiniecon.

Sed tio jam apartenas al pli altgrada klaĉologio, kaj mian apartan teorion rilatan mi eksplikos en oportuna okazo en mia traktaĵo „Pri la proprajoj de derivitaj klaĉfunkcioj”.

Ĉi tie ni parolu portempe pri la ĉefaj bezonaĵoj de la simpla klaĉo. La simpla klaĉo:

1) estu malica. Krom la simpla malbonvolo estu en ĝi ia ideo, ia sagaca ruĵo, do elemento, kiu atestas pli altan spiritan laboron. Malbona ekzemplo: „A ŝtelis la horloĝon de B”. Bona ekzemplo: „A ŝtelis la horloĝon de B, kiun B heredis de sia forpasinta patrino kaj konfidis ĝin al A por konservi.”

2) Ĝi estu gluiĝa. Estu en ĝi io, pro kio ĝi kroĉiĝu al la koncernato, gluiĝu al li, ĝi ne estu deskuebla. Do ĝi kroĉpendu sur tia eco, kiu frapas la okulojn, pri kiu ofte oni parolas, ĉar tiel pli facile ĝi trafas al ĉiu en la menson. Ekzemple estas donita A, kiu havas belan edzinon kaj havas cikatron sur la frunto. Nun estus malbona klaĉo aserti pri A, ke „li fariĝis prokuristo, ĉar lia edzino donis sin al la ĝenerala direktoro”. Bona klaĉo estas ĉi-okaze: „A havas cikatron sur la frunto, ĉar foje li kaptis sian edzinon ĉe amorado kun la ĝenerala direktoro, kaj tiu ĵetis glason kontraŭ lian frunton, kaj kompanse de la vundiĝo la ĝenerala direktoro promociis lin al prokuroro”. Ĉe la antaŭa, malbona ekzemplo la homoj facile forgesas la aferon, ja tiom da edzoj povas ŝuldi sian karieron al sia edzino. Sed lastokaze kiomfoje nur A demetas sian ĉapelon, al ĉiu saltas en la kapon la klaĉo pri la cika-

tro, kaj ĝi restas glutita sur li tiel longe, dum la la cikatro restas sur lia frunto, do ĝis la fino de lia vivo.

3) Ĝi estu danĝera. Pli precize por tiu, kiu rakontas ĝin. Klaĉo, kiu reveninte al la viktimo, ne kaŭzas pli grandan malfeliĉon, ne interesas la homojn. La vere bona klaĉo imponas tial, ĉar kiu rakontas ĝin, alprenas certan riskon. Do tio, ke „f-ino X vivas frivolan vivon” ne estas bona klaĉo, ĉar se f-ino X ekscias, ke tion oni rakontas pri ŝi, maksimume ŝi ploras la tutan posttagmezon, alia malfeliĉo ne trafas ŝin. Male la bona klaĉo estas tia, ke „la edzino de la husarkapitano X, la fama spadistaĉo vivas frivolan vivon”. Ĉar kiu rakontas tion, elmetas sin al la reago de la husarkapitano X. Ĉi tiu bezonaĵo gravas el la vidpunkto de la kredebleco de la klaĉo, ĉar oni pensas tiel, ke „devas esti io vera en la klaĉo, ĉar pri la edzino de tiel batalema husarkapitano oni ne volonte diras ion tian”.

4) Ĝi estu aŭdaca. Mi volas diri, aŭdaca, neatendita, surpriza en sia komponiteco. Rakonti pri publike konata fraŭdisto, ke hieraŭ li ree akceptis monon de akvotubista firmao, estas malbona klaĉo. Bona klaĉo estas diri la samon pri homo, pri kiu oni ĝenerale scias, ke li estas honesta. La klaĉo bezonas ĉi tiun trajton, por ke oni entute ĝisaŭskultu ĝin, por ke oni kaptigu per ĉi tiu hoko. La samon ni povas esprimi ankaŭ tiel: esenca bezonaĵo de bona klaĉo estas, ke ĝi kontraŭdiru al la ĝenerala kono.

5) Ĝi havu ĉiufoje rilaton al la kriminala kodo. Tio donas aromon al la klaĉo, sen ĝi la klaĉo estas senspica. La viktimo estu ĉiufoje tiel metita en la klaĉon, ke ĉe ties vereco la leĝo metu sur lin sian manon, se ne pro alia kaŭzo, do pro paragrafo pri adulto.

6) Ĝi estu ekskluziva. Tio signifas, ke ĝi ne aperu en multaj ekzempleroj. Vere bona klaĉulo ne trakuras la kafejojn kun unu kaj sama klaĉo, ĉar se du homoj renkontiĝas, kiuj ambaŭ de li aŭdis ĝin, tuj finiĝas ĝia sensacio kaj ili diros: „X ĉirkaŭkuras kaj disvastigas ĉi tiun famon”. Tion oni ne ŝatas. Vera klaĉulo rakontas klaĉon pleje al du aŭ tri personoj, kaj atendas, ke tiuj tri pludonu ĝin al naŭ, tiuj naŭ al dudek sep, tiuj dudek sep al okdek unu. Vera klaĉulo ne estas senpacienca kaj ne kuras al ĉi tiuj okdek unu, ĉar li scias, ke klaĉo laŭ sia plurobliĝa maniero ankaŭ sen tio disvastiĝas, eĉ cizeliĝas, fariĝas pli perfekta, pli sagaca, pli damaĝa tra la multaj diversaj buŝoj, eĉ en la lasta buŝo ĝi tiom ŝanĝiĝas, ke ĝia aŭtoro povas aserti pri ĝi kuraĝe: „tion mi ne diris, honorvorto, mi nur diris tion, ke...” ktp.

Veraj, elstaraj klaĉuloj ĉi-kampe estas fideluloj de la tiel nomata „solula sistemo”, ili rakontas la klaĉon nur al unu persono, sed tiun personon ili kompreneble zorge elektas. Ĉi tiu punkto gravas, ĉar komencaj klaĉuloj plej ofte falas en ĉi tiun eraron kaj tial perdas sian krediton. Klaĉo estas en ĉi tiu koncerno tia, kiel sporto: oni ŝatas kaj aprezas nur ĝiajn amatorojn, ne ĝiajn profesiulojn.

7) Ĝi havu moralan bazon. Tio ja aŭdiĝas surprize, sed ja estas tiel. Oni devas prezenti eĉ la plej malican klaĉon, kvazaŭ oni estus tre skandalita aŭ pro la fakto mem aŭ pro tio, ke „oni parolas ion tian pri tiu brava, honesta virino!” Vera, klasike bona klaĉulo aperas ĉiam en la kostumo de klaĉabomenulo, enkondukas ĉiun vere malican klaĉon jene: „estas tamen indignige, kiel malicaj estas la homoj, imagu, oni aŭdacas aserti pri ĉi tiu brava, anĝela, honesta s-ino Görredőnyi, ke pro veto ŝi iĝis foje amatino de naŭ poŝtoficistoj.” Ĉi tie la morala bazo estas la indigno. Se li ankoraŭ aldonas, ke „Mi, de mia flanko eĉ vorton ne kredas el la tuto”, tiam li havas ne nur moralan bazon sed eĉ moralan altecon. Komenci starante sur morala bazo, fini leviĝinte sur moralan piedestalon, jen kio estas la plej efika prezenta tekniko de vere malica klaĉo, kiu ĉiam pruvigas taŭga, ĉar la klaĉo estas ja tiel bona, ke ĝi eĉ tiun forpuŝas de si, kiu rakontas ĝin.

DUA ĈAPITRO

Diversaj specoj de klaĉo

Laŭ provincoj la specoj de klaĉo ŝanĝiĝas. Ĉiujn eblajn klaĉospecojn mi konigos en oportuna okazo en mia *Resuma internacia klaĉologio*. Ĉi tiu gvidlibro, okupiĝante nur pri budapeŝtaj rilatoj, limiĝas nur al kvar ĉefspecoj de la budapeŝtaj klaĉoj. Ĉi tiuj estas:

- 1) familia klaĉo
- 2) pri-ama klaĉo
- 3) negoca klaĉo
- 4) teatra klaĉo (kiu ampleksas ankaŭ la familian, pri-aman kaj negocan klaĉojn, tial laŭ kelkaj esploristoj ĝi nomeblas ankaŭ baza aŭ patrina klaĉo).

Mallonga karakterizo de la unuopaj specoj:

1) La celo de la familia klaĉo estas prezenti la morale malpuran vivon de familio. La patro batas siajn infanojn kaj edzinon. La edzino estas malfidela virino kaj malbona patrino. La infanoj estas miskondutaj. La patro ne donas monon. La patrino akiras monon laŭ malpermesitaj vojoj. La infanoj falsas bilojn. La gepatroj divorcas.

2) La celo de pri-ama klaĉo estas malkovri malpermesitajn rilatojn. Do edzinigita virino kokras sian edzon. Edzigita viro tenas amatinon. Edzigito havas amrilaton kun edzinigito. Iu kokras tiun, kun kiu li aŭ ŝi havas amrilaton kun tiu, kun kiu li aŭ ŝi ne havas amrilaton. La rilatojn la pri-ama klaĉo kaptas nur ĉe ilia komenco aŭ fino. „Ili estas kune” – tio ne estas klaĉo. Ili kuniĝas kaj rompas la rilaton. Nur ĉe ĉi tiuj punktoj estas klaĉo vera klaĉo.

3) La negoca klaĉo okupiĝas ekskluzive pri la malpliigo de la kreditkapablo de la viktimo, kaj ĉi tien apartenas ankaŭ la arta klaĉo, kiu nomas sentalenta sian viktimon, por malbonigi ties krediton.

4) La teatra, baza aŭ patrina klaĉo ampleksas ĉion. Ĝiaj plej gravaj principoj: Aktorinoj estas frivolaj. Aktoroj estas sentalentaj. Edzinigita aktorino kokras sian edzon. Fraŭlino aktorino havas sekrete du infanojn (neniam unu). Maljuna aktoro elpumpas monon. Juna aktoro elpumpas monon. Aŭtoro havas amrilaton. Aŭtoro estas sentalenta. La aferoj de direktoro malprogresas. Direktoro estas sentalenta. Direktoro havas amrilaton kun aktorino. La spektejo estas malplena. La spektejo estas plena sed de donacbiletoj. Teatraĵo estas malbona. Teatraĵo estas bona, sed oni ne prezentas ĝin. Aŭtoro pagas, por ke oni prezentu lian teatraĵon. Aktorino havas amrilaton, por ricevi rolon. Muziko estas ŝtelita. Reĝisoro ne komprenas la teatraĵon. Sufloro estis enprizonigita. Direktoro ŝanceliĝas ĉe rando de bankroto. Teatraĵo estas verkita de aliulo. Aktoro ŝtelis nuancojn de alia aktoro. Agento trompas. Teatraĵo falis eksterlande. Aktoro divorcas. Aktorino divorcas. Aŭtoro divorcas. Direktoro divorcas. Reĝisoro divorcas. Sekretario edziĝos.

FINO

La tutmonde spertebla strebo popularigi sciencojn donis la plumon en mian manon, por ke mi plenumu la bazan laboron sur la tereno de ĉi tiu neglektata sciencobranĉo. Kiu legas ĉi tiun verketon kun atento, tiu baldaŭ

komprenos kaj ekŝatos ĉi tiun fakon. Aparte mi rekomendas mian gvidlibron al la loĝantaro, veninta el provinco, kiu ne tro konas la diferencon inter provincaj kaj ĉefurbaj klaĉoj. Kompreneble, neniuj kredas, ke per ĉi tiu verko la tuta materialo estas elĉerpita. Ĝi celis esti nur modesta antaŭparolo por miaj, ĉe oportuna okazo, publikigitaj verkoj *Enkonduko al supergrada klaĉologio* kaj *Kompleta supergrada klaĉologio*.

UNU ANEKDOTO KAJ UNU PARABOLO

Ambaŭ mi rekomendas por la atento de tiu nekonata viro, kiu serĉfosante post cent jaroj en la biblioteko de Nacia Muzeo hazarde malfermos ĉi tiun paĝon de la volumo. Lia rigardo haltu por minuto sur ĉi tiu, tiam jam bruniĝinta papero kaj legu ĉi tiujn modestajn liniojn. Hodiaŭ ili eble ne estas tiel amuzaj kaj interesaj, ol tiam ili estos. Li akceptu de ĉi tie, el la fora pasinteco, ankaŭ nekonata, mian afablan kaj malĝojan saluton.

LA ANEKDOTO

Ĉi tiu historio estas prenita el la advokata praktiko de Vilmos Vázsonyi, sed inda loko por ĝi estus tiu centvoluma granda faklaboraĵo, kies titolo estas *Moralhistorio de Budapeŝto*, kaj kiun mi neniam verkos. Ĝia amplekso en la faklaboro etendiĝus al tri volumoj, sed nun pro la mallongeco de la tempo kaj manko de sufiĉa spaco mi klopodas mallonge prezenti ĝin.

Unu antaŭtagmezon alarma sonorado elŝiras Vázsonyi el sia antaŭtagmeza legado. Oni alportas la vizitkarton de negocisto, li volas paroli en tre grava kaj neprokrastebla afero kun la s-ro deputito. Oni enlasas lin kaj post li tumultas du damoj: lia edzino kaj lia filino. En la sekvaj minutoj ĉiuj tri genuas antaŭ Vázsonyi, el kio li tuj konstatas, ke li estos konsultata ne kiel politikisto, nek kiel gvida personeco de la magistrato sed kiel kriminala advokato. Ĉi tiun baletgeston la budapeŝtaj kriminalaj advokatoj jam konas kaj al kutimiĝis. Ĉiu granda kriminala afero komenciĝas per ĝi kaj per la alvoko „pro Dio, s-ro advokato, savu min!”

Post kelka lukto la malesperiĝinta familio stariĝas kaj okupas lokon en la foteloj.

– Per kio mi povas servi? – demandas Vázsonyi.

– Pro Dio, s-ro deputito – diras plorskuate la edzino –, savu mian edzon!

Post novaj ploratakoj la pala viro prezentas sian malfeliĉon.

– Sinjoro – li rakontas –, la pasintan semajnon oni priaŭskultis min kiel atestanton en la policejo en afero, al kiu mi havas nenian rilaton. Mi diris,

kion malmultan mi sciis, kaj poste hejmeniris. Kaj hodiaŭ matene aperis ĉe mi policisto kaj alportis ĉi tiun asignon.

Li transdonas folion. Ĝi estas normala polica asigna letero, en kiu la adresato estas petata aperi hodiaŭ antaŭtagmeze je la dek-unua horo ĉe la ĉefdetektivo Krecsányi. Nenio plia videblas en ĝi.

– Nu? – demandas Vázsonyi.

– Kiel? – miras la negocisto. – Kio estas tiu „nu”? Por la dek-unua hodiaŭ antaŭtagmeze mi estas asignita al la ĉefdetektivo!

– Pro Dio – plorsingultas la damo –, s-ro deputito, savu mian edzon! Nur vi povas helpi lin...

Vázsonyi rigardas de unu al alia, ne komprenas ilin. La negocisto komencas balbuti:

– Mi petas vin – li diras –, vi devas veni kun mi. Kiel advokato. Mi pagos la advokatan honorarion. Se mi ne ofendas vin, mi donos al vi cent kronojn por ĉi via vojo.

– Ĉu cent kronojn aŭ dek kronojn – respondas Vázsonyi –, tio min nun ne interesas, prefere rakontu sincere, kion vi misfaris, lasu min scii, pri kio temas.

La homo hezitas-evitas:

– Ja se mi scius, kial oni asignis min! Sed mi ne scias. Neniam mi faris ajnon kontraŭleĝan, sed bonvolu scii, ke mi estas financa agento, faras transakciojn, makleras kaj... vi scias... Dio scias... oni povas neniam scii...

Li tremas kiel aŭtuna folio.

– Sed se tiel, kial mi iru kun vi? – demandas Vázsonyi.

La edzino respondas:

– Dio mia, ĉar eble oni retenos lin.

– Ŝi eldiris – lasas elgliti la edzo kun plifaciliĝo kaj eksuspiras. La filino silente ploretas sur angulo de la sofo dum la tuta tempo.

Vázsonyi levas la ŝultrojn, tio estas ja finfine advokata devo, kaj donas instrukcion al la servistino voki fiakron.

– Du! – intermetas la kliento.

– Kial?

– Unu al ni, la alian por mia familio.

– Ĉu do ankaŭ la damoj venos?

– Jes.

– Kial?

La kliento silentas. Ree la edzino respondas anstataŭ li:

– Por ke... Dio scias... Dio ne permesu... eble tamen li devus resti tie... por ke ni povu tuj sendi al li litaĵon por la nokto... kaj kio necesas...

Ĝenerala skuplorado. La veturiloj alvenas, kaj la procesio ekveturas al la konstruaĵo de la ĉefpolico. En la unua fiakro sidas la kliento mortpala tremante, apud li Vázsonyi, senvorte fumante cigaron. En la dua fiakro veturas la du damoj kun ploruĝaj okuloj, kvazaŭ ili revenus de sepulto. En la strato Zrínyi la damoj restas malsupre, en la fiakro. La patro adiaŭas ilin, kun vireca decidemo kisas ilin kaj alsupras kun Vázsonyi al la omena oficejo de la ĉefdetektivo en la dua etaĝo. La policisto, staranta ĉe la ĉefenirejo, indiferece rigardas la plorantajn damojn. Ion tian li sufiĉe vidas ĉiutage.

Supre en la antaŭĉambro la kliento diras:

– Mi petas vin, s-ro deputito, estos pli bone, se ni ne eniros kune. Eble vi sola eniru unue, por ekscii, kion oni volas de mi. Mi nur poste eniros, se mi jam informiĝis, pri kio temas.

Bone. Vázsonyi eniras sola. Krecsányi akceptas lin afable, kaj Vázsonyi tuj aliras la temon.

– Vidu – li komencas –, mia certa kliento estas asignita por la dek-unua al via konsilista moŝto. Kiel lia advokato mi interesiĝas kun respekto, kial?

– Ĉu ankaŭ li estas ĉi tie? – demandas la ĉefdetektivo.

– Jes. Li atendas ekstere.

– Ĉu vin kiel sian advokaton li kunprenis?

– Jes.

– Do bone – diras Krecsányi kaj levas la brovojn –, antaŭ ol malkaŝi al la s-ro advokato la kaŭzon de la asigno kaj tion, kian intencon la polico havas kun tiu sinjoro, permesu unue diskuti kun vi unu mian privatan afereton.

Kaj je granda surprizo de Vázsonyi li komencas paroli al li pri somerdomaro en la ĉirkaŭaĵo, kiu ne havas kanalizon, ĝia prilumado estas malbona kaj la stratoj estas nepavimitaj.

– Sed bonvolu...

– Mi petas vin, bonvolu kompreni – diris Krecsányi ridetante –, ke mi havas tiom da farendoj, ke mi ne havas tempon viziti la estrojn de la ĉefurbo en ĉi tiu afero kaj mi ĝojas, ke la hazardo nun venigis antaŭ min Vilmos Vázsonyi, kiu konsideros konvene la plendojn de nia somerdomaro.

– Sed mia kliento, kiu atendas ekstere...

– Li atendu...

Kaj li parolas plu pri la somerdoma kvartalo. Pasas dek minutoj, dudek minutoj, duonhoron. La kliento elŝvitas en la antaŭĉambro kaj varmon kaj malvarmon. Vázsonyi nerveze ĝeniĝas sur sia seĝo. Fine Krecsányi ĉesas prezenti la plendojn. Vázsonyi ekparolas:

– Sed nun, se vi permesas, ni transiru al mia kliento. Kial vi igis asigni lin? Krecsányi ekridetas.

– Bonvolu kompreni min – li diras –, ne senkaŭze mi parolis al la s-ro deputito duonhoron pri alio. Mi volis, ke via kliento sidu, atendu en la antaŭĉambro almenaŭ duonhoron. Vian klienton mi priaŭskultis nome pasintsemajne kiel atestanton. Tiam la sinjoro forgesis ĉi tie sian ombrelon. Mi ne volas reteni ĝin kaj mi ne estas devigita liveri ĝin al lia loĝejo. Mi do simple asignis lin por hodiaŭ, por ke li rehavu sian ombrelon.

– ...

– Kaj tiu negocisto, kiu tiom ektimas asignon, ke li ne kuraĝas veni sola al la policejo, sed kunprenas la unuan advokaton de la lando, tiu meritas en

la nomo de la morala mondordo almenaŭ tiom, ke li tremu duonhoron en la antaŭĉambro de la ĉefdetektivo.

Vázsonyi elportas al li la ombrelon.

– Jen ĝi – li diras –, vi forgesis ĉi tie vian ombrelon, tial vi estis asignita. Se vi havus ceteran malfeliĉon, vi pagus la kutiman advokatan honorarion. Sed tiel, mi petas vin, bonvolu sendi akurate posttagmeze al mia oficejo la promesitajn cent kronojn. Dio benu vin!

Kaj li lasas lin stari mirigita. Kiam li desupras, la damoj daŭre plu ploretas en la fiakro. Ili eĉ ne rimarkas, kiam Vázsonyi, singarde preterpasinte ilin, saltas en tramon.

Nenio cetera okazis.

LA PARABOLO

Organoj de la gazetaro, aŭ kiel en Budapeŝto oni diras: „ĉiuj gazetoj” okupiĝis pri la kazo de tiu skolteto, kiu estis trovita ĉe stratangulo, dum li plorante petis policanon, ke tiu orientu lin, ĉar li mem ne retrovas la vojon hejmen. Kiel sciate – kvankam mi scias nur de unu monato –, unu el la celoj de la institucio skoltaro estas, eduki tiajn knabojn, kiujn fremduloj, trafintaj ĉi tien el eksterlando, tuj rekonu je lia internacia uniformo, kaj kiuj orientu, ĉiĉeronu fremdulojn en la urbo. Estas pli ol memkompreneble, ke skolto ne ĉie orientiĝas en Budapeŝto; se li ekzemple ne scias, kie troviĝas la preĝejo Matiaso aŭ la Centra Desinfekta Instituto, tamen jes ja estas nacia katastrofo, se evidentiĝas pri li, ke li ne scias eĉ, kie li loĝas.

Ĉi tiun tipan someran sensacion mi nomas parabolo, ĉar mi memoras ĝin preskaŭ ekskluzive pro tiu nekonata viro, kiun mi havis la feliĉon mencii en la enkonduko de ĉi tiu artikolo, kaj kiu ĉi-momente ankoraŭ eĉ ne estas naskita. Ĉi tiu kazo estas por ni nur senkulpa ŝerco kaj somera temo, sed por li, kiu post cent jaroj retrorigardos al ni, ĝi estos eble ŝlosilo por multaj aferoj, kiujn li ne tuj komprenos dum siaj historiaj esploroj. Tial mi, tiutempe jam polvo kaj cindro, kuraĝas atentigi lin kun konvena humilo pri jeno:

Niatempe en Hungario kaj aparte en Budapeŝto tre multaj aferoj ne estis tio, kio oni baptis ilin. Niatempe ĉiujare ni transprenis nomojn de kvin ĝis ses aferoj el eksterlando, nur por tio, ke konservante precize ilian ekster-

aĵon, interne ni faru el ili ion tute alian. Mi ne ŝatas ĉiam rajdi la temon pri la polico, sed ekzemple sub ĉi tiu nomo estis kaŝita niatempe io tia, kio havis pure politikan celon, kaj oni provizis talentajn homojn kaj zorge instruitajn hungarajn fraŭlojn per la farendoj de kolonia militoficejo, kaj pretere konfidis al ili ankaŭ tion, kion eksterlande al policoj taskas fari. Niatempe oni transprenis la eksteraĵojn de la junulara karaktereduka, korpoharda, sanpliboniga kaj infannobliga institucio, pruviĝinta eksterlande elstare taŭga, do la buran ĉapelon kun rimeno, la higienan flanelĉemizon kun lana koltuko, la genupantalono, la triv-imunajn ŝuojn kaj montgrimpistan bastonon, oni tradukis – sufiĉe lerte – la anglan vorton al „skolto”, kaj el la origina institucio oni faris baze tiom da diversaj institucioj, ke de tio ĉiuj haroj eĉ de kalvulo hirtiĝas alĉiele, tiajn instituci-imitaĵojn, kiuj tiom diferencas de sia originalo kiel dek-taga ostro de dek-jara elefanto. Estimata kaj afabla nekonato, permesu al mi plendi de ĉi tie, el la pasinteco, el ĉi tiu malgaja jaro mil-naŭcent-dek-tria, ke ni havas ĉi-momente almenaŭ cent tiajn instituciojn sur la florantaj kampoj de ĉi tiu patrujo, ĝuste kiam hantas nin ĥolero, kaj ĝuste kiam funkcias tiaj „publikhigienaj inspektoj”, kaj ĝuste kiam okazas tiaj „disponoj”, kiuj ĝuste tiel lerte estas tradukitaj el la angla aŭ la germana kiel la nomo de skoltoj, kaj kiuj ĝuste tiom rilatas al sia origina signifo kiel la budapeŝta skolteto, ne retrovinta la vojon hejmen, al la ĉiĉeronanta *boy-scout*. Estimata posteulo, kredu al mi, ke tio estas kelkfoje malesperiga. Kredu al mi, oni simple malesperiĝas pensante pri rapidtraĵo, tradukita tiel trafe el *Schnellzug*, kiam ĝi tiel limakas pro la damnitaj konstruadoj kiel en la patrujo de *Schnellzug* ajna *Personenzug*, do simpla pasaĝertraĵo. Kredu al mi, ke ĉi tie oni nomas Ŝakhejmo kaj Ŝakasocio tiujn lokojn, de kie oni ofendite elĵetas tiujn, kiu aŭdacas ŝakludi, ĉar tie oni devas ne ŝakludi sed mokludi ŝakon, kredu al mi, ke ĉi tie oni nomas publika kritiko (*Kritik, critique*) tion, ke unu volas elpuŝi alian el la potenco pro tio, ĉar unu volas sidiĝi en ĝi anstataŭ la alia; kredu, ke ĉi tie milionulo estas tiu, kiu havas proprietajon de cent ĝis cent kvindek mil kronoj; kredu tion, ĉar tiel statas preskaŭ ĉio tutfronte. Kaj kredu al mi, ke kiel ete okulfrapa, kiel pitanima kaj magra ŝerceto estis la kazo de la profesia ĉiĉerono, ne trovanta la vojon hejmen en Budapeŝto en la jaro mil-naŭcent-dek-tria, tiel karakteriza ĝi estis por ĉi tiu pigra kaj supraĵa publika vivo, benita per elstara tradukista talento, sed havanta fobion kontraŭ la respekto de ĉiu vera interna enhavo.

DIMANĈE POSTTAGMEZE

Estimata Sinjoro!

Antaŭ nelonge vi facilanime demandis min, kiel ni pasigas ĉi tie en Danubo-ie la dimanĉajn posttagmezojn. Homon, veturintan ĉi tien el Budapeŝto tri kvaronojn da horoj for de la ĉefurbo por somerumi, vi ne povus demandi pri io pli agaca. Kiam vi demandis min, mi respondis per malgaja mangesto. Vi eĉ ne rimarkis, kiom da agaco enhavis ĉi tiu movo. Sed nun mi punos vin pro via scivolo kaj respondas al via demando. Krome-krone sincere. Por la pli bona travidebleco mi iros laŭvice tra la dimanĉ-postagmezaj horoj. Vi budapeŝtanoj povu vidi, kia plezuro estas somerumi en la najbaraĵo.

LA TRIA HORO

Post tagmanĝo mi kutimas iom somnoli. Ni tagmanĝas je la dua, kaj dum mi trenas min al la kanapo, iĝas la dua kaj duono. Nia somerdomo estas dek minutojn for de la fervojo, do ĉirkaŭ la tria alvenas la unua gasto, ke li damniĝu per ĉiuj malbenoj de la ĉielo! La plej terura inter tiaj gastoj estas onklo Schmiri, kiu venas kun malgranda retosako kaj aspektas ĉiufoje, kvazaŭ li portus ion, sed ankoraŭ neniam li portis ion. En la retosaketo sidas liaj ĉapo kaj noktoĉemizo por la eventualo, se li malfruus la lastan trajnon. Kompreneble, kiu alvenas je la tria, tiu alarmas min el mia somnolo. Mi malŝatas onklon Schmiri pro tio, ke li apartenas al tiuj teruraj homoj, kiuj kun morala supereco vekas onin el la plej dolĉa dormo, kiuj krimas ĉi tiun impertinentaĵon en la nomo de porsanaj aŭ ceteraj bonintencaj reguloj. Ekzemple: „Ne nenifaraĉu, vi dikiĝos!”, aŭ „Ellitiĝu, alie vi ne povos dormi nokte!”, aŭ „Vi ŝimas ĉi tie, anstataŭ promeni en la ĝardeno”. Eĉ pli terura estas onklo Rőcze, kiu apartenas al la ordeno de tiuj, kiuj vekas onin per citaĵoj el ĉiuj lingvoj; tiaj animaloj troviĝas tre multaj en la mondo. Kiam mi dormas plej dolĉe, li alblekas min: „Ek do, ek, bravuloj, al batalo!” aŭ ŝerce: „Leviĝu de viaj kusenoj, doktorino Pókai!”, dum li tiras la kusenon el sub mia kapo. Germane: „*Auf, auf, ihr muntere Gesellen!*”, france: „*Allons enfants de la patrie!*”, itale: „*Andiamo, kompano!*” ktp. Ĵetu sur min la unuan ŝtonon, kiu ankoraŭ neniam volis mortpafi tian ri-

kanantan homon, kiu vekas nin per ŝercaj versoj. Jen tio estas, estimata sinjoro, kion mi ricevas donace dimanĉe posttagmeze je la tria horo de semajno al semajno, dum la tuta somero.

LA KVARA HORO

Je la kvara venas onklino Hermin, nia malriĉa parencino por malnovaj vestaĵoj kaj por ricevi kafon. Ŝi venas dimanĉe pro tio, ke tiam restadas ĉe ni multaj gastoj, kaj ĉar ŝi scias, ke tiafoje ŝi ĝenas. Ŝi lamentas, ke ŝi volas kolazioni en la kuirejo, nur por ke oni trenu ŝin perforte sur la verandon, por ke tie ŝi povu lamente rakonti al la gasoj: „mi vegetas en mizero, ili estas riĉaj, mi volis iri en la kuirejon, sed ili hontigas min”. Propre mi scias, ke onklino Hermin venas al ni, por esti ofendata. Se ŝi ne sukcesas ofendiĝi ĝis vespero, ŝi malesperiĝas, kaj por ke oni tamen ofendu ŝin, ŝi permesas al si ion tian ĉe la vespermanĝo, ke devas esti Kristo, kiu ne ofendas ŝin. Tial estas instrukciite al la infanoj, ke ĝis la sesa horo ili ofendu ŝin (bonvolu kredi, mi ĵuras, ke nure kaj pure por tio ŝi vizitas nin), ĉar se ĝis la sesa ŝi estas ofendita, ŝi hejmenveturas per la trajno de la sepa kaj kvarono. Sed se ŝi ne estas ofendita, ĉe la vespermanĝo ŝi detiras siajn ŝuojn, kiel pasintfoje, dirante, ke ŝtonero eniĝis, kaj pludonas ilin al la gastoj, por ke ili rigardu, kiel ĉifonaj ili estas; aŭ kiel pasintjare okazis, ke tiel longe ŝi flaris la rostaĵon sur la telero, ĝis mia edzino, tremanta de sufokata kolerego fine demandis ŝin, kion ŝi flaras, je kio onklino Hermin modeste reagis jene: „nenion, kara, tute bona viando ĝi estas, sed mi ne scias, kial ĉiufoje ricevas mi la malbonodoran pecon?” Iel tamen ŝi ĉiufoje igas ofendi sin. Terura estas tamen tio, ke pro mi ŝi neniam ofendiĝas, ĉar min ŝi malamas, pri mi ŝi scias, ke mi scias, kion ŝi celas, kaj mi pretas flustri ok ĝis dek tiajn ofendojn al ŝi en la orelon, pro kiuj ŝi verdiĝas. Tio tamen ne kalkuliĝas. Ŝi bezonas veran, doloran ofendon de mia edzino aŭ de la infanoj. Kutime la infanoj aranĝas la aferon, dirante al ŝi, ke ŝi venenis sian karmemoran edzon. Sed ĉi tiu mensogo jam komencas triviĝi, ne plu funkcias. Lastafoje mia infaneto batis en ŝin de malantaŭe remburnajleton, sed pro tio ŝi emis ofendiĝi nur tiam, kiam mia edzino ne volis punbati pro tio la knabon. Tiel ŝi tamen forveturis per la sepa kaj kvarono.

LA KVINA HORO

Je la kvina komencas veni la infanoj kaj la servistinoj el la najbaraj somerdomoj por pruntepreni. Nur la somerumanta homaro scias, kion tio signifas. Kie estas multaj gastoj, de tie oni venas pruntepreni: „Je du oni venis pli multaj, patrino igas peti prunte du parojn da manĝiloj kaj kvar telerojn, ho jes, ankaŭ du buŝpaperojn ni bezonas”. „La sinjorina moŝto sendas sian saluton kaj petas la glaciaĵmaŝinon.” „Paĉjo sendas sian saluton kaj petas unu kusenon, ĉar onklo Uhajda dormos eksterurbe”. „Patrino petas afable doni ion por legi, ĉar neniuj venis”. Tiel oni pruntepetas seĝojn, mineralakvon, ludkartojn, tabulon, kreton, ventumilon, glasojn, tablon, gramofondiskon, cigarojn, cigaredingojn, eĉ ankaŭ servistinojn, se „oni venis tre multaj”. Ĉar la kaŭzo estas ĉiujfoje la sama: multaj venis, pli multaj ol ni antaŭvidis. Al kiu neniuj venis, tiu petas aŭ ion por legi aŭ li mem transvenas. Kaj tio okazas ĝis la sesa horo. Je la sesa ni jam estas brave pripreditaj.

LA SESA HORO

Je la sesa aperas du junuloj.

– Mia nomo estas Ervin Pöck – diras unu.

– Mia nomo estas Hebrányi – diras la alia.

Ĉu ili estas sekundantoj? Ne. Reĝisoroj. Ili venis vendi biletojn. „Sabate vespere estos koncerto en la malsupra gastejo Vadrovitc. Sed ankaŭ supre oni povas pagi. Via kara edzino ŝatas danci.” „Dankon, ni iras nenien amuziĝi.” „Sed bonfara celo.” „Ne, ne.” „Ej nu, karulĉjo, donu al ili unu forinton por bonfaro, kaj ni ne bezonas bileton.” „Ho, kiel vi bonvolas imagi tion?!”

Plej malbone estas, ke ankaŭ al niaj gastoj ili vendas biletojn. Nu, mi diras tion ne pro tio, ke mi domaĝus miajn gastojn, sed ĉar per tio ili fariĝos ŝarĝo sur mi sabate, kaj tiafoje post la balo ses da ili dormos en la manĝejo ĝis tagmezo.

„Ne, ne, dankon!” „Tamen lasu danci la knabinojn!” „Ho, sinjoroj, la knabinoj estas ankoraŭ malgrandaj, unu aĝas ses, la alia kvar jarojn.” „Ne gravas, bonvolu kredi, en la malgranda halo komenciĝos jam je la kvina posttagmeze infanbalo.”

Nun sekvas flustrado elde de mia edzino: „Ĉu ni regalu ilin per kafo?” „Ne”, mi reflustras, „sed se ankoraŭ restis iom el tiu pasintfoja ratveneno...” Poste la flustrado daŭras plu laŭvoĉe: „Ĉu la sinjoroj trinkos iom da kafo ĉe ni?” „Hehehe, ni jam dufoje kafumis.” „Nu, tamen egale, kafumu ankaŭ triafoje!” „Nu, se vi estas tiel afablaj...”

Kaj ili kafumas. Poste foriras. „Ĝis revido, s-ro Pöck, ĝis revido, s-ro Hebrányi!” „Pardonu”, ili diras, „eraro, Pöck estas mi kaj Hebrányi estas li.” „Ho, pardonon! Nu, tio estis vera amuza!” „Ne gravas, ne gravas.”

Ni ĉiuj ridetas – ĝenataj. Ni akompanas ilin ĝis la ĝardeno pordo. „Bonan tagon!” „Je via servo!” Ili reambblas tra la ĝardeno, malĝojaj, preter la gastoj, svarmantaj sur la verando. Kie estas onklino Hermin? Ŝi ploregas en la banoĉambro. Kio okazis? Ĉu finfine ŝi sukcesis ofendiĝi? „Al mi vi, kompreneble, eĉ ne prezentis ilin.” Mi staras senkonsile. Onklino Hermin silente ploras. De la teraso de la najbara vilao la vento transportas mallaŭtajn sonojn: „Mia nomo estas Pöck, mia nomo estas Hebrányi...” Vesperigas.

LA SEPA HORO

Je la sepa kutimas veni tiu fripona Söpkesz, bonvolu ne preni mia kulpo, ke mi skribas tian krudaĵon, sed la galo saltas al mi ĝis la gorgo, se mi pensas pri ĉi tiu Söpkesz. Foje mi jam komisiis nian ĝardeniston, ke vestita kiel vojrabisto, li batu lin de malantaŭe sur la kapon per lato, kiam li foriras de ni, eble aliffoje li ne venos. Tio ankaŭ okazis, sed la pafilo retropafis, ĉar Söpkesz rekuris kaj nokte ĉe ni li dormis. Ĉio estas vana kontraŭ li. Se ni iras promeni ĉe krepusko, la infanoj atentigas lin ankaŭ tie, kie ne estas ŝtuparo: „Onklo Söpkesz, atentu, tie estas ŝtuparo!” Kaj onklo Söpkesz faras altan paŝon en la nenion, liaj kruroj subfleksiĝas, kio estas unu el la plej abomenaj aferoj, sed ankaŭ tiaj ŝercoj ne fortimigas lin. Miaj infanoj kaŝmetas laŭ mia komisiono el saketo, tenata speciale por ĉi tiu celo, muŝojn en lian kafon. Estas vane. En liajn cigarojn, kiujn li ricevas, mia edzino enkudras antaŭtagmeze ĉevalharjon – laŭ mia peto. Estas vane. El la seĝo, sur kiu li sidas, laŭ mia dispono elstaras najlo. Estas vane. Li ŝatas sodakvon, do antaŭtagmeze ni verŝas ordinaran akvon en sodakvan botelon, kaj li premegas ĝissange siajn fingrojn sur la ellasbraketo, kaj por nia ĝojo nenio elŝprucas. Estas vane. Anstataŭ vino miaj infanoj faras laŭ miaj instrukcioj tiel nomatan „hejman Badacsony-vinon laŭ onklo Söpkesz” el

vinagro, sukero kaj spirito. Estas vane. Li trinkas ĝin. Vane ni murdas, venenas, batas, lamigas, turmentas lin, li aperas ĉiudimanĉe, ĉar li volas kartludi kaj gajni de mi kvar ĝis kvin kronojn, por povi diri: „mi regajnis la vojaĝkoston”. Söpkesz estas la reĝo de perfortaj someraj dimanĉ-posttagmezaj kartludantoj, unu el tiuj, kiuj fortiras la dommastron el inter liaj gastoj kaj volas gajni de li du forintojn kvindek.

LA OKA HORO

Mallonga sed agaca ĉapitro. Ĉirkaŭ la oka venas tiu, pli precize tiuj, kiuj vane elveturis al Mócsing, ĉar ili ne trovis hejme tiujn, al kiuj ili venis. En Mócsing nome ĉiudimanĉe eskapas antaŭ siaj gastoj almenaŭ kvindek familioj. Sekvajare estos kvindek unu tiaj familioj. Ĉi tiu speco paŝas en la ĝardenon kun la voko „mi diris al mi, se ni jam alveturis...”, kaj jam ĉe la pordo ili demetas siajn mantelojn.

LA NAŬA HORO

Ĉi tiu estas la plej dolora horo en la vivo de somerumanto. Tiahore jam neniuj venas, tamen estas terure, ke ankaŭ neniuj iras. La trajno ekiras je la oka kaj kvindek al Budapeŝto, kun konsidero de tio ni igas primeti la tablon dimanĉe je la naŭa, por ke la gastoj ne ekhavu emon, ĉar somera gasto tiom sovaĝiĝas de la blanka tablotuko kiel virbovo de la ruĝa tuko. Mi ripetas, se ili vidas tablotukon je la oka kaj duono, tiam estas fino al ni. Do ni primetigas la tablon nur post la antaŭlasta trajno. Tamen estas senekzemple kaj absurde, kiel bone konas tia somera gasto la horaron de la ĉirkaŭaj trajnoj. Kvin-ses el ili ĉiufoje demandas: „Kiam ekiros la lasta trajno?” Kvankam mia edzino respondas aŭtomate, ke: „Hodiaŭ ni vespermanĝos ion malvarman”, tio kutime ne utilas. Pasintfoje jam ankaŭ ni mem vespermanĝis fromaĝon kaj panon, por ke ili krevu de kolero, sed ili simple eĉ ne rimarkis tion.

La plej dolora antaŭokazo de ĉi tiu plej dolora horo estas, kiam ni vidas de la verando, kiel akompanas la feliĉaj najbaroj siajn gastojn al la trajno de la oka kaj kvindek, dum ĉe ni ankoraŭ kvin homoj svarmas en nuraj ĉemizoj. Söpkesz trinkas la hejman Badacsony-vinon kun pseŭdo-sodakvo, onklo Schmiri sidas sur arbo sen ŝuoj, onklino Hermin misfartas en la dormoĉambro kaj kompresas sian kapon, onklo Rőcze inokulas per dentoskrapilo miajn rozarbetojn, d-ro Csaruga kaj lia edzino baniĝas, ĉar estas

varme, onklino Lujza ŝtopas ĉokoladon en la buŝon de la domgarda hundo, la infanoj kaptadas porsupajn muŝojn por onklo Söpkesz. Instruisto Vadányi malbonigas la puton, kaj onklo Pista ronkas en la rulita mato kiel fiŝsupo super malferma fajro, dum kio onklo Sebész (ĉu oni jam aŭdis, ke iu Schwarz hungarigas sian nomon al Sebész¹¹? Tiaĵo ja povas okazi nur ĉe mi...), dum kio onklo Sebész kalkulas per sia horloĝo, kiel li povus malfrui la lastan trajnon.

Kaj dume la feliĉaj najbaroj akompanas siajn bonajn, bravajn, afablajn gastojn al la fervoja stacio, kaj ridante mansalutas nin tra la barilo. KREDU min, sinjoro, estas terure okulatesti tion. La koro ŝiriĝas al oni.

LA DEKA HORO

La lasta trajno ekiras je la deka kaj dudek unu. Je la deka jam ankaŭ ni marŝas kun nia grupo al la stacidomo. Tiafoje ĉiam saltas en mian menson, ke estus avantaĝe teni ankaŭ paŝtistan hundon, tiel nomatan *pel-puleon*, kiu tenu la gastojn daŭre en unu aro, ĉar onklo Sebész ofte foraventuras, klopodas ĉiurimede malfrui la lastan trajnon, kio jam dufoje ankaŭ sukcesis al li en ĉi tiu sezono. La tempo do pasas de la deka horo ĝis la deka kaj dudek unu per tio, ke ni okulgardas onklon Sebész. Tamen estas mirinde, kiom li sagacas pri ideoj! Komence li plifruigis sian horloĝon, malaperis kaj post la foriro de la trajno li venis adiaŭi nin. Li volas dormi ĉi tie kaj sekvatage matenmanĝi en la ĝardeno. Ĉio estas vana. Ĉi-jare ni jam sukcesis venigi lin ĝis la ŝtupetaro de la vagono, li ankaŭ paŝis sur la ŝtupon, sed vole kaj dole destumblis, ŝajnis krurrompiĝon, la trajno, kompreneble, ne atendis kaj foriris. Kiam la trajno jam malaperis el la vido, onklo Sebész interkonsentis kun ni pri elartikiĝo, poste timante, ke ni vokos kuraciston, li cedis tiom el la antecedentoj, ke lia kruro dolore batiĝis, kaj post kvaronhoro kun krio „ĝi jam eĉ ne doloras”, li repromenis kun ni hejmen, dormis en la manĝejo, kaj sekvatage, por konservi sian honoron, li ankoraŭ iom lametis, dum antaŭtagmeze li forveturis. Por esti justa, al ĉi tiu ĉapitro de la deka horo apartenas ankaŭ mia unusola dimanĉa ĝojo. La gastoj, kiuj forveturas per la lasta trajno, ĉiuforte gaje konversacias, amuziĝas, petoladas en la trajno ĝis Budapeŝto, sed al onklino Hermin ili neniam diras eĉ nur silabon. Ŝi konsumiĝas de kolero en angulo ĝis Budapeŝto.

¹¹ Schwarz (germane): nigra, Sebész (hungare): ĥirurgo.

Tie ili ne salutas ŝin. Kaj ŝi koleras, ĉar ŝi ne povas ofendiĝi; pli ĝuste: al neniuj kaŭzus kordoloron, se ŝi ofendiĝus. Kvankam ŝi bezonus ĝuste tion. Mi ripetas, mi havas ĉi unusolan ĝojon, kaj kiam mi enlitiĝas je la deka kaj tridek, mi ekridetas feliĉe en mia lito, pensante pri tio, ke la trajno nun klakkuras al Budapeŝto kun la gaja societo kaj en la angulo sidas onklino Hermin plenblovinte sin pro kolero kiel ignorata erinaco. En duondormo mi ridetas prie, dum kio ekstere, en la malhela manĝejo onklo Sebész singarde ekrampas kvarpiede al la servistina ĉambro, por ke mi ne aŭdu lin, kaj por logi al si miajn servistinojn. Kelkfoje li renversas ion, kaj tiafoje dum duonhoron li kroĉiĝas senmove al la renversita meblo kaj angoras, ĉu mi aŭdis lin. Poste li regrimpas sur la kanapon, kie ni primetis por li liton, kaj laŭte tusas, grakas, por ke mi aŭdu, ke li ne formovis sin de tie, ke ne li estis, kiu volis eliri al la ĉambristinoj. Nu, bone, onklo Sebész.

Do, tiaj estas niaj dimanĉoj, estimata sinjoro. Se vi foje ne havas pli utilan farendon, elveturu al ni. Duna-Mócsing, departemento Peŝto, Frühauf-vilao, ĉiu scipovas orienti vin, ni luas ĝin jam la kvinan jaron.

Kun estimaj salutoj

Unu familiestro

LETERO PRI LA MILIONOJ

Estimata Sinjoro!

Mia nomo estas Samuele Etburĝ, kaj dum mi skribas ĉi tiujn liniojn, en la alia ĉambro murmuras du sinjoroj. La afero komenciĝis tiel, ke oni sonorigis. Mia edzino Malvin eliris, por malfermi la pordon, kaj la du sinjoroj entrudiĝis en la antaŭĉambron. Malvin ektimis kaj demandis: „Kiuj vi estas?” Unu el la sinjoroj afable diris: „Mia nomo estas imposta ekzekucisto, ni iru internen”. Nun ili sidas ĉe mia tablo kaj murmuras, unu daŭre ripetas: „lakita ŝranko”, la alia diradas: „kio ankoraŭ restis?” Mi ne eliras, ĉar mi ne povas rigardi al ili en la okulojn, mi timas, ke mi koleriĝos kaj saltos sur ilin kiel sovaĝa leono, mi scias, mi ja scias, ke mi ne faru tion, tio estas perforto kontraŭ instanco, mi ankaŭ ne faros, mi nur diras miajn sentojn al via moŝto, kaj larmoj ekfluas el miaj okuloj.

Mia nomo estas Samuele Etburĝ kaj mi ŝuldas centsepdek kvar kronojn kaj kvindek filerojn da imposto, tiom sumas mia fidela, nepagita imposto, tial ili sidas ĉi tie kaj murmuras pri lakita ŝranko; hodiaŭ ili nur murmuras, estimata moŝto, sed baldaŭ ili revenos kaj ankaŭ forportos ĝin, ĉar ne nur neniam, ja neniam mi povos kunskrapi centsepdek kvar kronojn kaj kvindek filerojn el ĉiuj poŝoj de mia vestaro, sed eĉ se oni tiros min sur pendumilon aŭ ĵetos min en draŝmaŝinon, mi ne scipovos alŝoldi centsepdek kvar kronojn kaj kvindek filerojn, eĉ ne centsepdek kvar ordinarajn blatojn kaj kvindek germanajn blatojn, ĉar mi ne scias, sinjoro, de kie mi prenu ilin, mi ne scias, de kie mi eltiru, elpoŝigu, elŝvitu, elskrapu, elsangu centsepdek kvar kaj kvindek iojn ajn. Tio ne eblas. Siatempo mi aperis antaŭ la imposta komisiono, mi ploris, kriis, almozis, petegis, mizeris, montris miajn truhavajn dentojn, atentigis pri mia magra, maljuna ventreto, mi misfartiĝis, mekadis, beadis, kantadis, oratoradis, pepadis, malvestiĝis, genuiĝis, sed vane, kun frosta rideto sidis tie d-ro Distrikta Estro kaj ne cedis eĉ fenditan groŝon, kvankam antaŭ mi staris samloke barono Nun-li-iĝis-baron, kaj post kiam li trovis multaj tiujn unu forinton kaj dudek filerojn, per kiuj oni ŝargis lin, oni cedis unu forinton kaj kvin filerojn, kaj nun li pagas nurajn dek kvin filerojn da imposto, sinjoro, iu riĉa homo, kiu havas fabrikon de rajdneesaĵoj, kaj kies enspezojn oni taksas je ducent mil spro-

noj, ne je ducent mil kronoj, sed ducent mil spronoj, ĉar mi ripetas, li havas fabrikon de rajdnecesaĵoj kaj vendas dum unu jaro duonmilionon da spronoj kaj aliaj bezonaĵoj. Kaj li pagas dek kvin filerojn da imposto. Vi diros, ke mi troigas. Povas esti, ke la ciferoj estas iom troigitaj, sed kiu scias, kiom diferencas en nia ĉefurbo la impostoj de politikaj amikoj kaj politikaj adversuloj, tiu pardonos ĉi tiun modestan troigon al mi, kiu ne voĉdoninte tien, kien d-ro Distrikta Estro pelis min, mi pagos, pli ĝuste mi ne povos pagi centsepdek kvar kronojn kaj kvindek filerojn, kaj nun mi aŭskultas ĉi tie la murmuradon, kiun eligas la impostaj ekzekutistoj. KREDU al mi, sinjoro, murmuri kortuŝe nur li kapablas. Mi neniam vidis maron, sed mi aŭdis multon bonan pri ĝia murmurado. Tamen mi ne kredas, ke ĝi kapablus fari ĝin tiel ekscite kaj tiel kortorde, kiel la du sinjoroj en la najbara ĉambro.

Mia nomo estas Samuĉelo Etburĝ, kaj eble ne plaĉos al via moŝto ĉi tiu amare ŝerca, mi povus diri fola tono, en kiu mi skribas mian leteron. Ja ne tia estas mia ordinara voĉo, ĉar mi estas homo trankvila, librojn neniam mi legas, teatrojn mi ne vizitas, al mi ankoraŭ ne forkabaredis la kapon verkistaj kaj ĵurnalistaj sinjoroj. Sed vi provu skribi foje plendan leteron, dum tiuj en la najbara ĉambro fornotas al si ĉiun lakitan ŝrankon, kaj vi spertos, ke subite io komencas ridaĉi en vi, subite pleniĝas de galo via tiel nomata humoro, kaj mi asertas, ia ekscito leviĝas ĝis la gorĝo, kiu instigas vin elkuregi kiel feroca leono kaj disŝiri la ekzekutistojn. Tamen mi mildigas ĉion ĉi, dronigas ĉion en ĉi tiu plenda letero, kaj tial mia skribaĵo iĝis tiel sovaĝa, estimata sinjoro, diablo prenu mian vivon, sed kion fari, se mi ne ŝatas perforton kontraŭ instancoj. Mi skribas tial, sinjoro, ĉar mi sentas, ke ĉi tiu estas la minuto, kiam povas skribi kun vere sincera sento pri politiko tia homo kiel mi, kiu neniam okupiĝis pri politiko, eĉ ne kompetentas pri ĝi, nek estas ano de partio. Mi nun meditas nome pri tio, ke magnatoj akuzas unu la aliajn kaj ĵetaĉas kvar milionojn okcent mil kronojn reciproke kontraŭ la kapon, kun argumentoj por kaj kontraŭ. Mia filo venas hejmen kaj rakontas: „Oni parolas pri ŝpalfraŭdo kaj karbofraŭdo, kvardek milionoj, cent milionoj”. Tio ne interesas min. Tamen mi enpeniĝas, kien apartenas miaj mizeraj centsepdek kvar kronoj kaj kvindek fileroj. Ĉar oni enkasigos ilin de mi, sinjoro, jes ja enkasigos. Se mi ne scipovos skrapo ilin al mi, skrapos ilin tiuj al si, ĉar tiel longe ili konfiskadas kaj aŭkciadas miajn lakitajn ŝrankojn, ĝis la mono estos kune. Ĉar mi ĉiufoje skrapas al

mi tiom, kiom necesas por nova lakita ŝranko, ĉar Malvin en ĝi tenas siajn robajn. Kaj ili forportadas ĝin. Ĉi tiu estas jam la kvara lakita ŝranko. Do fine mi tamen pagos tiujn centsepdek kvar kaj kvindek, ĉu? Kaj kien do apartenas ĉi tiu mono? Kie ĝi estas deponita? Unu bela blua centkrono, tri belaj buntaj dudekkronoj, unu plaĉa dekkrono, kvar arĝentaj kronoj kaj kvin dekfileretoj. En kiu sumo ili enestas? Ĉu en la kvar milionoj aŭ en la okcent-milo? Ĉu en la unua miliono, en la tria, en la dua aŭ en la kvara? Ĉar ĉi tiuj monoj, grupigitaj unu apud la aliaj sur la tablo – ho, mi imagas ilin, estas belegaj bluecaj paperkolonoj –, en unu el kiuj sidas sube, supre aŭ meze la mizeraj centsepdek kronoj da bankbiletoj de Samuelo Etburĝ, kaj en granda sako ploras inter aliaj ankaŭ miaj kvar kronoj kaj kvindek fileroj da moneroj. Stranga penso deflanke de simpla homo, ĉu ne, sinjoro, sed mi per miaj imagaj okuloj postrigardas mian mizeran, etan monon kaj serĉas, kie ĝi estas metita, parton de kiu miliono ĝi konsistigas, ĉar se oni forprenis de la ŝtato la kvar milionojn kaj okcent milojn, tiam anstataŭigas ilin ni, mi, Samuelo kaj ni ceteraj *samueloj*, kaj se mian mizeran, etan monon oni alkalkulas al la prezo de ŝpaloj, tiam ĝi tie enviciĝas kune kun la aliaj mizeraj, etaj impostomonoj en la kvardek milionojn aŭ Dio scias, en kiomon. Mi ne scias, ĉu vi komprenas, sinjoro, kion mi celas elstarigi, tamen mi volus, ke vi komprenu: oni forportas miajn ŝrankojn unu post aliaj, ĝis ili fariĝos centsepdek kvar kronoj kaj kvindek fileroj. Malvin ploras, la robaj kuŝas surplanke, nun tiuj sidas en la apuda ĉambro, skribas, murmuras, kaj mi meditas, kiam konsistiĝos fine el ĉi tiuj etaj monoj, pro kiuj ili grumbas kaj koleras, pro kiuj ili turmentas, plorigas, mistraktas, pripredas min okfoje unu post alia, kaj kiuj estas nun ĉe ni tiel serioza sumo kaj granda malfeliĉo, kiam konsistiĝos do el ĉi tiuj *samuelaj* monoj tiom da kronoj, ke ili fariĝos milionoj, mono, subite tiel neserioza, tienreen ĵetata, facilanime prenata mono, ke markizo György Pallavicini eĉ ne nomas ties sumon, ĉar li timas erari je unu-du milionoj, kaj iu alia mencias kvar-kvin milionojn; pro Dio, kial gravus kelkaj centmiloj, metitaj tien aŭ aliloken? En la afero de la ŝpaloj oni ne scias, ĉu la milionoj estas kvardek aŭ centkvardek, mi volas emfazi, sinjoro, ke mi freneziĝos, se mi bone pripensas, kiom da akurateco kaj perforto kaŝiĝas en la konfisko de ĉi miaj lakitaj ŝrankoj, valorantaj dudek kvar kronojn por peco, dum tie supre etendiĝas de kvar ĝis kvardek milionoj la „proksimume” kaj la „ŝtelita” kaj la „ne ŝtelita” kaj la „ni klarigu la nocion fraŭdo” kaj ĉio alia, pri kio oni konfuze parolas, dum ĉi tie ĝis fileroj precize tiuj forŝiras de mi mian mi-

zeran meblon, amarigas la koron de mia malfeliĉa Malvin kaj turmentas min. Ne eblas vere senti la ĝisĉiele kriantan amarecon de ĉi tiu tuta afero de fraŭdo kaj nefraŭdo, nur tiel, kiel mi sentas ĝin: meditante pri ĉi tiuj sinjoroj kaj pri ĉi tiuj milionoj, dum el ĉi mia malpura, larmoplena, mizera, turmentata vivo oni elŝiras kun tiel morta severo jam mian kvaran ŝrankon. Nun ili faras notojn, du plenkreskuloj venis de malproksime ĉi tien, sonorigis, salutis, prenis paperon, skribas en rubrikojn, murmuras kaj la sekvan semajnon ili rekomencos. Sumo de cent sepdek kvar kronoj, kvindek fileroj. Kie ĝi troviĝas, kie ĝi ploras, kie ĝi modestas? En kiu amaso? En kiu miliono? Ĉu ĝi rekonas min, se mi alirus, kie ĉi tiuj montoj da monoj kuŝas unu sur aliaj, ĉu ĝi manosvingus al mi el la amaso kaj dirus: „Alrigardu, Samuele, ĉi tie mi estas, mi, la mizera, ĉifita centkrono, ok viaj lakitaj ŝrankoj. Ok ploroj de via Malvin, ok viaj sufokitaj, en ĝermo sufokitaj kontraŭinstancaj perfortoj!”

Kiam mi tiel meditas pri la politikaj polemikoj pri milionoj, mi ekmemo-ras mian alian filon, kiu kuŝas ĉe la rusa landlimo. Kiam mi legas: unu armeokorpo, du armeokorpoj, centkvindek mil homoj, armeo de la monarĥio, mi ĉiam pensas: en ili partas ankaŭ mia filo. Mi aŭdas: cent mil homoj estas postenitaj tie aŭ ĉi tie. Unu mia filo troviĝas inter ili. Por la monarĥio: armeokorpo, armeo, por la statistiko: cent mil, duonmiliono, por mi: unu filo. Ie en la nigra homamasego unu punkto, filo de Samuele Etburgĥ, Ede Etburgĥ. Li partas en la armeo kiel miaj centsepdek kvar kronoj en la multaj milionoj. Mia Malvin naskis lin kun doloroj, en la aĝo de sep jaroj li havis skarlatinon, ni kredis freneziĝi pro la timzorgo, antaŭ la abiturienta ekzameno li malsaniĝis pro la lernado; dudek ses jaroj da zorgoj, malĝojoj, gepatra amo enestas en ĉi tiu filo, kaj la ŝtato havas por li nur unu vorton: armeo. Ĉi tie kuŝas en miaj centsepdek kvar kronoj la kvin jaroj da turmentoj de mia bankrotinta spicvendejo, miaj brulumaj okuloj pro la noktaj kalkuloj, miaj kvereloj kun la buĉisto, ke li vendu la lardon je unu filero malpli, mia truhava pantalono kiel ŝparo, multe multaj kilometroj, kiujn mi tramarŝis, por ŝpari la trammonon, sinjoro, pro dek krejceroj mi piediras el Buda al la strato Ŭllői, kaj kiom da tiel mizere ŝparitaj dekrejce-roj enestas en unu lakita ŝranko, en tia, da kiuj mi bezonas ok, por pagi la restintan imposton. Kiom da suferoj de mia korpo, mia animo, mia homa digno mi devas cedi, ĝis ili konsistigos tiun imposton, kiu fariĝos silenta, mizera parteto de tiu miliono, pri kiu nun la grandsinjoroj parolas tiel faci-

lanime? Por mi: la mizero de mia vivo, mia sango, mia cerbo, zorgoj, malĝojoj de miaj kvindek ses jaroj, kaj la politiko havas por ili nur unu vorton: ŝtatmono. Ĉio ĉi estas ne harfenda rezonado, sinjoro sed sentoj. Mi volas klarigi nenion al via moŝto, mi nur volas skribi, kion mi sentas, dum en mia alia ĉambro la ekzekuciisto murmuris.

Nur unu aferon mi ne komprenas: kiel povas elteni tiun teruran senton de respondeco tiuj grandsinjoroj, tiuj ministroj kaj deputitoj kaj grafoj kaj ceteraj teraj diaĵoj, kiam ili scias, ke ĉiu ŝtata miliono estas kunmetita el la etaj monoj de tiaj *samueloj*? Aŭ ĉu ili ne scias tion? Kiel ili povas dormi? Kiel povas gliti glate gluto tra ilia gorĝo? Aŭ ĉu ilia cerbo ŝanĝiĝas tiom, kiam ili leviĝas sur altan pozicion, ke ili ĉion ĉi forgesas? Aŭ mi estas azeno, maljuna, mirema azeno, kiu teruriĝas, enrigardante en la originon de la ŝtataj monoj? Aŭ eble nur pro tio venas ĉio en mian menson, ĉar ĝuste nun oni forskribas de mi mian meblon?

Bonvolu ne respondi al tio, sinjoro, mi demandas ĉion ĉi, nur por malŝarĝi mian koron. Mi ja scias, kiel statas la aferoj. Nu, estas egale. Kial mi ne naskiĝis episkopo?! Tute ne zorgu pro ĉi mia letero, se vi legis, forĵetu ĝin, kaj pensu pri ĝi nur tiom, ke maljuna homo skribis ĝin, ĉar li devis sufoki en io la erupciontan kontraŭinstancan perforton. Mia Malvin envenas ridetante, por ke mi ne vidu ŝiajn larmojn. En la mano de mia filo estas la vespera ĵurnalo. Ĝi skribas: „ni klarigu la nocion de fraŭdo”.

Kun aparta estimo ktp.

KAZOJ

Ni lasu iom la gravmienadon kaj rigardu pli proksime kelkajn etajn, humurajn kazojn, eble ankaŭ el tiaj oni povas plisaĝiĝi, oni ja ne scias, pro kio oni riĉiĝas. Sinjoroj, veturintaj el eksterlando, rakontis ilin; mi deviĝas nomi ilin, tiom nekredeblaj ja ŝajnas ĉi kelkaj bagateloj por la unua aŭdo.

Mia eminenta amiko Jenő Heltai venis el Vieno kaj tuj ĉe la alveno li rakontis: Li havis farendon en la granda bulvardo en Vieno, kontraŭ la Operejo. Li iris perpiede, kaj kiel oportunemaj homoj kutimas, li ne ĝisiris precize antaŭ la Operejon, por poste orte, rektavoje transrapidi al la alia flanko, sed laŭ budapeŝta maniero jam multe pli frue li paŝis sur la vojon kaj oblikve travadis de unu bordo de la veturilfluo al la alia. Dum li tiel iras, evitante singarde tramojn kaj aŭtomobilojn, neatendite – kiel malnovaj romanistoj dirus – mano peziĝas sur lia ŝultro. Li turnas sin kaj konstatas, ke sur la mano estas nigra ganto, kaj al la nigra ganto apartenas policisto. Tiu diras al li:

– Ĉu mi povas peti vin por kelkaj vortoj, sinjoro?

Kun tio li prenas ĉe la brako kaj elkondukas lin el la kirlomikso de veturiloj al la transa trotuaro. Tie li ĝentile viziersalutas kaj diras:

– Sinjoro, neniam transiru la vojon oblikve, sed ĉiufoje marŝu ĝis tiu punkto, kie vi volas transiri al la transa trotuaro. Kaj tiam rekte transiru. Se vi transiras oblikve, vi pasigas duoble tiom da tempo inter la veturiloj, ol vi bezonus, krome la ŝoforoj ne povas atenti vin, ĉar ili ne scias, kien vi volas iri. Dum se vi rekte transiras, ankaŭ la aŭtomobiloj pli facile orientiĝas, kaj vi post nelonge jam estos transe.

Li diris, ree viziersalutis kaj malaperis en la homokirlo de la strato. Heltai estis tiom emociita, ke li prenis kuraĝon kaj reiris inter la veturilojn kaj trovinte lin sur lia posteno, dankis lin pro la multaj bonaj konsiloj. Kaj la policisto severe respondis:

– Vidu, sinjoro, tio estas por mi instrukcio: instrui ĉiun homon, kiu mise transiras la vojon.

Punkto. Tiom estas la tuta historio.

La dua historio sentimentala originas same el Vieno, temas same pri policisto. S-ro Károly Stoll, la eminenta ĉefreĝisoro de la teatro Király liveris ĝin al ni. Li volis veturi hejmen, li do sidiĝis en modesta droŝko, metis sian vojaĝsakon apud la koĉeron kaj diris al li:

– *Zentralbahnhof!* Centra Fervojstacio.

Prave, ĉi tiun stacidomon oni jam ne tiel nomas sed *Staatsbahnhof*, ŝtata Fervojstacio, sed tio ne gravas. La droŝko skuiĝetas kun li kvaronhoron, fine ĝi haltas antaŭ granda konstruaĵo. La pasaĝero eliras kaj vidas, ke sur la granda domo estas skribita „*Zentralbad*”, Centra Banejo. Li komencas kvereli kun la koĉero, kiu rekonas sian eraron, kaj post kiam li ricevas ankaŭ la vorton *Staatsbahnhof*, li plu ambliĝas sian ĉevalon. Pasas nova kvaronhoron, tiam li ree haltas antaŭ granda domo, sed sur ĉi tiu domo estas skribita: *Hauptzollamt*, Ĉefa Doganoficejo. Nia pasaĝero ree eliras kaj pafas amarajn vortojn al la koĉero, pri kiu nur nun evidentiĝas, ke li estas ĝisgorgo vinsaturita. Aŭdante la disputon, alpaŝas policisto kaj intervenas. La pasaĝero rakontas la tutan kazon. La policisto elpoŝigas sian horloĝon kaj diras:

– Via trajno ekiros post dek minutoj, kaj ĉi tiu ebrulo eĉ dum duonhoron ne povos veturigi vin al la stacidomo.

Kun tio li manvokas taksion kaj transmetas la vojaĝsakon el la droŝko, poste donas la sekvan instrukcion al la ŝoforo.

– Vi veturigos ĉi tiun sinjoron al la *Staatsbahnhof*, vi ne akceptos de li monon, kaj por la veturprezo morgaŭ vi anoncos vin en la ĉefpolicejo. Tiam mia raporto jam estos tie kun via mono, kiun mi elvringos el ĉi tiu ebria koĉero.

Kaj antaŭ ol la pasaĝero povus eligi vorton, li ŝovas lin en la aŭtomobilon kaj gestas al la ŝoforo, ke li ekveturu. La tuta dramo okazis dum minuto. En la stacidomo la pasaĝero ĉiupreze volis pagi al la ŝoforo, sed tiu ne akceptis monon kun la klarigo, ke li estos severe punita, se li ne plenumos laŭvorte la disponon de la policisto.

Punkto. Same nur tiom.

– Veturigu nin al Muzeo Imperiestro Frederiko!

Ili veturas, veturadas kaj foje alvenas antaŭ la muzeo nomita laŭ imperiestro Frederiko. Tie ili elkaleŝiĝas, volas eniri, kaj tiam ili vidas, ke la muzeo estas fermita. Unu diras:

– Ne gravas, ni pagu la kaleŝon kaj promenu hejmen.

Ili elpoŝigas monerojn, rigardas la taksimetron, sed ĉi-minute alpaŝas policisto, kiu ĝis nun de pli fore observis ilin.

– Haltu! – li diras. – Bonvolu ne pagi! Ĉu la sinjoroj estas fremdaj ĉi tie?

– Jes.

– Kie vi luis la kaleŝon?

– Antaŭ la hotelo Bristol.

– Kaj kion vi diris al la koĉero?

– Ke li veturigu nin al la Muzeo Imperiestro Frederiko.

– Dankon – diras la policisto –, la sinjoroj ne pagos por la veturigo.

– Kial?

– Ĉar antaŭ la hotelo stacias koĉeroj, kiuj estas instrukciitaj pri la orientado de fremduloj, do ĉi tiu koĉero devas scii, ke la Frederiko-muzeo estas hodiaŭ fermita. Se li tamen veturigis ĉi tien la sinjorojn, li faris por misuzi vian seninformecon.

Kaj li manordonas al la koĉero malaperigi sin. La koĉero ekiris paŝrapide. La sinjoroj gapas, kaj la policisto trankvile promenas plu. Sed ili ekkompatas la koĉeron, iras post li kaj volas doni al li la veturprezon. Vidinte tion, la policisto alrapidas kaj diras:

– Se la sinjoroj ne laŭas mian disponon, mi deviĝos noti viajn nomojn kaj loĝejojn.

La koĉero haste malaperis. Kaj la sinjoroj devis vole-nevole „laŭi la disponon”.

Punkto. Ankaŭ tiom sufiĉas.

La kazo n-ro 4, tre sentimentala historio, estas propra kolektaĵo el Budapeŝto. Printempe de la pasinta jaro promenis la aŭtoro, skribanto de ĉi

tiuj linioj per malrapidaj paŝoj en la bulvardo Erzsébet, ne sola sed kun atestanto, s-ro komponisto d-ro Albert Szirmai (loĝanta sub n-ro 24/a, et. III de la bulvardo). Estis vespero, la naŭa horo, ni venis ĝuste antaŭ la hotelon Royal, la steloj brilis, en la aero ŝvebis mil sorĉaj aromoj de la printempo, alaŭdoj kantis, kaj ĉe la pordo de la hotelo droŝka koĉero piedbatadis pli aĝan viron, sinjoron en blanka flanelkostumo. La pli aĝa sinjoro kriis angle por helpo en la hotelon, kaj la koĉero hungare premis, skuís, puŝis lin malsupren sur la ŝtuparo. Ni ne intervenis, ĉar tuj ni vidis, ke temas pri fremdultrafiko, sed kiel mi diris, ankaŭ piedbatoj okazis, kaj ĉar mi ĝuste tiutempe verkis pli longan artikolon pri eksterlandaj admirantoj de Budapeŝto, subite kaptis min kolero, kaj kun kuraĝa decidemo mi intervenis en la aferon. Tiam jam ankaŭ la direktoro de la hotelo elkuris, kaj kune kun li ni apartigis la koĉeron de la fremdulo, pri kiu tuj evidentiĝis, ke li estas usona kuracisto kaj venis studi la budapeŝtajn hospitalojn. La supre anoncita atestanto konfirmas, ke se ni ne estus alvenintaj ĝustatempe, la usona kuracisto nun studus la budapeŝtajn hospitalajn cirkonstancojn ne el la vidpunkto de kuracisto sed de paciento. Post mallonga sed akra lukto, en kiu ankaŭ la pordisto de la hotelo kaj ties grumoj partoprenis kun hungara militbravo, ni bridis la koĉeron kaj konstatis la faktojn, dum la samaj cent mil homoj, kiuj okulatestis la deteriĝon de Blériot, poziciis sin en ekzemplodona ordo ĉirkaŭ ni. El la rakonto de la koĉero kaj la usonano ni konstatis jenon: La usonano faris viziton en Buda ĉe s-ro aktoro Emil Fenyvesi, kiu estas lia parenco. Tie li prenis droŝkon kaj transvenis al Royal. Ĉi tie li rigardis la taksimetron, al la sumo li donis kvardek filerojn da trinkmono kaj transdonis la monon al la koĉero dirante: „La plio estas la via”. Kompreneble, germane li diris, kiel li scipovis. Post tio la koĉero komencis reklamacii hungare, ke al li ŝuldiĝas ankaŭ kvardek fileroj da pontotakso. La usonano ne komprenis lin, refoje li rigardis la taksimetron, vidis, ke li donis eĉ pli, levis la ŝultrojn kaj ekiris en la hotelon. Tiam nia koĉero, kiu insistis konsideri la kvardek filerojn trinkmono kaj ne pontotakso, anstataŭ eniri al la pordisto, kaj helpe de li enkasigi la *aliajn* kvardek filerojn, do propre la *donacon*, decidis sekvi pli simplan proceduron, li puŝtiris la fremdulon sur la ŝtuparo de la hotelo je ties brako kaj volis draŝi lin. Konstatinte tion, ni klarigis al la usonano, ke pro tio, ke la malplena droŝko nun reiros al Buda, tial li devas pagi kvardek filerojn, kion li ja ne komprenis, sed pagis senobjete. Tiam mi pensis tiel, ke se ĉi tiu bona koĉero estus piedbatinta la fremdulon pro venĝo, ĉar tiu ne donis al li mon-

on, Dio mia, la afero ne valorus eĉ vorton, ĉe ni tio estas en ordo, Fenyvesi klarigos al li, ke tio estas praa ĉevalista tradicio, nobla indigno de la sovaĝa sed honesta filo de la stepo ktp, ktp. Sed ĉar la tumulto okazis eĉ ne pro la agenda sumo sed pro kvardek fileroj da trinkmono, motivita ne tiom de la rezonado kiel pro la indigno, mi decidis ke mi venigos la homon en policistan manon. Mi ne bezonas diri, ĉu, ke policisto nenie troviĝis, eĉ tion mi ne bezonas diri, ĉu, ke tiu policisto, kiun hotelservisto poste trovis kaj venigis, diris, ke li havas nenion komunan kun tio, ĉar li ĝuste nun iras en alian distrikton al sia posteno, eĉ, mi ne bezonas diri ankaŭ, ĉu, ke kostis novan kvaronhoron, ĝis la servisto venigis policiston el la malluma utero de la strato Király. Ĝis tiam la koĉero restis vere nur pro komplezo inter ni. Do la policisto notis la faktojn, la nomon de la hoteldirektoro; tiun de nia amiko komponisto kaj tiun de mia modesta persono mi transdonis al li skribitan sur paperpeco; li notis la nomon de la koĉero, mallonge li notis ĉion, kaj nun jam ree ekprintempis, en la aero ree ekŝvebis mil sorĉaj aromoj de la printempo, alaŭdoj ree ekkantis, sed asignon antaŭ tribunalon en ĉi tiu afero ĝis la hodiaŭa tago mi ne ricevis. Povas esti, ke la instanco vidas en nian animon: funde de nia koro nun jam ni ne deziras la punon de la kompatinda koĉero, dum jaro oni mildiĝas rilate al io tia, Dio scias, kiom da infanoj li havas hejme, kial molesti lin, estus pli bone eble eĉ ne interveni en la tutan aferon. La instanco scias tion, kaj tial ĝi nun ne trudas min malutili al kompatinda homo vegetanta en mizera stato. Sed se tiam oni estus asignintaj la atestantojn, oni eble punus la koĉeron. Ĉar, mi diras, ĝistede ripetas, estis en ordo, ke li skuadis, piedbatadis la fremdulon, ĉar la koĉero estas bona privata juristo, kaj kvankam li ne komprenas la germanan, sed sciis, ke la unuajn kvardek filerojn la fremdulo kvalifikis trinkmono, donaco, kaj tial li povus konsideri ĝin pontotakso, nur se li unuflanke nuligus la donacan kontrakton. Mi diras, tio estis en ordo, nur tio ne estis en ordo, ke nia koĉero piedbatis ne nur la bonan famon de nia urbo, la publikajn ordon kaj honestecon, sed ankaŭ la paragrafon 350 de nia *Kriminala kodo*, kiam li trudis iun „perforte al iu ago”, por havigi al si senrajte proprietan utilon, kion ne ŝanĝus ankaŭ la fakto, ke ĉi tiu mono ŝuldiĝis al li, ja gravas ne la manko de la materiala rajto de la postulo sed la maniero de ĝia perforta validigo, vidu *Decidoteko* ĉap. XXVIII n-ro 36 kaj ĉ. XXVII 111. Kaj estas klare, ke kion li faris, estas perforto, ĉar li uzis ofendesian fizikan forton, kio same ne decas, diras *Decidoteko* ĉap. XXXIV n-ro 71. Ĉio ĉi ne estis en ordo, sed pasis, finiĝis. Simile al bela sonĝo. Nun

jam vane oni asignus min, mi memoras nek la policiston, nek la koĉeron, nur ĉi tiun historieton. Kaj por diri sincere, mi rakontis ĝin ne por molesti nian policon, ĉar mi rilatas kun respekto al la ĉefkapitano, kiu ne kulpas pri tio, ke registaroj ne lasas evolui la policon bele al eŭropa direkto pro la multa politiko. Mi bezonis rakonti tion, ĉar samtempe okazis la tri aliaj historioj, kaj ĉi tiu kvara tiel bele konvenis al ili. La afabla leganto eble iom enpensiĝos kaj rekonos, kion ankaŭ ni rekonis, ke niaj niaj publikaj rilatoj, mizeraj, maltrankvilaj, koruptiĝintaj kaŭzas, ke ne nur en ĉi tiu urbo, sed en la tuta lando hodiaŭ aŭ morgaŭ por neniu valoros kultivi la etajn belaĵojn kaj delikataĵojn de sia metio, ja kial fari, se la domo brulas super lia kapo? Tiu trankvila viena kaj berlina policistoj ne vivas en eterna sturmeca stato, kaj havas tempon fari tiajn delikatajn, honestajn kompleksetojn, kaj eduki malrapide sed efike koĉerojn kaj la publikon. Mi diras tute sincere: estus maljuste deziri ion similan de niaj kompatindaj policistoj.

SKIZO DE ROMANO

Por varieco la afabla leganto akceptu de mi skizon de romano. Kial ĝi ne fariĝis duvoluma dika romano, tion rakontas la objekto mem. Ekzistas romantemoj, kiuj efektive taŭgas nur por resti skizoj, nenio pli.

*

LA TUNELFRAŬDO

Romano en du volumoj

Antaŭ nelonge, en unu el tiuj belaj somertagoj, kiujn nuntempe ni ĝuas, d-ro Péter Rekta, parlamenta deputito kaj municipa komisiano de la ĉefurbo vekigis en la fru-antaŭtagmezaj horoj kaj petis enporti sian poŝtaĵon. La s-ro doktoro estis membro de iu komisiono, kaj kiel tia li ricevis invitilon kun la tagordo por la sekva kunsido. Unu tagorda punkto vekis en li iom da miro. Ĉi tiu punkto tekstis jene:

„Punkto 21: peticio de V. Z. & komp. pri la transformo kaj luigo de la tunelo en Buda”

D-ro Péter Rekta elsaltis el sia lito, rapide vestis sin kaj forkuris por informiĝi. Li volis scii, kiu estas V. Z. kaj liaj kompanianoj, kaj kion signifas la transformo kaj luigo de la Tunelo. Li ne bezonis multe klopodi, je la dek-unua kaj duono antaŭtagmeze li jam ĉion sciis. V. Z. & komp., kiel li konjektis, estis t.n. financgrupo. La transformo kaj luigo de la Tunelo estis unu el la plej plaĉaj ideoj de la lasta jaro. La financgrupo nome decidis vendi la Tunelon en Buda, kiu, por tiel diri, ŝimas senutile sub la Fortikaja monto. Por tiuj kelkaj homoj, kiuj trafikis al Buda tra ĉi tiu truo, vere ne valoras funkciigi ĉi tiun institucion, oni do decidis, turni sin kun belega metropol-inda plano al la ĉefurbo kaj registaro, kaj fari el la Tunelo mond-faman vidindaĵon, kiu multe altiros fremdulojn, kaj kiu jam ankaŭ pro sia specialeco apartenos al la mondmirindaĵoj de la kontinento. La plano estas murfermi ambaŭ ekstremojn de la Tunelo, por bloki ĝin por eterna tempo antaŭ la trafiko. Ĝian internon, la tiel formitan spacon oni inundos per la lumo de mil elektraĵ arkolampoj, anstataŭ la nunaj du trotuaroj oni starigos laŭlonge de la muroj longajn velurajn sofojn, plialtiginte la nunan veturvo-

jon je 40 centimetroj kaj tegante ĝin per verda drapo, transformante ĝin en bakaratan tablegon. Laŭ la desegnistoj ĝi estos la plej granda bakarata tablo de la mondo, kiu jam nur pro tio meritas ŝtatan kaj urban subtenojn. Estante nome la longo de la Tunelo 349 metroj kaj 66 centimetroj, la bakarata tablo mem estos 394 metrojn longa, ĉar la du rabcivandoj, fermantaj la pordojn de la Tunelo okupos 66 centimetrojn. Ĉirkaŭ la tablo povos okupi lokon samtempe 700 ludantoj, kio superfluigos ĉ. sepdek ĉefurbajn kartludajn klubojn, ĉar, kiel sciate, ĉirkaŭ ordinara kluba bakaratablo povas sidiĝi nur 10-12 ludantoj. La financgrupo pretas pagi por la lupreno de la Tunelo por tia celo ĉiujare 500 kronojn, kaj samtempe permesi, ke la piedirantoj kaj veturiloj, celantaj al Buda, sen ĉiu aparta takso-pago povos uzi la Albrecht-vojon. Krome la financgrupo havas nur kelkajn malpli gravajn petojn al la ĉefurbo: la urbo alprenu la taskon hejti vin-tre la Tunelon per gaso, donu la elektran kurenton por memkosta prezo kaj subvenciu la institucion, plivigligantan la fremdultrafikon, per okdek mil kronoj jare. Kiam d-ro Péter Rekta eksciis tion, li ekindignis. Li ne bezonis longe cerbumi, baldaŭ li rekonis, ke ĉi-foje temas ree pri ia fraŭdo. Unue li kredis, ke la plano ne povos gliti tra la instancoj, kiuj decidas pri tiaj aferoj, sed kiam en la suda promenejo li renkontis d-ron Intervenat, bonnoman ĉefurban advokaton kaj partiestron, kaj aŭdinte de li, ke la plano renkontas ne nur en la urbodomo sed ankaŭ en la distriktaj kluboj grandan akceptemon kaj simpatiecon, li iom ektimis. Senhezite li kuris en iun redaktojn kaj prezentis siajn informojn. La redaktoro rigardis lin fikse kaj demandis:

— Ĉu vi pretas lanĉi kampanjon kontraŭ ĉi tiu fraŭdo en mia gazeto?

D-ro Péter Rekta feliĉe pretis kaj promesis al la redaktoro, akiri en dudek kvar horoj ĉiujn rilatajn ciferojn kaj en la sekvataga numero skribi la historion de la fraŭdo, ekspliki la malmoralecon kaj damaĝecon de la plano, do, kiel ni, flamanimaj purigistoj kutimas diri: li dispafos la firuzajon. Promesinte ĉion ĉi, li rapidis hejmen por tagmanĝi. Por konfesi sincere, li estis feliĉa, ĉar li sentis, ke li pravas. Ankoraŭfoje li papilie tralegis siajn notojn kaj kapskue li konstatis, kiel aŭdaca, eĉ kiel impertinenta estas ĉi tiuj plano. Li konstatis ankaŭ, ke la ideo estas tiel okulfrappe diabla, tiel profunde kanajla, ke havos facilan farendon tiu, kiu elpaŝos kontraŭ ĝi kaj volas malhelpi ĝin. En ĉi tiu feliĉa konscio li tagmanĝis kun trankvila konscienco.

Je la tria posttagmeze aperis ĉe li la advokato kaj opinigvida viro d-ro Intervenat kaj jene parolis al li:

– Pripensu, mi petas vin, kion komunan vi havas kun ĉi tiu afero? Via konsultejo bone progresas, ĉiuj ŝatas vin, neniuj ofendas vin, vi havas karan edzinon kaj belan infanon, vi vivas trankvile en Peŝto kaj somere trankvile somerumas sur la bordo de Balatono, kial vi havigus al vi malamikojn? Kial doloras vin la kapo pro la Tunelo? Neniun sencon havas, ke dum ĉiu paŝo okazas ĉirkaŭ vi po unu fraŭdo, vi elprenas unu el la multaj kaj atakas ĝin. Kaj se temas pri tio, ke vin ĝenu la manko de la Tunelo, se vi volas ekskursi, mi jam nun povas deklari al vi, ni, deflanke de la financgrupo, pretas disponigi pli favoran veturtarifon por vi kaj por via familio, por viaj ekskursoj en la naturon.

Post kiam d-ro Rekta forigis sian kolegon per kelkaj piedbatoj, kaj viŝinte sian ŝuon, li residiĝis al sia skribotablo, por prilabori siajn ciferojn por la gazeto, refoje oni sonorigis. Lia bofrato aperis, kiu estis direktoro de la Ĉefurba Banko Nazo en ĉiu Vazo, kiu banko famis pro tio, ke ĝi financis eĉ la noktan vendadon de sukeritaj oranĝoseloj en Budapeŝto.

– Vidu, bofrato – li diris –, mi aŭdas, ke vi volas harfendi pri la Tunel-afero. Vi tre bone scias, ke mi estas seninfana homo, kaj mia proprietaĵo herediĝos al viaj infanoj. Ĉi tiu Tunel-afero estas bela plano, kiun pitanime pensantaj budapeŝtanoj ne komprenas. Male, Parizo, Berlino aŭ Londono kaptus avide-senvide por la ideo, estas nur malbone, ke ne troviĝas tie tunelo, taŭga por tia celo. En Budapeŝto ĉiu parolas tiafoje pri fraŭdo. Ne lasu vin fali en ilian kaptilon, ĉu vi ne rimarkas, ke ili volas uzi vin nur kiel rimedon? Eksciu, ke mi estas interesita en la afero je sepdek mil kromonoj. La ceteron mi fidu al via konscienco.

D-ro Rekta piedbatis eksteren sian bofraton jam ne kun tia decidemo kiel la supre menciitan kolegon. En lia animo ankoraŭ flagris la fajro de justa indigno, sed en liaj piedbatoj jam ne enestis tiu nemiskonebla elano, kiu karakterizas veran purigiston. La flankaj cirkonstancoj, menciitaj de lia bofrato donis certan velkecon al liaj movoj, tiom ke la bofrato, faka aŭtoritato pri prijuĝo de piedbatoj ankaŭ rimarkis al la grupo de bankieroj, atendantaj zorgoplene en la pordokoridoro:

– Li piedbatis min eksteren, sed ne laŭkore.

D-ro Péter Rekta ree sidiĝis al sia tablo kaj profundigis en siajn paperojn. Post duonhoro oni ree sonorigis. Lia plej bona amiko, d-ro Arnold Agresem aperis en lia ĉambro. Ili manpremis, kaj Arnold tuj transiris al la temo:

– Kara amiko – li diris, vi scias pri mi, ĉu, ke mi estas naskita malamiko de ĉiu fraŭdo?

– Mi scias – respondis Péter.

– Vi scias, ĉu, ke mi kutimas lukti tutforte kontraŭ publikaj kanajlaĵoj?

– Mi scias.

– Nu – diris d-ro Agresem, leviĝinte de sia seĝo kaj rektiĝinte –, mi aŭdas, ke vi volas ĉikani la Tunel-grupon. Mi deklaras al vi, ke konsciencie mi traekzamenis la tutan planon kaj trovis en ĝi nenion tian, kio kiun ajn rajtigus al objekto kontraŭ ĉi tiu plano. Kaj se mi diras al vi ion tian, mi prenas sur min ankaŭ ĉiujn sekvojn de ĉi mia deklaro.

D-ro Péter Rekta konsterniĝis. Li konis Arnold Agresem kaj sciis pri li, ke en multnombraj fraŭdaferoj li senindulge atakis tiujn, kiuj volis riĉiĝi malutile al la publika proprieto. Li do turnis sin al sia amiko kaj pafis al li ĉi tiun demandon:

– Kiu estas la jurkonsilanto de ĉi tiu financgrupo?

D-ro Arnold Agresem sonore ekridis:

– Mi.

Péter malgaje adiaŭis sian plej bonan amikon. Ni devas noti, ke tiun li jam ne piedbatis eksteren, nur milde elpuŝis tra la pordo. Kaj li restis sola kun siaj pensoj. Kiam li residiĝis al sia skribotablo, li sentis, ke jam ne restis en li sincera konvinkigo, kiu tiel gravas en luktoj kontraŭ fiaĵoj. Kvankam evidentas, ke li ne estas subaĉetita. Oni nur *parolis kun li*. Kaj Péter sentis, ke pli forta armilo estas en la mano de fraŭdisto ol minacoj, premoj, subaĉetaj provoj; rimedo, kiun oni nomas *paroli kun li*. Nun li jam ne skribis tiel febre la senvualigan artikolon ol pli frue. Li intermetis longajn paŭzojn, liaj pensoj de tempo al tempo devojiĝadis, kaj preskaŭ li ĝojis, kiam dum lia laboro nova sonorado interrompis lin. La ĉambristino enlasis la

fremdulon. Tiu estis neniŭ alia ol la universitata profesoro, ĉe kiu la filo de nia Péter devos aŭtune fari la lastan ripetan ekzamenon.

– Mi venis nur pro tio – komencis la s-ro profesoro –, ke oni vizitis kaj petis min paroli kun vi.

– En kiu afero?

– En tiu certa Tunel-afero.

– Kaj per kio mi povas servi al la profesora moŝto?

– Mi volas konvinki vin, ke oni misgvidis vin.

– En kiu senco?

– Vi estas naiva kaj honesta homo. Eble vi eĉ ne scias, ke oni lanĉis kontraŭ la Tunel-societo vastan ĉantaĝan kampanjon. La publike konataj ĉantaĝantoj, kiuj en ĉiuj similaj aferoj kutimas ataki la entreprenantajn financgrupojn ĉe la ŝtato, municipoj, ne kuraĝas elŝovi ŝin en la lumon, ĉar ili timas la juran konsilanton de la entrepreno, la modele elegantan Arnold Agresem, ili scias pri li, ke li senindulge senvualigus ilin. Ili do bezonas tiajn senkulpajn homojn kiel vi. Ili incitas vin en la nomo de la vero, vi indignas, diras paroladon antaŭ la parlamento, en la ĉefurba asembleo, verkas artikolojn en gazetoj kontraŭ la afero, kaj kiam vi faras ĉion ĉi, vi eĉ ne konjektas, ke vi fariĝis propre rimedo de ĉantaĝa kompanio, kiu minacas per via nomo, kaj kiu fine estos subaĉetita. Kaj tiam vi restos sola kun via indigno, kaj se vi ankaŭ plu kuraĝos paroli, simple ili kalumnios vin, ke vi faras bruon, ĉar vi ricevis nenion. Ĉion ĉi mi diras ne pro tio, ke la futuro de via kara filo estas deponita en mia mano, sed ĉar mi pli bone konas la vivon ol vi, kaj mi volas domaĝi vin de intermiksiĝo en tian aferon. Kion komunan vi havas kun la Tunelo? Restu trankvila kaj ne zorgu pro aliulaj problemoj!

Ĉi tiun sinjoron Péter Rekta jam nek piedbatis, nek elpuŝis tra la porto, ĉi tiun sinjoron li bele ĝentile elakompanis. Li reiris al sia skribotablo, ankoraŭfoje malgaje trarigardis siajn ciferojn kaj notojn, legis la enkondukon de la senvualiga artikolo, kiun li jam skribis, eksuspiris profunde kaj disŝiris la manuskripton. Poste li etendis la manon al la leterpaperujo, elprenis elegantan, grizan kartonfolion kaj surskribis jenon:

Tre estimata s-ro redaktoro! Hieraŭ mi faris promeson al via redaktora moŝto, skribi artikolon, surbaze de miaj akiritaj informoj, por via alte taksata gazeto pri la Tunel-fraŭdo...

Ĉi tie li faris paŭzon, forstrekis la vorton „fraŭdo” kaj skribis anstataŭe „afero”.

...pri la Tunel-afero, kiu estos baldaŭ traktata en koncerna loko. Je mia plej granda bedaŭro mi devas informi vin, ke por afero de unu el miaj klientoj mi bezonas veturi senprokraste al Vieno, do mi ne povas skribi la artikolon. Kun aparta estimo: d-ro Péter Rekta.

Ĉi tiun leteron li tuj sendis per knabo al la redaktoro. Kaj siajn ciferojn kaj notojn li ĵetis en la fornon, en kiu, rigarde al la supre menciita morna somera vetero, la fajro vigle flagris. Li eksuspiris kaj sentis tiel, ke ŝtono falis de lia koro. Li estis preskaŭ feliĉa, ke li malimplikiĝis el ĉi tiu afero. *Oni parolis kun li.* Li eliris marŝi iom sur la Danub-borda promenejo, kaj tie li meditis pri tio, kio estas la diferenco inter viro, kiu silentas nepagata kaj tiu, kiu silentas por mono. Post longa cerbumo li rekonis, ke inter la du estas nur unu diferenco, nome ke pri la nepagata silentanto oni ankaŭ ridas. Sed d-ro Péter Rekta nun jam eĉ pro tio ne zorgis, en sia koro li estis iom malgaja, ĵetis rigardon al sia horloĝo, sidiĝis en droŝko kaj kiel li promesis, li veturis por sia edzino, kiu amuziĝis ĉe la edzino de d-ro Arnold Agresem en tekunveno. Pli multe li tute ne okupiĝis pri la afero.

MODERNA LEGENDO PRI LA ĈAMPIONO DE LA VERO

kiu vivis en Budapeŝto en la jaro 1913 de la Sinjoro, mirinda historio pri liaj diversaj peripetioj kaj aparte pri lia fino por la instruigo de honestuloj

La junulo, kies mallongan historion mi, ravita de la arĝenteca vualo de la legendo, estas rakontonta, elpaŝis iun printempan frumatenon el odoraĉa kafejo kaj decidis antaŭ la domo n-ro 43 de la avenuo Andrásy, roli de nun kiel ĉampiono de la vero. La junulo estis malriĉa, havis nenion alian ol t.n. skriboplumon. Per ĝi li intencis kontraŭbatali tiun publikan frenezon, malmoraligon, koruptecon kaj turaltan moralan rubon, kiun li vidis ĉirkaŭ si. Li do direktis siajn paŝojn al la Urba Parko, rapidante eksteren sub la liberan ĉielon de Dio, kie neniuj tera bruoj ĝenas onin, kie lia animo povos senpere kontakti kun la Sinjoro. Pro lia altfluge inspirita mieno konsideris lin la decida plimulto de la preterpasantoj jam en ĉi tiu frua horo frenezulo; damo, kiu tenante en la mano sian strutpluman ĉapelon, rapidis hejmen kun frakita ebrulo, eĉ donis frapon al li sur la dorson. La junulo tamen ne sentis ĝin, kiel ankaŭ tiujn puŝojn li ne sentis, kiujn li ricevis de frue ellitiĝintaj fraŭdistoj, rapidantaj al sia laboro, ĉar lia animo estis plena de la aromo de la vero, liaj pensoj ŝvebis malproksime en sanktaj altoj, kaj li rapidis eksteren, en solecon, por laŭplaĉe konversacii kun tiuj sanktaj viroj, kiujn li antaŭvidis por protekta rolo.

La junulo fine alvenis en la senfina kamparo, kiu etendiĝis ekster la urbo. Li haltis kaj ĉirkaŭrigardis. Malantaŭ lia dorso muĝetis kun formortanta murmuro la kulpa urbo vekiganta, ĉirkaŭ li de minuto al minito senbrue altiĝis la valoro de la parceloj, sed kiam li levis siajn okulojn al la pure blua ĉielo printempa, li forgesis ĉiun teran fiaĵon, kaj ĉar liaj intencoj estis puraj kiel la neĝo, antaŭ ol ĝi atingas en la urban atmosferon, li povis vidpenetri en la brilan ĉielon kaj laŭplaĉe konversacii kun sanktaj viroj. Pro tio, ke li estis ĵurnalisto, unue li levis sian rigardon al Sankta Paŭlo, patrono ne nur de akristoj, korboplektistoj, potistoj, ŝnurŝpinistoj kaj tapiŝteksistoj sed ankaŭ de ĵurnalistoj. Ĉar li preparis sin esti ĉampiono de la vero, li serĉis per sia rigardo la patronon de juĝistoj, Orbuŝan Sanktan Joh-

anon, episkopon kaj doktoron de la eklezio. Li ne forgesis ankaŭ pri la ĉiela patrono de verkistoj kaj poetoj, Sankta Georgo el Nazianzi, patro de la eklezio kaj aŭtoro de centkvindek ok poemoj, eĉ li tiom klopodis serĉante altan protektadon, ke li vokis helpe ankaŭ Sanktan Aŭgustenon, patron de la eklezio, kiu fariĝis el la malamiko de la eklezio ties plej fidela amiko, kaj kiun la presistoj estimis kiel sian patronon.

Post kiam li vokis helpe ĉi tiujn sanktulojn por la puriga laboro, por kiu li tiel arde preparis sin, kaj post kiam laŭ ilia afabla rideto li kun rajto povis konkludi, ke li estas trovita pura kaj elektita por la rolo de la ĉampiono de la vero, li ekiris returne en la urbon, por skribi pri ĉio kaj diri pri ĉiu la veron. Jam antaŭtagmeze li aperis en la redakto de populara vespera gazeto kaj kun inspirita voĉo, plena de la ardo de bona ago, li skribis artikolon kontraŭ la kluboj, establitaj por kartludado, indikante per nomoj tiujn sinjorojn, kiuj perlaboras cent-milojn el la kartluda mono de siaj malfeliĉaj kunhomoj, blindigitaj de la pasio. La vespera gazeto aperis en la posttagmezaj horoj, kaj la junulo jam en la vesperaj horoj ricevis plurajn tiel sonorajn vangofrapojn de kavalirecaj klubestroj, ke parto de liaj dentoj elfalis, kaj lia vizaĝo ŝvelis pufa kiel melono. La junulo akceptis kun feliĉa rideto ĉi tiun suferon, sed frumatene li ree aperis sur la soleca kampo kaj tiel li vokis al la supre nomitaj sanktuloj:

– Patroj, al mi ne doloras la batoj, kiujn mi ricevas en la lukto por la vero, kaj ne pro tio mi venis. Sed se oni elbatas miajn dentojn, mi ne povos ronĝi, se oni ŝveligos mian vizaĝon pufa kiel melono, mi ne povos iri inter homojn, kaj do unuflanke mi malsatmortos, aŭ mi ŝanĝiĝos monstro, tiel mi ne povos servi la veron. Helpu min!

Liaj protektantoj rekonis, ke li pravas, kaj kun iom da interveno ili akiris ĉe la Sinjoro, ke la ĉampiono de vero fariĝu imuna kontraŭ ĉiu korpa doloro, liaj dentoj, ostoj estu nerompeblaj, liaj karnaj partoj netranĉeblaj kaj neŝveligeblaj, por ke kruelaj bategoj, glavohakoj, pistolpafoj ne povu malhelpi ĉi tiun puraniman junulon ĉe la disanoncado de la vero en Budapeŝto. Konsciante tion, la junulo feliĉe revenis en la urbon, anoncis kaj kunvokis popolan mitingon en la granda halo de Baldomo, kaj tie li listigis tiujn multajn misojn, kiujn li sciis pri la gazetaro. Matene de la sekva tago li trarigardis la ĵurnalojn, kiuj publikigis raportojn pri lia prelego, kaj li legis en ili la plej gravajn atakojn kontraŭ liaj gepatroj, gefratoj kaj honesto. Pro

tio, ke tio kaŭzis al li profundan doloron, ree li eliris al la sanktuloj kaj tiel li petpreĝis al ili:

– Patroj, faru min imuna kontraŭ ĉiu anima doloro, ĉar mi estas homo, kaj la tono de ĉi tiuj ferocaj atakoj muelos mian animon, kaj kun rompita animo kiel mi estu ĉampiono de la vero?

Liaj altaj protektantoj trovis komprenebla, ke la veron povas anonci nur iu tia, kiu staras super la atakoj, kaj baldaŭ elpetis por li kompletan animan imunecon kontraŭ ĉiuj malicaj kritikoj, mensogoj kaj honestofendoj. Li feliĉe alpaŝis ree la purigan laboron, forlasis la ĵurnalismen, trovis dungon en banko, kaj post kiam li akiris al si enrigardon en la nigrajn negocojn de la ekonomio, li levis sian voĉon kontraŭ la ruzoj de la grandaj bankoj por la defendo de la malriĉuloj. Sekve de kio oni elĵetis lin el lia dungo, kaj post kiam nenie oni redungis lin, li ree turnis sin al siaj patronoj, dirante:

– Patroj, dum mi bezonas monon por manĝo, mi ne povas libere anonci la veron.

La sanktaj patroj ne bezonis longe konsiliĝi, ili rekonis, ke ili bezonas plifaciligi la belan laboron de la ĉampiono de la vero per tio, ke ili liberigos lin el sub la zorgoj de la stomako. Ili do elpetis por li la donacon, ke se li plensuĉas sian stomakon per aero, li iĝas satmanĝinta. Tiel li neniam trud-iĝos vendi siajn konvinkojn por mizera mono, por akiri la necesajn manĝaĵojn por la nutrado de sia korpo. La junulo do eliris al la placo Oktogon, kaj atakis filoganton de infanknabinoj per arda parolo. La altranga kavaliro defiis lin al duelo, kaj la kuglo susuris preter lia orelo. Savinte sin feliĉe, li iris de la okazejo de la duelo rekte sur la kampon, kaj levinte alĉiele la okulojn, turnis sin kun nova plendo al la ĉielaj altranguloj.

– Patroj – li diris –, ĉi tiu okazintaĵo memorigis al mi, ke en duelo aŭ ekster duelo povos min simple mortpafi tiu, por kiu la vero estas malagraba. Kaj tiam mi vere ne povos disanonci plu la veron, ja kiel mi povus disanonci ĝin montinta.

Ĉi tiu rezonado estis tiel simpla, ke liaj patronoj sen ĉia interkonsiliĝo tuj rapidis al la plej alta Potenco, ĉe kiu ili elpetis por li senmortecon. Kaj nun jam vere kuraĝe almetis sin la ĉampiono de la vero al la puriga laboro, fervore atakadis maliculojn, kaj kiomfoje oni trapafis al li la koron, ĉiufoje li serene ridetis kaj diris ĝisfine sian paroladon, kiun li ĝuste komencis. Nun

la homoj jam timegis lin, la ĉampiono de la vero ĉiutage, de mateno ĝis vespero diradis la veron, sed li spertis, ke li bezonos anonci ankoraŭ dum plurmil jaroj la vortojn de la moralo, ĉar tiel amasege akumuligis la friponaĵoj. Sed li trafis novan, neatenditan baron. La homoj, vidante, ke ili ne povas malutili al li en ajna maniero, ĉar liaj korpo kaj animo estas imunaj kontraŭ homaj ofendoj kaj lezoj, vidante, ke li povas vivteni sin el la nura aero, ili simple kaŝis sin for de li. Nenien oni enlasis lin, se li ie komencis oratori, oni diskuris tiel, ke iun belan tagon la junulo rimarkis, ke la homoj simple elkomunumigis lin, li ne plu havis aŭskultantojn, li estis metita sub bojkoton kaj sentis tiel, ke oni malhelpas lin en lia laboro, ĉar al kiu li anoncu la veron, se ne troviĝas homo viva, kiu aŭskultas lin? Li do devis ree iri al siaj potencaj protektantoj, antaŭ kiuj li ekplendis per la sek-vaj vortoj:

– Patroj, mi restis sola. Se oni ekvidas min, oni forkuras. Kion mi faru?

La patrojn preskaŭ perpleksigis ĉi tiu menslaboriga problemo. Ĉar kiom valoras la ĉampiono de la vero, se mankas, kun kiu li luktu? Sed ilia konsiliĝo donis rezulton, ili intervenis ĉe la Aranĝanto de Ĉiuj Sortoj, kaj post nelonge ili povis doni al la juna ĉampiono de la vero la donacon de nevidebleco, kiu kapabligis lin, ke aperinte kie ajn, li ja estis nevidebla, povis surprizi la homojn, kiuj ne plu povis forkuri de li. La junulo, kiam li revenis en la urbon por daŭrigi sian laboron, kredis, ke nun jam neniun malhelpos lin en lia agado. Li iĝis nemortebla, senkorpa, nevidebla. Li do iris al lokoj, kiel promenejo, teatro, kaj tie li komencis paroli. Sed al la homoj ne konsumiĝis rimedoj defendi sin kontraŭ la vero. Kiam ili rekonis, ke la junulo tiel batalas inter ili, ili simple ŝtopis al si la orelojn, kaj ruze rikanis unu al aliaj, konstatinte, ke vanaj pruviĝis ĉiuj mirakloj, la ĉampiono de la vero vane luktadas, neniun aŭskultas lin. Tiel do, spertinte ĉi tiun frapan malsukceson, la junulo denove aperis sur la kampo, parolante jene:

– Patroj, se vi jam ĝis nun helpis min, ne lasu min en peĉo!

Post longa kaj pena laboro la patroj elpetis por la junulo, ke li ne bezonu paroli al la oreloj de la homoj, sed ricevu kontakton rekte kun iliaj animo, konscienco, pensoj, tiel do kiam la junulo parolis al la homoj kaj ili vane ŝtopis siajn orelojn, ĉiu aŭdis la veron, ene, en siaj pensoj. Plue neniun povis forfermi sin de li. La junulo estis jam preskaŭ feliĉa, ĉar li pensis, ke tiom da elstaraj ecoj eble kapabligos lin ripari la homaron. Li do luktis

tage kaj nokte, longe, tute ĝis kiam li trafis la lastan obstaklon. Kaj tiel li vortigis ĝin antaŭ la patroj:

– Patroj, nun jam ĉio estus en ordo, restis nur du tuberoj. Unue, mi povas lukti nur kontraŭ tiuj maljustaĵoj, pri kiuj mi informiĝas. Milionoj da friponaĵoj restas kaŝitaj por mi. Due estas malbone, ke dum mi luktas en Budapeŝto, la homoj plu malicas en Nov-Jorko. Do bonvolu elpeti por mi, ke mi ĉion eksciuj kaj samtempe mi povu esti ĉie kaj paroli kun la animo de ĉiu homo.

La patroj – ankaŭ pro tio, ke ĝis nun ili multe devontigis sin por la junulo – turnis sin ankaŭ kun ĉi tiu peto al la Trono. Sed la Sinjoro diris al ili:

– Ĉu vi ne rimarkas, ke se mi donos al ĉi tiu junulo krom senkorpeco, nemortebleco, rekta kontakebleco kun aninoj kaj lia vero ankaŭ tion, ke li estu ĉioscia kaj ĉieesta, tiam mi faros el li duan Di-Sinjoron?

La patroj portis la respondon al la junulo:

– Tiam – diris la junulo – okazis ĉio vane.

– Tio estas Lia volo – respondis la patroj.

– Ĉu do por tio, ke el iu perfekte emanu la vero – demandis la junulo –, tiu devas esti dio? La ĉampiono de la vero devas fali, se lia potenco estas nur je unu hareto malpli ol tiu de la Sinjoro?

– Ŝajnas tiel – respondis la patroj kaj ame etendis siajn benajn manojn super la junulon.

La junulo malgaje reiris en la urbon kaj rezignis esti triumfa ĉampiono de la vero. Li redonis siajn brilajn privilegiojn, kaj refariĝis simpla homo kaj silentis. Neniu plu ofendis lin. Ankaŭ nun mi ofte vidas lin, dum li aŭdas grandan maljustaĵon kaj faras nenion alian ol malgaje li skuas la kapon. Kelkfoje li ankaŭ suspiras. Sed li jam ne luktas. Li jam scias, kio li bezonas fariĝi, por lukti. Kaj tio estas neebila. Li do vivadas plu – kiel homo.

FRANCA ĈAMPANO EN LA ĈARDO

Serĉante inter malnovaj paperoj mi trovis en forgesita notlibreto ĉi tiun unulinian noton: „Franca ĉampano en la ĉardo, remistaj kluboj”. Leginte ĝin, tuj memoriĝis al mi la tuta historio. Antaŭ multaj jaroj mi notis ĉi tiujn vortojn en la verda libreto, por uzi ilin en tiu certa granda, hungara socia romano. Sed la tempo pasas, kaj el la planoj pri sociaj romanoj skribiĝas parte gazetaj kontribuoj, parte ili fariĝas fumo en kafejoj, kaj oni faras plej bone, se tian malgrandan sperton oni skribas sen glazuro tiel, kiel ĝi okazis, Eble troviĝos iu, kiu amuziĝos per aŭ enpensiĝos pri ĝi.

Laŭlonge de Danubo supren, trans Vác ni migradis foje somere. Ĉirkaŭ tagmezo ni devis serĉi gastejon, kie la societo povus tagmanĝi. Post longaj serĉoj ni trovis ĉardon ĉe la bordo. La plej mizeraj, kadukaj ĉardoj, priskribitaj de Pefőfi, devis esti tiaj kiel ĉi tiu, kiun ni salutis per triumfa bleko de la malsata junularo. Ni enkuris, petis tagmanĝon. Post kvin minutoj oni jam pelis la kokinon ĉirkaŭ la domo, kaj ni sidiĝis por ripozi kaj ĵetis rigardon al la interno de la taverno. Foje ni vidas, ke de sur breto rozkoloraj botelĉapoj brilas invite al ni en la duonlumo.

– Ĉampano!

Ni stariĝis sur seĝo por rigardi, ĉu efektive ili estis tio. Devis esti tie du-deko da boteloj Mumm, vera, bona franca ĉampano, kuŝigitaj laŭvice. Mi ne scipovis imagi, kiel trafas franca ĉampano en ĉi tiun kadukan tavernaĉon, situantan for de l’ mondo, malproksime de la plej proksima urbo Vác kaj eĉ pli malproksime de la plej moda „mara” banloko de la Erzsébet-kvartalanĵoj, do Nagymaros. De kie venus ĉi tien grafoj, baronoj, majoroj, bankdirektoroj kaj dramverkistoj, kiuj havas monon por franca ĉampano.

Ni voku la tavernestron!

– Kio estas tie supre? Ĉu ĉampano?

– Tio.

– Ĉu vera, franca?

– Tio.

– Kie vi prenis ĝin.

– En Peŝto.

– Kial vi ne tenas ĝin en kelo?

– Por ke oni vidu ĝin.

– Kiu diablo vidus ĝin en ĉi tiu mizera ĉardo? Kiu ekhavis ĉi tie soifon por franca ĉampano?

Ruze li ridetaĉis:

– Remantaj sinjoroj trinkas ĝin, sinjoro. Ili veturas de Peŝto supren en mallarĝaj boatoj. Tiuj trinkas ĝin.

Poste li fariĝis parolema kaj rakontis tion, pro kio mi notis la kazon en la notlibreto. Remantoj el Peŝto kutimas elboatiĝi ĉe li, ili baniĝas, tagmanĝas, dormas iom en la ombro, poste remas returne al Peŝto. Ili neniam trinkis ion alian ol ŝprucvinon. Ankaŭ da ĝi ne multe, nur unu ĝis du glasojn por la tagmanĝo. Sed foje okazis, ke du diversaj remgrupoj alboridiĝis samtempe ĉe la ĉardo.

Unu el la „mallarĝaj boatoj” alremigis nobelknaboj, la alian membroj de societo, kiu ĉe la membrigo ne metas sin sur klasa bazo, kaj ĝuste tial ĝi estas tute de klasa karaktero. La sinjoroj intersalutis malvarme sed ĝentile, sidiĝis al du apartaj tabloj. Poste la tavernista familio komencis peli la kokinojn ĉirkaŭ la domo. Neatendite eligis krion membro de la senklasa grupo:

– Tavernisto! Ĉu vi havas ĉampanon?

– Ĝin ni ne tenas – respondis la maljunulo.

– Nu, sekvafoje, kiam ni venos, ĝi estu. Krome ĝi estu franca ĉampano!

Ĉe la alia tablo iĝis granda silento post ĉi tiu mendo. Posttagmeze ili ĉiuj forremis. Sed nia tavernisto estis vivlerta homo, ie li aŭdis, ke per ĉampano oni povas multe gajni, kaj sen plu kalkuli kaj mezuri, li rapidis al Peŝto kaj provizis sin per franca ĉampano. Kiam ni preteriris tie, la afero statis proksimume jene.

Se venis unu remista grupo, tiu trinkis ŝprucvinon, ĉu ĝi estis nobelknaba, ĉu senklasa. Sed en la tagoj, kiam ambaŭ grupoj alvenis hazarde samtempe, en la taverno trinkis ambaŭ ĉampanon. Poste la afero plu avancis, ĉar kiam disfamiĝis, ke en la mizera ĉardo oni povas trinki ĉampanon, ne nur ĉe la renkontiĝo de klase diversaj grupoj sed en ĉiu okazo, kiam du diversaj societoj tagmanĝis en la taverno, estis konsumata ĉampano. Tiel do, la tavernisto fariĝis fine vera fakulo sur la kampo de la remsporto, ĉar li sciopovis diferencigi la uniformojn, kaj se li vidis du diversajn uniformojn, sen mendo aŭ endo li starigis ĉampanbotelojn antaŭ la du societojn. Kaj tiuj trovis tute natura, ke en tiaj okazoj oni devas brili per bravo. Kaj ili glutegis la francan ĉampanon. Tial viciĝis dudek boteloj da Mumm sur la breto. La tavernisto vivtenis sin, per kio en Budapeŝto riĉiĝis ne unu entreprenisto: el la publika konkuro de du, rase diferencaj sociaj klasoj de la ĉefurbo.

Mi remetis la notlibreton inter la malnovajn paperojn kun tio, ke tiu jarkedo kaj duono, kiu pasis post la noto, ja ŝanĝis la cirkonstancojn. Estas strange, sed ĉi tiu historieto jam havas malnovecan aromon. Ĝi estas tia, kvazaŭ ĝi estus okazinta antaŭ kvardek jaroj. Kie for jam estas hodiaŭ tiuj gajaj ĝentlemanaj konkuroj? Hodiaŭ, en la epoko de bankrotintaj judaj bienuloj kaj saĝe funkciaj nobelidaj borsmakleristoj ĉi tiu en libro sekpremita malnova memorfloko havas veran lavendan odoron. Kie for vi estas klasaj dueldefioj, balaj virumadoj kun ciganmuzikistoj, ĉampanumadoj pro spito? Mi ne surpriziĝus, se mi aŭdus, ke en tiu mizera ĉardaĉo nun jam konsumiĝas ĉampano ĉiufoje nur tiam, se *unu* grupo tagmanĝas tie. Kaj ke ĉi tiu grupo tuj kaŝas ĝin sub la tablon, se envenas kontraŭgrupo, ĉar ne estas sportece gluti alkoholon, kiam oni praktikas sporton. La klasa romantiko iel disvaporigis, kaj mi kredas, ke estas domaĝe pro tio, ĉar ĝi estis ĉiuokaze pli bela kaj agrabla ol ĉi tiu nuna kvieto, kiam oni konkuras ne per knaligo de ĉampankorkoj, bongustaj vangofrapoj, fermitaj baloj, ciganmuzikistoj kaj simile gajaj agrablajoj, sed ĉiu ludo okazas por kontanta mono, dungo, bieno kaj similaj malgajaj favoraĵoj.

LA ABRIKOTOJ DE RONGYÓD

Ĉapitro el socia romano, neniam skribota

Géza Görbe promenis perpiede hejmen el la stacidomo. Estis tre varme, do onklo Géza viŝadis la ŝviton de sia frunto, tenante grizan silkooombrelon super la kapo. Dum li amblis sur la modesta padeto laŭlonge de la kampa veturvojo, plenigis lin per feliĉo koni, ke ĉi tiu multa tero, etendiĝanta ĉirkaŭ li, apartenas al li. Li venis al fruktoĝardeno kaj haltis. Li disrigardis. La branĉoj de la abrikotarboj kliniĝis ĝistere, tiom ili plenis de fruktoj. Onklo Géza ridetis al la arbaro, ĉar ĝi estis lia ĉefa fieraĵo. Li ŝatus nomis sian bienon sur la malgrandaj etikedoj, gluataj sur liaj produktoj, „modela abrikotbieno de Rongyód”, sed la vorto estis tiel stranga, ke li timis ĝin. Sekrete li tamen nomis la tutan mastrumon abrikotbieno kaj okupiĝis pri nenio alia pli volonte ol pri siaj abrikotoj. Onklo Géza specialiĝis pri abrikotoj, eksportis ilin al Vieno, Dreseno kaj Berlino, kaj kiujn li ne eksportis, el tiuj oni faris en la dometo, blankanta malantaŭ la arboj, la faman abrikotan brandon de Rongyód, diskonatan pro siaj du ecoj: unue ĝi estis tia kiel la plej bona franca konjako, due onklo Géza scipovis proprigi al ĝi la karakteran guston de abrikotoj, nome tiel resteme, ke ĝi konserviĝis eĉ post jaroj en la brando. En la sama dometo oni faris la faman abrikotan konfitaĵon de Rongyód, kaj en la alkonstruaĵo, kiu fiere portis super sia pordo la surskribon kun oraj literoj „Marmeladejo”, la same disfaman abrikotan marmeladon de Rongyód, kies kremo veturis en malgrandaj bokaletoj al Londono, la pliparto tamen restis en nia patrujo, kaj de Karpatoj ĝis Adriatiko ĝi elpremiĝis el ĉiuj patkukoj, se oni umadis per malakra tranĉilo sur la patkukoj. La plej fieraj estis nia onklo Géza pri ĉi tiu marmelado, kiun li ŝatis kompari al fluida oro aŭ malhele flava flormielo, ne sen ĉia rajto, ĉar la abrikota marmelado de Rongyód estis tiel brile, apetitive kaj travidelbe orflava kiel la t.n. flava vazelino, kiun sensciaj infanoj tiom ŝatas ŝmiri sur panon.

Onklo Géza venis el la stacidomo, kie li konversaciis kun la staciestro pri la Désy-proceso. Neniu el ili estis opoziciulo, ambaŭ ĉiufoje voĉdonis por la registaro. Onklo Géza pro tio, ke tio favoris lian abrikotan mastrumon, kaj la s-ro staciestro, ĉar kial li, ŝtata dungito voĉdonu kontraŭ la registaro. Mi ripetas, onklo Géza venis el la stacidomo, kaj haltinte ĉe la abrikotarb-

oj, li ĉirkaŭrigardis. Ne pro tio li disrigardis, ke li volus vidi ion, sed ĉar li estis en peĉo. En granda peĉo.

Proksimiĝis nome la nomtago de la staciestro, kaj onklo Géza ĉi-jare ne vere sciis, kiel li konduku. La afero statis tiel, ke la tempo de fruktomaturigo en Hungario akurate koincidas kun la tempo de vagonmanko, kaj se tiutempe la Hungaraj Ŝtataj Fervojoj plensarĝus eĉ la pulmanojn per fruktoj, egale ili ne povus forveturigi tiujn multajn fruktojn, kiujn la publiko surloke ne povas konsumi. Tamen fruktoj ne konas ŝercon: se ili ne estas tuj forliveritaj, ili koleriĝas, aperigas makulojn kaj tiel rapide putriĝas, ke eĉ miri ne restas tempo. Kaj abrikotoj apartenas al tiuj fruktoj, kiuj estas la plej postulemaj tiutempe. Pomoj, piroj estas mildaj kaj lojalaj fruktoj, kiuj kun registar-partia pacienco akomodiĝas al la hungaraj fervojaj cirkonstancoj. Sed abrikotoj restis obstine opoziciaj fruktoj, ili ne faras portempajn paktojn, postulas konvenan, al terkultura lando decan fervojan politikon, ili obstrukcas, ĉar se ili ne ricevas vagonojn, ili kaĉeciĝas kaj fiĝoje mucidiĝas. Tiutempe infanoj kaŭras po cento vojrande en Rongyód kaj rompas inter du ŝtonoj la abrikotajn kernojn tiel, ke aŭdinte la klakadon de ĉi tiuj ŝtonoj, pasaĝero, alveninta de malproksime, kredus, ke ŝtonrompisto laboras kaj riparas la landvojon, sed pasaĝeroj ne estas tiel malsaĝaj, ĉar ili konas la cirkonstancojn, kaj se promenante al Rongyód, ili aŭdas ĉi tiujn bruojn, profunde suspirinte ili diras: „la sinjora moŝto refoje ne ricevis sufiĉe da vagonoj”.

La sorto de la abrikotoj do dependis en Rongyód de la staciestro. Ne pro tio, ke li donis vagonojn al tiuj, al kiuj li volis. Se tio estus tiel, eĉ unu abrikoto ne estus putrinta ĉe onklo Géza, ĉar en okazo de tiel grava vagonmanko la marmeladejo laborus kun duobla fervoro, kaj el la abrikotoj farigus marmelado, konfitaĵo, brando kaj konjako. La tuberon prezentis tio, ke la staciestro ĉiufoje promesis la vagonojn certaj, kaj kutime nur lastminute evidentiĝis, ke restis neniu alia vagono ol du kerosenujaj, kaj en ili ne eblas transporti abrikotojn, ĉar, kiel sciate, la keroseno ricevus abrikotodoron pro ĉi tiu procedo. Tial la sorto de la abrikotoj dependis en Rongyód de la staciestro, kaj tial la ĉefo elektis el siaj tri nomoj, ricevitaĵe la baptado, tiun, kiu plej proksimis en la kalendaro al la tempo de la abrikotmaturiĝo. Do, ĉar ĉi tiuj tri datoj: abrikotmaturiĝo, vagonmanko kaj staciestra nomtago koincidis en Rongyód, onklo Géza disrigardis, kiel mi diris, ne pro tio, ke li volis vidi ion, sed ĉar li troviĝis en peĉo. Li ne kura-

ĝis komplezi per donaco al la staciestro okaze de lia nomtago. La ceteraj abrikotistoj en Rongyód hieraŭ ĥore kriis en la kazino, ke „vivu la sendependa hungara tribunalo, vivu Désy, Vivu Vázsonyi, for la fraŭdon!” Kaj sub tio ili komprenis, ke ĉi-jare onklo Géza ne ricevos ĉiujn vagonojn. „Ni tenos la aferon en vido”, skribus la gazeto *Rongyód kaj Regiono*, se ĝi ne estus pasintjare ĉesinta.

La staciestro de Rongyód nome estis grandpotenco koncerne fruktojn. Kiu vidis liajn fruktojn, tiu povus rajte kredi lin unu el la plej grandaj frukto-produktantoj de Hungario, kvankam lia bieno, situanta apud la stacidomo, ampleksis nurajn dek ses kvadratajn klaftojn, kaj ĉe la plej bona mastrumado kreskis en ĝi nenio alia ol du etaj rondfrondaj robinioj, tri saketoj da papavo kaj unu sufiĉe bonstata hundejo kiel mastruma konstruaĵo, instalita por unu hundo. Male, li havis tiel grandajn abrikotojn kiel melono, tiel grandajn pomojn, kiel akvomelono kaj tiel grandajn melonojn kiel bierbarelo. Kio kreskis bela kaj granda en Rongyód, tio apartenis al la staciestro. Foje al fruktoproduktisto naskiĝis ĝemeloj, kaj lia unua penso estis, donaci unu al la staciestro. Sed pli gravis ol ĉio la nomtago. Ĝi estis en Rongyód la nacia festo, festotago de nia reĝo Sankta Stefano, Kristnasko, Pasko, Novjaro, la dek-kvina de marto, memortago de la revolucio. Ĉirkaŭ la nomtago de la fervoja ĉefo grupiĝis la ceteraj tagoj de la jaro. Kaj la forto de onklo Géza estis tio, ke inter ĉiuj mastrumantoj li scipovis plej alte taksi ĉi tiun tagon. La s-ino staciĉefo ricevis ĉi-tage bukedon de la nepoj de onklo Géza, en ĝi belan broĉon kun diamanto. Pri vagonoj eĉ vorto ne aŭdiĝis dum la nomtago; la babiloj fluis nur pri ĝenerala estimo kaj persona simpatio. Kaj nun okazis malfeliĉo, ĉar proksimiĝis la nomtago, kaj la aero estis plena de paroloj pri fraŭdoj. La staciestro deklaris al onklo Géza, ke ĉi-jare li deziras preterlasi la kutiman nomtagan bondeziradon, ĉar kiel evidentiĝis el la Désy-proceso, la patrujo ne havas tiel etan vilaĝon, kies privataj aferoj foje ne estus trenitaj antaŭ la publikon de la lando. Kiu estus kredinta – proksimume tiuj estis la vortoj de la staciĉefo –, ke iam la gazetoj ne nur de la lando sed ankaŭ de la klera eksterlando precize kalkulos, en kiom da ĉambroj loĝas la minejdirektoro de Zalatna; kiu estus kredinta, ke eta kaj modesta ŝtatoficista dommastrumo kun siaj malgrandaj fenestroj, pordoj altaj je unu metro kaj okdek kvin centimetroj, t.n. plezurĝardeno kaj dudek tri ŝtupoj, kun ĉiuj siaj etburĝaj sekretoj kaj silenta viveto estas trenata antaŭ la publikon de la mondo, kien ĉiu enrigardas, en-

flaras, ĉion pripalpas kaj priumadas; kiu estus kredinta, ke iun someran posttagmezon inter la kvina kaj sesa horoj tuta Eŭropo gapas tra la fenestro de kabano en Zalatna, kaj eĉ la kokinostojn kalkulas sur la telero de la minejestro?

Proksimume ĉi tiuj estis la vortoj de la staciestro, kiam kun profunda suspiro sed decide petis la preterlasen de la ĉi-jaraj nomtagaj festadoj kaj ĉiuj ĝiaj konsekvencoj. „Dio scias”, tiel finis sian parolon la s-ro ĉefo, „Dio scias, kiam oni prenos nin ĉe la nuko en Budapeŝto sekve de hazardo, kaj tiam, koran dankon, sed mi ne petas tian konatecon.” Poste li ankoraŭ aldonis: „Ne, ne, ne gravas, estos, kiel estos, ĉiu proporcie kaj laŭvice ricevos vagonojn, kaj mi ne lasos min surĵeti per koto”.

Do estis embarase. En Berlino ĉi-jare mankos la abrikotoj de Rongyód, Dio mia, kion fari, estos pli da marmelado kaj brando. Vintre estos pli pufaj la patkukoj de Karpatoj ĝis Adriatiko. Sed la s-ro ĉefo ne lasos sin surĵeti per koto. Onklo Géza havos perdojn, sed kion oni faru en lando, kiu ne havas industrion, do ne produktas sufiĉe da fervojaj vagonoj, kiuj liverus la produktojn de la tero al la komercistoj? La grundo kaj klimato de Rongyód aparte favoras abrikotojn. Sed la ceteraj abrikotistoj eĉ tiom da vagonoj ne ricevis kiom onklo Géza. Ĉar onklo Géza estis la plej influhava. Kion do nun oni povas fari? Onklo Géza havas en Budapeŝto amikojn kaj parencojn, onklo Géza iniciatas kampanjon, ke la ŝtato konstruigu tiom da vagonoj, kiom necesas. Oni ne rigardu nin tute stultaj! Mi pagas la multan, pezan imposton kaj ne havas eblecon, liverigi por multa, kara mono miajn fruktojn?! Oni ne rigardu nin tute stultaj! Oni mendu tiom da vagonoj, kiom necesas. Tiam mi ne bezonos angori, ĉu la fruktoj amase putriĝos aŭ ne en mia mano. Ja prave, kial mi sola suferu? Fiaĵo. *Rongyód kaj Regiono* pravus, se ĝi ne estus ĉesinta. Mi ja sufiĉe hontis ĝis nun, la tutan jaron mi devis flati la staciestron por kelkaj mizeraj vagonoj, kiuj ŝuldiĝas al mi kiel al terkultura civitano. Oni ne rigardu nin tute stultaj! Estu justo!

Ĉi tiuj estis la vortoj de onklo Géza, kiujn li pensis sub la griza silkoombrelo, viŝante sian frunton. En la Désy-proceso li ne akceptis la vidpunkton de la opozicio, tamen la staciestro pravus. Kiu scias, kiam oni starigos lin en Budapeŝto antaŭ tribunalon, kien la publiko povas eniri nur kun enirbileto, sed onklo Géza pensis tiel, ke ankaŭ li pravis en la pasinteco, ĉar

li produktas abrikotojn en lando, kie sen nomtago oni ne transportas fruktojn.

– Kio estas tio? – demandis en si onklo Géza, kiam li ree ekmarŝis al sia kastelo. – Kio estas tio? Ĉu ankaŭ al Rongyód ĝisvenis guto da tiu desinfekta substanco, kiu produktiĝas sekve de tiaj procesoj? Kio estas tio? Ĉu en la tuta lando, ĉie estus kelkaj tiaj ektimintaj homoj, aŭ homoj, elfosantaj siajn pli bonan menson, koron kiel la s-ro ĉefo? Kio estas tio? Ĉu ĉie estus homoj, tiaj kiel mi, kiuj rekonis, ke per la nomtago de la s-ro ĉefo oni tamen ne povas ĝis eterna tempo glate elturniĝi, sed oni bezonas elvringi pli da vagonoj el la ŝtato? Kio estas tio? Ĉu eble la komenco de pli bonaj tempoj, ĉu la t.n. antaŭvento de la regado de la ordo?

– Certe estas tiel – diris onklo Géza, kiam li atingis sian kastelon kaj ekaŭdis la gajan bojadon de siaj hundoj –, ke de *unu* tia proceso ankoraŭ ne puriĝos definitive la tuta lando, sed mi taksas almenaŭ je cent mil la nombron de tiuj negravaj fraŭdoj, similaj al la mia, kiuj nuntempe subite ĉesis sub la influo de la proceso. Kaj ĉi-jare ni tre multaj kuiros marmeladon. Sed se ni, trudataj kuiri marmeladon pro manko de fraŭdoj, estos sufiĉe multaj, tiam la ŝtato mendos novajn vagonojn, kaj ne plu bezonatos fraŭdojn.

Kaj kiam li alsupris en la malvarmeta ŝtuparejo, li aldonis:

– Kaj ĉio ĉi okazos nur ĉe la abrikotoj. Kaj kiom da ceteraj, kiom da milionoj da ceteraj aferoj puriĝos, reordigĝos, kiom da milionoj da ceteraj laboroj estos pli valoraj, pli bonaj, pli belaj...

– Nu? – demandis lia edzino. – Ĉu oni atingis sian celon en la kazino per tiu opozicia bojado? Ni ne ricevos ĉi-jare vagonojn!

– Ni kuiros marmeladon – diris onklo Géza serioze. – Ne estu tiom bagatelema, Erzsébet, ne estu tiel bagatelema, ni kuiros marmeladon. Estos, kiel estos, sed fine tamen estos ordo en ĉi tiu lando.

Kaj solene li elrigardis tra la fenestro en la malproksimon, al la kurbiĝantaj abrikotarboj en la sunlumo.

MODERNA POPOLBALADO

Post vespermanĝo mi parolis kun sinjoro, kiu indigninta rakontis, kio okazis en la bulvardo. Dum homoj svarmis ĉirkaŭ la sepa vespere sur la trotuaroj, foje oni elverŝis ion el fenestro. Eble glason da akvo. La fluidaĵo trafis sinjoron de burĝa aspekto. Li haltis, deprenis sian ĉapelon, viŝis sin kaj rigardis supren. Pluraj proponis: „Ni eniru al la dompedelo, li diros, ke oni devas fari denuncon”. Sed la priverŝita sinjoro nur forgestis, kvazaŭ li dirus: „ba, sinjoroj, mi ĝojas, ke ne gladilo falis sur mian kapon”, kaj malaperis en la amaso, sen preni satisfakcion aŭ venĝi sin. La sinjoro, kiu rakontis tion, estis tre indigninta; li diris, ke la budapeŝtaj civitanoj estas tiom turmentataj de la vivo, ke ili jam havas nenian memkonscion, li diris ankaŭ, ke tio estas simbolo, kiu signifas, ke al la budapeŝtaj civitanoj oni povas fari ĉion, pli paciencaj martiroj ol ili ne troveblas en la tuta mondo.

Mi pensis: estas ne malbone, eĉ interese, foje oni povus priskribi, kion ĉian oni toleras en Budapeŝto. Poste mi hejmeniris kaj nokte mi komencis legi malnovajn versojn. Foje miaj okuloj trafis la sekvajn liniojn en la kanto de Jakab Buga, skribita fine de la 17a jarcento:

*Lupopelto mia triviĝis senhara,
Vinbotelon kovras ret' areneaja,
Surkorpe armeo da pedikoj pavas,
Ĉemizon mian pura neniŭ lavas.*

Mi legas ilin kaj diras en mi: ej nu, hodiaŭ jam neniŭ estas, kiu scipovus tiel malmole, kortuŝe kaj tamen neglekteme priversi sian materialan mizeiron. La fino estas eĉ pli bela:

*Damne, vivas mi, kiel vivi mi povas,
Metinte ventron al sunlum' mi ripozas;
Pipon mian fumas mi, se mi malsatas,
Kiel ĉiuj, iel-aĵne mi bonstatas.*

Mi legas ankaŭ ĉi tiun strofon kaj diras en mi: se vivus hodiaŭ tiu, kiu skribis ĝin, ni bezonus ne multe rompi al ni la kapon, kiel ni pripentru, prideseĝnu por la hungara posteularo ĉi tiun nunan, pigran, tristan, indife-

rentan, mizer-teditan kafejan bruton budapeŝtan, skribus tion en kvar versoj tiu, kiu tiel elokvente prezentis al ni la malsatantan, turmentatan *kurucan*.¹²

Kaj tie mi ree ekmemoras tiun kompatindan, surverŝitan Jakab Buga, kiu en la bulvardo viŝis sin kaj pluiris. Estas certe, ke ankaŭ la haroj de lia lupopelto triviĝis, kaj estas verŝajne, ke ankaŭ sur li pavadas, se ne tiuj salt-emuloj, pri kiuj Jakab Buga parolas, tamen ceteraj fidelaj bestoj. Tiuj, pri kiuj iu kara pentristo antaŭ nelonge diris: „Imagu, mi devis vendi miajn hundon kaj katon, la dommastro permesas teni nenium alian hejmbeston krom blatoj”. Revenis en mian menson ĉi tiu kompatinda, pacienca nekonato, kaj lia kazo, miksitita kun la etoso de la amara popolpoezio, donis al mi la ideon, ke mi jam devus verki modernan budapeŝtan popolbaladon, miksan ĝin kun la figuroj de la nuntempa vivo, en la tono de la hodiaŭaj gazetoj. Eble iam iu legos ĝin kaj kompatos nin almenaŭ tiel, kiel ni kompatas la bonan Jakab Buga tra la nebulo de ducent tridek jaroj.

Jen la fiksita skizo, al kiu ĝi plaĉas, povas versigi ĝin:

UNUA STROFO

Tra la fenestro elklinas sin registar-partia deputito, influa homo, ŝercema viro. En la mano li tenas glason. En la glaso estas, ni diru, akvo. Li elverŝas ĝin sur la straton, trafas per ĝi policanon sur la kapo. La policano ne lasas simple pasi la aferon, eniras la pordopasejon, rigardas sur la nomtabuloj, kiu loĝas tie, ekvidas la nomon de la deputito, sekviŝas sian kaskon kaj eliras, dirante laŭte:

– Pluvas.

Kial?

Ĉar li jam tediĝis pro la frostotremado en la stratoj kaj estante malnova, brava policano, li ŝatus esti transkomandita en la detektivan sekcion kiel civilvesta policano. La sekvan mardon li nepre iros al la deputito Interven, kial li trafu en kverelon ĝuste nun kun la registara partio, hejme li havas ok infanojn kaj nur ses povas ricevi supon. Pluvas.

¹² Batalanto kontraŭ la misuzoj de la Habsburga dinastio en Hungario en la 17-18a jc.

DUA STROFO

Vidas tion la registar-partia deputito, li kuras al la akvokrano kaj replenigas sian glason. Li atendas, atendadas, ĝis preteriras la ĉefpolicestro. Ekdo, ŝpruc; ankaŭ tiun li surverŝas. La ĉefpolicestro deprenas sian cilindran ĉapelon, sekviŝas sian belan, longan, blondan barbon, kaj kun fiĝoja ĉefpolicestra rideto paŝas en la pordopasejon, al la nomtabuloj de la loĝantoj, kaj pensas kun neesprimebla plezuro pri tio, kiel li igos asigni en la polic-ejon, puni, diskvaronigi kaj ŝtiparumi la ŝpruciginton. Li ekvidas la nomon, elvenas tra la dompordo kaj diras:

– Ĉi tiu pluvaĉo ne emas ĉesi.

Kial?

Ĉar se unusola homo komencas grumbli en la klubo, ke la ĉefpolicestro faras tion mise kaj alion improvize, aperas el la angulo dudek tri homoj, kiuj volas fariĝi ĉefpolicestro, kaj tiam la kontraŭ-ĉefpolicestra partio jam konsistos el dudek kvar homoj, kaj dudek kvar homoj farados ironiajn aludojn prie al la ĉefministro ĉe la sekva manifestacio, kiam oni ne sukcesos debati la amason. Kaj en la unua okazo, kiam la partio komencos magriĝi kaj oni bezonos ŝtopi la buŝon al la trobruantoj, la ĉefministro diros: „la ĉefpolicisto estas ankaŭ sen tio nepopulara, venu, kompano, sidiĝu en lia loko, ne hezitu!” Tial pravas teorie ĉiu ĉefpolicestro, kiam li havas la starpunkton, ke „ĉi tiu pluvaĉo ne emas ĉesi”.

TRIA STROFO

Vidas tion la gaja deputito kaj ree kuras por akvo, poste ree posteniĝas embuske ĉe la fenestro. Foje preteriras municipa viro, mi ne scias, ĉu vicurbestro aŭ nur konsiliano, sufiĉas, ke ne nomumita registara persono, nur elektita oficulo de la popolo. „Mi scivolas”, diras la deputito kaj priverŝas lin sur la kolo. La urba sinjoro rigardas supren, eniras la pordopasejon, poste elvenas kaj murmuras jenon:

– Mia edzino ja diris, ke mi kunportu pluvombreton.

Kial?

Ĉar kiu sidas sur la nuko de la elektita oficulo? La distrikta bankdirektoro kiel klikestro. Tiu voĉdonas kaj voĉdonigas por li. Kies portisto,

hundolavisto, filo, fianĉo, laktofrato estas la distrikta bankdirektoro kiel klikestro? Tiu de la registaro. Kial? Ĉar alie en naŭ el dek distriktoj la komunumaj elektantoj fajfus pri li. Kun kiu do la elektita, libera, sendependa oficulo devas esti en bona rilato? Kun la bankokliko kiel ĝenerala direktoro kaj kun ties laktofrato, la ĉiama registaro. Ĉu do estas mirinde, se li ekmemoras la benindan, zorgeman edzinon, kiu estis dirinta, ke li kunprenu pluvombreton?

KVARA STROFO

„Ej nu”, diras nun supre la deputito, „nun venas generalo”. Li kuras por akvo kaj surverŝas lin, ĉar li jam trokuraĝiĝis kaj scivolas, ĝis kiam li povas streĉi la kordon. La generalo sulkas la brovojn, klakante per sia glavo enpaŝas la pordopasejon, kaj baldaŭ reaperas kun afabla mieno, klakante per sia glavo kaj diras:

– Mil bomboj kaj mitrajloj, la tegmentorando gutas!

Kial?

Ĉar ĉio utilas al lia kariero krom kruci la spadojn kun registar-partia deputito, kiam oni petas novajn cent-milionojn por la celoj de la armeo, kaj ĉiu generalo estas kara ĉe la kortego, krom tiu, kiu pro ajna bagatelo, kreas atmosferon kontraŭ la glata voĉdonado de la armeaj elspezoj.

Tial gutas la tegmentorando.

KVINA STROFO

Nia deputito kuras por nova dozo, ĉar li vidas proksimiĝi potencon milionulon, kapitaliston, sendependan de ĉiuj, bankdirektoron, kiu havas hejme cent milionojn en sia noktoŝranketo, kaj antaŭ kiu ĝistere kurbiĝas la ministroj. Ŝpruc, li surverŝas lin. Nia riĉulo ridetas ironie, kvazaŭ li dirus: „nu, vi bone elektis, al kiu vi volas fari ŝerceton”, kaj enturnas sin en la pordopasejon. Baldaŭ li elturnas sin, rimarkante:

– Pluvegas.

Kial?

Ĉar li jam estas eminenta moŝto, sed volus fariĝi ekscelenco, ĉar li estas jam nobelo, sed ŝatus fariĝi grafo per la transsalto de baroneco, ĉar li estas

kortega konsilisto, sed ŝatus esti interna kaj sekreta konsilisto, ĉar li havas kelkajn filojn, kiujn li destinis por politika kariero, ĉar li ĉion toleras, nur tion ne, se iu fortiras la buŝon, se li ekvidas lin en la klubo. Do pluvegas.

SESA STROFO

Nia deputito longe atendas kun la freŝa likvo, sed ĉi-foje la atendo pagas bone, ĉar proksimiĝas nobla bestio. „Fine homo”, li diras feliĉe, „kiu faros skandalon!” La sovaĝa gvidanto de la opozicio nome preterpromenas, liaj okuloj feroce turniĝas, sub liaj piedoj pum-pumas la tero, de liaj liprandoj gutas sango. Ŝpruc, li priŝprucas ankaŭ ĉi tiun. La sovaĝa gvidanto saltas kiel tigro en la pordopasejon. Poste kiel tigro li ankaŭ elsaltas el la pordopasejo kaj forrapidas kun la vortoj:

– La neĝo degelas.

Ĉar la sovaĝa gvidanto dronas en ŝuldoj. Ĉe kiu la sovaĝa gvidanto estas ŝuldiĝinta. Ĉe la banko de la registaro. Kvankam la monon li ricevis ne de ĝi, sed de Avar Hersch, la uzuristo, la registaro pli malfrue aĉetis la bilojn. Tiun fakton eblos konstati, se iu kalumnianto iam malkaŝos ĝin. Tamen oni movu sin prudente, ĉar Avar Hersch donis monon, ĉar li sciis, ke la registaro aĉetos la bilojn, kaj ankaŭ la sovaĝa gvidanto scias, ke Avar Hersch ricevis monon de la banko nur pro tio, ke li malkaŝis, ke ĝin bezonas la sovaĝa gvidanto. Estis tre varme en la tagmezaj horoj, videble la neĝo sur la tegmento de la domoj degelis.

SEPA STROFO

Nia deputito ĉe la fenestro ŝvelis de fiero jam duoble pli pufa ol li estis ĉe la unua glaso da akvo. Lian bruston levas la entuziasmiga scio, ke ĉiu tera potenco timas lin. Sed funde de lia animo enŝteliĝis teruro, ke tamen troviĝos en ĉi tiu patrujo iu, kiu eĉ lin, la registar-partian influon ne timas. Subite li paliĝas. Liaj genuoj ektemas. Tremas ankaŭ la glaso da akvo en lia mano. Li sentas, ke alvenis la horo de lia neniigo, ĉar venas, jes ja venas tiu, kiu estas pli potenca ol li, venas la ĉefministro. Li venas en brila nova cilindroĉapelo, defie, fiere. Antaŭ la okuloj de la deputito ĉio malheliĝas. Liaj tempioj febre pulsas. Kaj ia sovaĝa malicemo, ia danĝerdefia aŭdaco spronas lin priverŝi ankaŭ la ĉefministron. Kaj li efektive priverŝas lin. Tamen eĉ unu vizaĝmuskolo de la ĉefministro ne ekvibras. Severe, preta je

malvarma venĝo li paŝas en la pordopasejon, por ekscii, kiu estis tiel aŭdaca. Baldaŭ li elvenas, promenas plu, dum li flustras:

– Ja meritite, kial mi iras en cilindroĉapelo perpiede!

Kial?

Ĉar se estas iu en la mondo, kiu timegas influhavan registar-partian deputiton, tiu estas la ĉefministro. Tion oni eĉ ne bezonas klarigi. Nia ĉefministro tolerus ankaŭ ion plian, ĉar li pensas pri la vortoj „mi forlasos la partion”. Sed li pravas, ja meritite, kial li iras perpiede en cilindroĉapelo!

Ĝis ĉi tie daŭras la balado. Ĝi estas ne tiom virece konciza karakterizado de la trista homa mizero kiel la *kuruca* kanto. Sed eble verŝajna klarigo de la kazo de tiu viro, kiu estis priverŝita en la bulvardo, kaj kiu estis tiel saĝa, ke li eĉ ne informiĝis, kiu priverŝis lin. En ĉi tiu bela jaro de ĉi tiu bel-ega jarcento de nia patrujo eble li devus eĉ peti pardonon. Sed kun granda saĝo li plumarŝis. Tiel li bele pluvegetas kune kun tiuj aliaj.

ANTAŬ KRISTNASKO

La tria horo frumatene. En la tuta ĉirkaŭaĵo jam ĉiu domo estas malhela, nur en la domo sub n-ro 38/b ankoraŭ lumas du fenestroj en la kvara etaĝo en la loĝejo de F. Soma Averaĝ. En la ĉambro staras granda tablo, plena de paperoj. Kirliĝanta fumo. Sur la tablo tetaso kun flava sukerrestaĵoj kaj cigarstumpo en ĝia fundo. Soma leviĝas de la tablo, streĉas sin longe, poste reordigas siajn paperojn. Vi opinius, ke dramverkisto finis ĉi-momente sian kvinaktan teatraĵon, super kiu li laboris du jarojn. Soma ekbruligas cigaredon kaj mallaŭte transvokas en la alian ĉambron:

– Panjo, ĉu vi dormas?

Voĉo de ene:

– Jam denove kia demando. Vi demandas krie, ĉu mi dormas. Diru sincere: ĉu por ke mi vekigu kaj elvenu?

Soma:

– Vekigu kaj elvenu!

Nun sekvas mallonga paŭzo, dum kiu Soma iradas tien-reen, kun trankvila, iom ridetanta vizaĝo en la konscio de bone finita granda laboro. Panjo aperas en la pordo en negliĝo. La lumo ĝenas ŝiajn okulojn. Soma alpaŝas ŝin, kun milda indiferento kisas ŝian vizaĝon. Panjo ekparolas:

– Ĉu vi pretas?

– Jes.

– Ĉu ĉio pretas?

– Ĉio, oni bezonas nur skribi ĝin. Sidiĝu, Panjo, al la tablo kaj skribu, mi diktos ĝin. Kaj se vi havas alian ideon pri io, eldiru ĝin.

– Fi! – diras Panjo dormeme. – Kian malpuraĵon vi faris sur la tablo. Ĉie cindro, alumetoj, cigaredstumpoj.

Ŝi sidiĝas. Soma prenas siajn reordigitajn skribaĵojn, notojn dirante:

– Ne kvaku, Panjo! La spezo ankoraŭ neniam sukcesis tiel bone kiel ĉi-jare. Mi kredas, ke ni havos utilan kaj malmultekostan Kristnaskon. Prenu

pecon da papero kaj plumon. Ne tiun, ĝi estas rompita. Tiun alian. Skribu: kristnaska donaco al la doktoro: skatolo de Upman-cigaroj.

Panjo:

– Kial?

– Gesinjoroj Steiner volas donaci ion al ni por Kristnasko, ĉar ili timas, ke mia frato maldungos Magda Steiner en la skribmaŝina sekcio, ĉar ŝi ne aperas ordeme por la laboro. Steiner demandis, kion mi volas por Kristnasko, por ke li ne aĉetu, kion ni jam havas. Mi petis tempon por konsideri. Mi kuris al la doktoro, kiu priŝprucis la orelon de Ilonka dum du semajnoj, kaj al kiu ni nepre devas donaci ion. Mi pensis, mi petas ion tian de Steiner, kion mi povos tuj pludoni al la doktoro...

– Sed la doktoro ja ne devas cigari pro la skleroziĝo.

– Ĝisatendu la finon. Mi ripetas, mi kuris al la doktoro, kaj li diris, ke hodiaŭ vespere li telefonos. Dume li demandis d-ron Spónicer, kiun li kutimas voki por konsultiĝoj, kion li deziras por Kristnasko. Spónicer diris: „Sendu al mi skatolon da Upman-cigaroj, ĉar mi volas doni ilin al mia dommastro por Kristnasko. Li riparigis mian kahelfornon, decas al mi doni ion al li, tial mi donacos al li cigarojn, ĉar, kvankam li mem ne fumas, sed lia bofilo petis de li cigarojn, ĉar ĉe lia bofilo estos gastoj antaŭvespere de Novjaro, kaj ili bezonas kelkajn bonajn cigarojn.”

– Ĉu tiu Má dai?

– Jes.

– Kaj lia bofilo Dudi Linczer?

– Jes.

– Ja ankaŭ ni estas tien invitataj por la antaŭvespero de Novjaro!

– Mi scias. Tie mi reŝtelos la cigarojn, apenaŭ mi ekvidos ilin. Mi ja diris, ĉi-jare ni havos utilan Kristnaskon. Sed ni ne kompliku la aferon, ĉar el ĉio ĉi apartenas al ni nur tiom, do notu nur tiom: „por la doktoro skatolo da Upman-cigaroj, ni ricevos ilin de ges-roj Steiner”.

Paŭzo. Panjo skribas. Poste ree Soma ekparolas:

– Skribu plu: „Por onklino Hermin kolonja akvo, buŝgargaraĵo, sapo, kaflikvoro kaj glicirizaj bombonoj”.

– Ĉu ĉio?

– Ĉio, ĉio. Sed ne genu min, ĉar mi perdos la fadenon. Tion ni ricevos de la doktoro. La doktoro ricevos tion de la apotekisto, al kiu li trudas siajn pacientojn. La apotekisto sendas ĉiujare al la doktoro kolonjan akvon, buŝgargaraĵon, sapon, kaflikvoron, glicirizajn bombonojn kaj skatolon da Upman-cigaroj.

– Ĉu Upman-cigarojn? Se tiel, kial ni donacos al li la Upman-cigarojn de ges-roj Steiner?

– Panjo, ne konfuzu min! Magda Steiner tajpis la prelegon, faritan en la kuracista societo, de la doktoro, kaj ŝi ne akceptis monon de li. La doktoro demandis Magda, kion ŝi volas por Kristnasko. Magda demandis sian patron, kion li volas. Mi diris al vi, ke mi petis de Steiner Upman-cigarojn por la doktoro. Tial Steiner diris al sia filino: „Petu de li skatolon da Upman”. Do kiam Magda petis skatolon da Upman de la doktoro, tiu tikligis de rido, ĉar li mem ekirigis ĉe mi tiun tutan cigaraferon, li jam sciis, ke la Upman pasos tra Magda al Steiner, kaj de Steiner al mi, li do tial petis de mi Upman, ĉar li sciis, ke tiel li ricevos siajn cigarojn, kiujn li povos pludoni al Spónicer.

– Ĉu li ne povus tuj doni ilin al Spónicer, tiel, kiel li ricevis de la apotekisto?

– Ne. Ĉar li devis doni ion al Magda por la tajpado. Tiel kaj Magda kaj Spónicer ricevos ion. Sed ne konfuzu min, Panjo, ĉar mi jam ellaboris tion, kaj nun ĉio miskirliĝos en mia kapo, se vi ĉiufoje demandas. Kie ni ĉesis?

– Onklino Hermin...

– Jes, onklino Hermin. Do la doktoro donacos al ni la kolonjan akvon, buŝgargaraĵon, sapon, kaflikvoron kaj la glicirizajn bombonojn, li donos ilin al ni, ĉar per tio li volas certigi, ke mi petos la Upman de Steiner, kaj tiamaniere mi revenigos ĝin al li. Por ke la tuta plano ne renversiĝu, li volas afabli al ni, kaj ĉi tiujn apotekaĵojn li donacos al ni. Kaj ni pludonos ilin al onklino Hermin, sed ne rekte.

– Por kio bezonus ilin Hermin? Hermin estas malriĉa, ĉiun Kristnaskon ŝi kutimas ricevi de ni kvinforinton.

– Jes, ankaŭ nun ŝi ricevos ĝin. Sed vi scias, ke por tio ŝi ĉiun Kristnaskon donacos al ni ian bagatelaĵon, kaj ĉi-jare ŝi tre plendis, ke eĉ groŝon ŝi ne havas kaj diris ankaŭ: „mi ne demandos vin ĉi-jare, Soma, kion vi volas por Kristnasko, ĉar mi estas tiom malriĉa”. Kaj mi respondis al ŝi: „Sed onklino Hermin, ĉi-jare ni atendas de vi kolonjan akvon, buŝgargaraĵon, sapon, kaflikvoron kaj glicerizajn bombonojn”. Pro tio ŝi foriris kun longa nazo, kaj mi nun venigos al ŝi ĉiujn ĉi tiujn aĵojn malrekte, por ke ŝi povu poste donaci ilin al ni.

– Kaj kial ni bezonas ilin?

– Kia demando? Ankaŭ ni devas donaci ion al ges-roj Steiner por la Upman-cigaroj, mi ne povas lasi, ke ili kredu, ke mia frato estas subaĉetebla en la maŝinskriba sekcio per skatolo da cigaroj, kiun ŝi donacos ja ne al li sed al mi!

– Se tiel, kiel onklino Hermin ricevos la apotekaĵojn?

– Ŝi ricevos ilin tiel, ke ni donacos ilin al la franca fraŭlino, kaj tiu jam demandis min, kion ŝi aĉetu al onklino Hermin, kiu kudris al ŝi ĉi-jare du ĉapelojn. Mi diris al ŝi, ke Hermin pasie kolektas kolonjan akvon, buŝgargaraĵojn, sapojn, kaflikvorojn kaj glicerizajn bombonojn. Nun, kiam ni transdonos la paketon al la fraŭlino tiel, kiel ni ricevis ĝin de la doktoro, la fraŭlino, kvazaŭ elpafita, kuros kun ĝi al Hermin. Hermin malfermos ĝin, kaj vidante, ke precize tiuj aĵoj enestas, kiujn mi petis de ŝi, la tutan ŝi portos al ni, kaj ni poste trankvile povos donaci la paketon al ges-roj Steiner. Tiel ni kontentigos la francan fraŭlinon, ĝojigos Hermin, kaj ankaŭ la doktoro rericevos siajn aĵojn.

– Ĉu la doktoro? Ni ja donacos ĝin al Steiner.

– Jes, sed ges-roj Steiner donacos ĝin al la doktoro por la Upman-cigaroj, ĉar ili ne toleras, ke ilia filino ricevas donacon de ĉiamfraŭlo, tial ili recipros ĝin.

– Ĉu do la doktoro ankaŭ ĝin rericevos?

– Jes. Ne konfuzu min! El ĉio ĉi apartenas al ni nur tiom, kaj skribu nur tiom: „Kolonja akvo, buŝgargaraĵo, sapo, kaflikvoro kaj glicirizaj bomboj, ni ricevas ilin de la doktoro, kaj donos ilin al la franca fraŭlino”.

– Jen, preta.

– Do ni povas trankvile reveni al la cigaroj. Atentu bone!

– Al kiuj cigaroj?

– Al Upman.

– Ni ja donacis ilin al la doktoro, kaj la doktoro donacis ilin al Spónicer, Spónicer al Mádaí, Mádaí al Dudi Linczer, kiu antaŭvespere de Novjaro metos ilin antaŭ siajn gastojn.

– Ĝuste tiel, kateto mia, sed kiel vi havis la feliĉon konstati, ni estas invititaj al Dudi Linczer por la novjara antaŭvespero, kaj kiel mi havis la feliĉon rimarki, mia unua farendo estos elŝteli la skatolon da Upman, apenaŭ mi ekvidos ĝin, en la poŝon de mia vintra mantelo. Ĉar tiam sekvos la transdono de la novjaraj donacoj.

– Ĉu novjaraj donacoj?

– Jes, Panjo. Tio nun, de kelkaj jaroj enmodiĝis en Budapeŝto, ĉar ĉe Novjaro oni pludonas tiujn donacojn, kiujn oni ricevis por Kristnasko, kaj kiujn oni tute ne bezonas. Kaj ĉar Kristnaskon mi plene elprofitos, kaj mi ricevos de ĉiuj kaj donacos al ĉiuj, sen bezono meti la manon en la poŝon, tamen restos por ni nenio hejme, do mi estas trudita sekvi la donacojn laŭ ties cirkulado, kaj tie kapti, kie mi trafas ilin. Kun la cigaroj mi havas rendevuon dum la Linczer-vespero, tie mi tie reŝtelos ilin.

– Kaj kion vi faros kun ili?

– Ĉu vi ne imagas, ke mi forfumos ilin? La cigarojn mi donacos ĉe Novjaro al onklo Galgócer, la uzuristo.

– Ni ja ne ŝuldas al li.

– Ne, sed estas alia tubero. En la oficejo mi eniris al mia ĉefo kaj demandis lin, kion li volas ricevi por Kristnasko, por ne aĉeti ion, kion li jam havas. Li diris, ke li demandas sian edzinon. Tiun trukon mi jam konas. Ankaŭ pasintjare li diris la samon, sed li demandis ne sian edzinon, sed

onklon Galgócer, ĉar li ŝuldas al li, kaj li trudiĝas fari al li komplezon. Vi memoras, kiel granda embaraso estis pasintjare: onklo Galgócer petis de li arĝentan garnituron de manĝiloj por dek du personoj, kaj tiam li diris al ni, ke ŝia edzino volus tian garnituron, kaj mi devis aĉeti la arĝentan garnituron de manĝiloj por dek du personoj. Do ĉi-jare mi jam ĝustatempe vizitis onklon Galgócer kaj petis lin, ke kun rigardo al la malbonaj financaj cirkonstancoj li ne petu ion multekostan de mia ĉefo, ĉar tion ja finfine devos aĉeti mi. Por ĉi tiu modesta servo mi promesis al li por Novjaro skatolon da fajnaj cigaroj. Ni interkonsentis kun li, ke ĉi-jare li estos tre modesta kaj petos de mia ĉefo por si botelon da kaflikvoro, kaj al sia edzino botelon da kolonja akvo. Mia ĉefo hieraŭ venis en mian ĉambron kaj petis de mi naivmiene kaflikvoron kaj kolonjan akvon. Mi promesis ilin, kaj tuj telefonis al la doktoro, kiu estas ankaŭ la familia kuracisto de Galgócer, ke li donacu al ni duafoje la likvoron kaj la kolonjan akvon, ĉar unufoje, kiel vi notis, ni jam ricevis ilin de li kune kun la sapo, buŝgargaraĵo kaj la glicerizaj bombonoj, kiuj plupasis al la franca fraŭlino, de tie al Hermin, de tie reen al ni, de ni al ges-roj Steiner kaj de tie reen al la doktoro, do mi diris al li, ke li donacu ankoraŭfoje al ni tiujn du botelojn, ĉar por la nova jaro li ja ricevos ilin de Galgócer. La doktoro konsentis, sed ne tre volonte, ĉar li konsideris ilin malmultaj deflanke de onklo Galgócer. Tiam mi malkaŝis al li, ke mi promesis liajn Upman-cigarojn al Galgócer, kaj tiam li konsentis, kaj mesaĝis al Galgócer, ke por la nova jaro li volas likvoron, kolonjan akvon kaj cigarojn. Tiel do estas ĉio en ordo, ĉiu ricevos, ĉiu donacos, kaj la doktoro definitive ricevos ĉion, kion la apotekisto sendos al li por Kristnasko. Ĉar el ĉiuj niaj konatoj la apotekisto estas la unusola, kiu donacos fakte el la sia. Male, li estas la sola, al kiu ni ĉiuj iros aĉeti, kaj kiu gajnas de ni ĉiuj. Tiel do ankaŭ li ne perdos. Ĉu vi jam komprenas, Panjo?

– Mi komprenas.

Panjo trarigardis la notojn kaj ĵetis rigardon al la horloĝo.

– Estas la kvara – ŝi diris. – Ni iru dormi.

– Jes – konsentis Soma –, ni iru. Tamen ni devas agnoski, ke ĉi-jare mi preparis utilan kaj ne tre kostan Kristnaskon.

Panjo donis mildan kaj indiferentan kiseton al Soma, dum ŝi mallaŭte rimarkis:

– Vi estas miniatura Wekerle¹³, Soma.

Kaj nun ankaŭ en la domo n-ro 38/b malheliĝis la du fenestroj en la kvara etaĝo. La tuta strato jam dormas.

¹³ Wekerle, Sándor (1848-1921): fama financministro kaj ĉefministro de Hungario.

BONFARADO

Pluvas. Finiĝis la teatra prezentado, kaj la pliparto de la publiko iras en la najbaran kafejon por vespermanĝi. Sur la grandaj, spegulantaj fenestroj deponiĝas varma vaporo, sed ankaŭ tra ĉi tiuj de spiroj obtuzlumaj vitroj trablankas la multaj primititaj, florornamitaj tabloj, kaj centoj da elektraĵaj lampoj super ili. Interne estas bela, flava, varma lumoj, ekstere la bulvardo estas nigra, malvarma kaj humida.

Antaŭ la enirejo staras maljuna almozulo. Tempas la deka kaj tri kvaronoj.

Mia amiko sidas apud la pordo, de kie li elrigardas al la strato, okultaksante, kiom la damoj levas sian teatran tualeton:

– Mi faris interesan observon.

– ???

– La homoj estas tamen ne tiel malbonaj.

– ???

– Jam kvaronhoron mi elrigardas kaj vidas, kiel tiu maljuna almozulo haltigas ĉiun. Kaj ankoraŭ ne estis homo, kiu envenis la kafejon sen doni ion al li. La damoj enkuras, sed la sinjoro, kiu akompanas ilin, restas ekstere sub la pluvo, ĝis li malbutonumas sian palton kaj elfosas el sia poŝo iom da moneroj. Eĉ unu ne preteriris lin, sen doni ion al li. Tamen estas ja bele.

Nu jes, kompreneble, estas bele. Kiel klarigi al mia amiko? Ĉi-momente li estas emociita kaj amas la homaron. *Now he is praying* – kiel Hamleto diras: li nun preĝas. Estas vere malofta okazo kapti iun ĉe tio, ke li ĝuste estas ravita de la homaro; tiafoje oni ne seniluziigu lin. Li ĝuas la rajton de imuneco de preĝantoj. Ĉu mi nun komencu klarigi, kiel granda maljusteco estas, ke ĉi tiu homo „perlaboras” nun en unu horo dudek kronojn, dum sepdek mil aliaj homoj, kiuj estas pli malriĉaj, malsatantaj, frostotremantaj kaj pli mizeraj ol li, vegetas ie en truaĉo kaj eĉ unu groŝon ne ricevas. Ĉu mi klarigu al li, ke tridek ĝis kvardek teatrovizitantoj glatigas nun per kelkaj groŝoj por longa tempo tiun sian ĝenan tuberon, ke aliaj mil homoj malsatmortas, dum ili manĝas stufitan langon kun terpoma pureo, kvankam „mi eĉ ne estas malsata”? Ĉu mi klarigu al li, ke lerta almozulo estas perfidanto de la veraj malriĉuloj, la sama kiel en milito patrujperfidulo, ĉar

li permesas al la bonhava civitanaro, al la urbo, al la ŝtato, al la tuta homaro, nuligi per kelkaj kronoj sian devon, doni manĝi al ĉiuj, kiuj naskiĝis? Ĉu mi ripetu al li centfoje, ke ne estas pli malmorala afero ol ĉi tiu triviale malica kaj groŝa bonfaremo, kiu premias almozulon laŭ tio, ĉu lia vundo estas sufiĉe naŭza, ĉu li tenas surbrake malsatantan suĉinfanon aŭ ne. Ĉu mi konvinku lin, ke estas supraĵeco kaj maljusteco elekti la tre tristajn, tre malbelajn kaj tre sintrudiĝemajn malriĉulojn kaj avantaĝigi ilin al tiuj, kiuj estas tiel malriĉaj, ke ili eĉ elveni ne povas, aŭ tiel hontemaj, ke ili eĉ ne elvenas surstraten? Ĉu mi senvualigu antaŭ li la almozulajn primadonojn, kiuj forprenas la almozon antaŭ cent sentalentaj kompatinduloj, ĉar ili stariĝas antaŭ bona kafejo, ĉar ili petegas per terura voĉo kaj scias, kiun valoras alparoli? Ĉu mi elrevigu lin el lia stulta kredo, ke kiu donas monon al strata almozulo, estas jam bona homo? Ĉu mi pruvu al li, ke la plej senanimajn, plej misintencajn homojn karakterizas ĝuste tio, ke ili donas kronon al ĉiu almozulo? Ĉu mi instru al li, ke la vera bonfaremo havas tute alian manieron, kaj ke ĉi tiu strata almozulprotektado ne estas bonfarado, sed elaĉeto de nervozeco, momenta maltrankvilo, refleksa gesto, kiu havas tiel same malmulton komunan kun la homamo kaj koro, kiel tiu almozulo kun la vera malriĉeco?

Ne gravas, li amu nun iom la homaron. Eĉ li elsendu dek filerojn per la kelnero al la subpluve tremanta maljunulo. Ankaŭ mi mem same donis, ĉiufoje mi donas al li, kun la rezervo de miaj principoj, ĉar mi opinias, ke ni insistu rigide pri niaj principoj, kiam oni proponas al ni ion, kaj ne tiam, kiam oni petas de ni. Mi do lasas lin kredi, ke tio estas tre bela vidaĵo, kiam la teatra publiko estas tiel okulfrape bonfarema. Sed nun, kiam mi sidas ĉe la skribotablo, kaj neniu petas de mi ion, mi povas diri, ĉu ne, ke tio estas ja ne tiel bela. Eĉ tre malbela, se mi pensas pri tio, ke la saman vesperon, ie en alia kvartalo de la urbo policistoj per glavo disbatas „amason el du-tricent kapoj”, kriantan por pano en la nokto. Malbela dombesto estas tiafoje la maljuna oportunisto, kiam li ridetante lekas manon por osto, dum obtuze ĝisaŭdiĝas al li la mortobleko de liaj kunuloj, vivantaj en la sovaĝejo kaj almozantaj ruzlerte ĉe neniu. Perfida maljunulo estas ĉi tiu. Kaj hipokrita ĉiu, kiu donas al li monon kiel donacon, je kiu li havas rajton nur pro tio, ke li petas ĝin ne kiel rajton sed kiel donacon. Se li petus ĝin kiel rajton, li ricevus glavoplaton. Sed li perfidas la ceterajn malriĉulojn, cedas al la koncepto, ke tio ŝuldiĝas al li, aliĝas al la koncepto de siaj

malamikoj, la riĉuloj, kiuj nomas lian homan rajton almozo, kaj el tio li bele vivtenas sin. La maljunulo estas perfidulo, sed senhezite li ricevas senkulpigon, ĉio estas pardonata al li, ĉar mi ne rajtas prijuĝi lin, dum la riĉuloj estas pli kulpaj ol li. Li ankaŭ ne pravigu min, ĝis unue ĉiuj riĉuloj deklaras, ke mi pravas. Se tio okazos, tiam mi havos koron skoldi la maljunulon pro la perfido. Sed ĝis tiam mi lasas lin en paco kaj donas al li dudek filerojn. Sed mi ne kredas al mia amiko, ke tio estas bela.

Nu, se ni jam profundigis en la temo, lasu min rakonti al vi la kazon de tia almozula primadono, okazintan al mia konato, kiu estas tipa ekzemplo de tio, kiel tia pseŭdomalriĉulo misuzas la bonfaremon de facil kredaj civitanoj, kiun bezonus propre la veraj malriĉuloj.

Ĉi tiu sinjoro ricevis iun tagon leteron el provinca hospitalo de homo, kies nomon li neniam aŭdis.

„... Nun mi liberiĝas el la hospitalo – skribas la fremdulo –, kaj ĉar some-re mi estis enliverita, kaj nun estas vintro, mi petas vian moŝton, bonvolu sendi al mi ĉi tien uzitan vintran mantelon, por ke mi ne frostiĝu, se mi eliros.”

La sinjoro decidis, elkestigis sian trivitan vintran mantelon, alpakis paron da ŝuoj kaj multe portitan pantalonon kaj sendis la tuton al la provinca hospitalo.

Post du semajnoj la ĉambristo anoncas, ke homo staras ekstere, volas paroli kun li.

– Kiu speco de homo?

– Normala, bone vestita homo.

Li eliras al li en la antaŭĉambron sed ne rekonas lin. La fremdulo demandas:

– Ĉu vi ne bonvolas rekoni min?

– Ne. Neniam mi vidis vin.

– Sed la mantelo... la pantalono...

Li montras sian vintran mantelon, sub ĝi striitan pantalonon. De tio mia konato rekonas lin, pli precize siajn pantalonon kaj vintran mantelon.

– Ĉu estas vi?

– Jes, sinjoro.

– Kion vi volas?

– Mi volus peti, se vi jam vestis min, bonvolu... bonvolu doni ankaŭ vojkotizon ĝis Debrecen!

La sinjoro senvorte enmanigas al sia ĉambristo monon kaj sendas lin kun la malriĉulo al la stacidomo, por ke li aĉetu al li bileton ĝis Debrecen kaj sidigu lin en la trajno. Poste li meditas pri tio, kiel ruze la malriĉulo pruvis sian identecon. Nu, egale, li veturu al Debrecen.

El Debrecen poste venis letero:

– Via moŝto faris el mi elegantan homon kaj veturigis min al Debrecen, nun mi staras ĉi tie sen laboro kaj malsatas. Propre mi havas neniun farendon en la urbo, sed ĉar monon mi ne ricevis, nur fervojan bileton, mi devigis veturi ĉi tien. Mi petas vin, bonvolu elsavi min el ĉi tiu terura situacio, *en kiun vi venigis min*, kaj sendu iom da mono, por ke mi povu reveturi al Budapeŝto, kie pli facile mi ricevos laboron.”

Troviĝas konsciencaj homoj, ankaŭ nia homo estis el tia speco, do li sendas al li monon, ĉar ja li „venigis lin” en ĉi tiun mizeron. Kaj li decidas en si, ke nun jam estas fino, la afero ne kostos al li pli da vintraj manteloj.

Pasis semajnoj, foje envenas la ĉambristo:

– Ĉi tie estas tiu homo, li diras, ke la sinjora moŝto ordonis al li veni al Budapeŝto, kaj ankaŭ monon vi bonvolis sendi al li, por ke li alveturu.

– Eljetu lin! – diras rigide mia konato, pensante, ke li faris sufiĉe por ĉi tiu homo.

Ekstere estiĝis iom da disputo, poste silento. La ĉambristo envenas.

– Ĉu li foriris?

– Jes. Sed li lasis tion ĉi tie.

Li transdonas faskon da malpuraj paperoj. Supre kun letero, ke li akiru por li ian subtenon de ia bonfara societo. „Miaj dokumentoj aneksite”, diras la

postskribo, kaj efektive tie troviĝas la elhospitaliga dokumento, persona legitimilo, baptoatestilo, atestiloj pri antecedentoj kaj malriĉeco.

– Formetu ĉi tiujn paperaĉojn – li instrukcias la ĉambriston, kaj se ankoraŭfoje li revenos, redonu ilin al li. Diru al li, ke mi bedaŭras. Ĝuste sufiĉe li ricevis. Ankaŭ aliaj malriĉuloj ja troviĝas en ĉi tiu mondo.

Nun pasis monatoj, ĝis li reanoncis sin. Li volis nenion, nur repeti siajn dokumentojn. Sed dume estis dungita nova ĉambristo ĉe la sinjoro, kaj nenie oni trovis la paperaĉojn. Vane oni serĉadis ilin dum du tagoj. Tiam la sinjoro elsendis al li dudek kronojn kaj mesaĝis, ke liaj dokumentoj perdiĝis. La dudek kronoj estas por la peno akiri kopiojn pri ili. La homo foriris kun la dudek kronoj, sed baldaŭ venis anstataŭ li advokata letero.

„... En la nomo de mia kliento – skribis la advokato – mi alvokas vian moŝton, senprokraste reliveri la dokumentojn, deponitajn de mia kliento ĉe vi, alie mi trudos vin per leĝaj rimedoj ktp.”

Ĉe la fino:

„La kostoj de mia jena letero estas tri kronoj kaj la afranko.”

Kompreneble li forĵetis la leteron. Kaj kompreneble li ricevis leteron de la tribunalo, li jam estis asignita, jam li estis tiu, kiu senigis mizeran malriĉulon je liaj dokumentoj, per kiuj li povus akiri subtenon aŭ dungon. La afero finiĝis tiel, ke li pagis al la advokato la kostojn kaj interkonsentis kun la „plendanto” pri kvindek kronoj.

Tio okazis al li proksimume antaŭ unu kaj duona jaroj, kaj kvankam ĝi estas instruhava historio, mi ne rakontus ĝin, se ĉi-jare, en novembro ne ricevus la sama sinjoro, de la sama malriĉa homo leteron el alia provinca hospitalo, en kiu li ree petas de li vintran mantelon.

Kaj mi ne rakontus tion, se mi ne sentus, ke malgraŭ ĉiu konvinkiĝo estas tamen kruele skribi kontraŭ almozuloj. Ili havas sufiĉe da malfeliĉoj, por ricevi eĉ atakajn artikolojn. Tamen mi devis elekti el ili iun klare misintencan, por pruvi ankaŭ per tio, kiom senfrukta, kiom senutila estas ĉi tiu civitana bonfaremo, kiun praktikas la popolo de grandurboj, kaj kiu tiom plaĉis al mia amiko tra la fenestro de la kafejo. La bonfarado – malnova sed ne sufiĉe ripetebla melodio – estas ne la tasko de premierspektantoj sed de la ŝtato. Vera bonfarado estas sole, se ni trudas la ŝtaton doni labo-

ron al laborkapablaj homoj kaj monon al nelaborkapablaj. Por tio lukti, ĉiufoje tion postuli – jen estas la sole ĝusta bonfarado. Sed dum ni ne atingas ĉi tiun celon, ni devas doni al ĉiuj, kiuj petas: al veraj malriĉuloj tiel same, kiel al trompaj; sed eĉ por momento ni ne kredu, ke per tio ni estas bonfaremaj, kaj ke tio estas bela ago deflanke de ni.

„SAKŜALMO DE LA HUNGAROJ”

Ĉiufoje, kiam vizitantaj eksterlandanoj rimarkas ion apartan je ni, mi ekmemoras mallaŭtan, intimetosan noktan konversacion, kiu estas nun jam ĉ. naŭcent-jara, kaj kiu, malgraŭ ĉiuj tempestoj de la historio, dum longaj naŭcent jaroj ne perdis sian ĉarmon, karecon, kvazaŭ ĝi estus okazinta hieraŭ. En la biografio de la episkopo Sankta Gerhardo estas notita en kelkaj linioj ĉi tiu babileto. La episkopo estis italo, la hungaran propre li neniam ellernis. Lia kunvojaĝanto, kiun la kroniko mencias, estis germano: Walther, magistro de la monaĥineja lernejo en Csanád. Ili veturis pro aranĝenda afero al la reĝo, kaj dumvoje ili tranoktis en kampobieno. Devis esti bela somernokto, ĉar preparante sin dormi, ili lasis malfermita la fenestron. Ili komencis malvesti sin, kaj elrigardis al la arbaro. Subite la episkopo „...ĉirkaŭ noktomezo aŭdas zumadon de muelŝtonoj, kiun li cetere neniam rimarkis. Li miris, kio estas tio. La virino, kiu turnis la muelŝtonon, ekkantis. Kaj mirante, la episkopo demandis Walther: 'Ĉu vi aŭdas, Walther, kiel sonas la *symphonia Ungarorum*, sakŝalmo de la hungaroj', kaj ili ridetis pro la kanto. Ĉi tiu virino ĉiam plu turnis la muelŝtonon, kaj ŝia kantado plilaŭtiĝis. La episkopo, kiu dume enlitiĝis, ĉiam plu ridetante antaŭ sin, petis Walther, 'Klarigu al mi, kiu speco de kanto ĝi estas, ke ĝi igas min ĉesi legi mian sanktan legaĵon?' Tiu respondis: 'La modulado de la kanto faras tion. La virino, kiu kantas, estas servistino de la mastro, ĉe kiu ni tranoktas, ŝi muelas la tritikon de sia sinjoro, ĉar ĉi-regione ne troveblas muelejo ...' 'Ho, mirinda afero', diris la episkopo, 'kiel multe la homa gento penegas... Tamen feliĉa estas ĉi tiu virino, kiu, starante sub la potenco de aliulo, estas gaja, kaj tiel bonhumore, sengrumble plenumas la devan servon'.”

Ĉi tiu konversacio, legante kiun oni kvazaŭ vidas la mildan episkopon, kuŝantan en la lito en malalta ĉambreto ĉe la lumo de olemeĉujo, dum li lasas sur la peplomon sian sanktan legaĵon, por ke, post alparolo al la alia eksterlandano, ili kare, maljunulece ridetu pri la kantema hungara servistino, do ĉi tiu konversacio estas propre la plej malnova hungara muzikhistoria memoraĵo. Esploristoj de la hungara muziko kutimas per ĝi pruvi, ke jam ankaŭ en la epoko de Sankta Stefano ekzistis speciala hungara popolkanto, ĉar se ĝi ne ekzistus, la episkopo kaj la magistro ne ridetus pri ĝi kaj ne meditus pri tio, kiel nekutima kanto ĝi estas. La kanto

mem ne konserviĝis, nur ĉi tiu afabla kritikisto. Finsume ja ankaŭ ĝi estas io en la mano de esploristo. La sama mallonga konversacio estas ankaŭ alirilata la plej malnova historia spuro: la plej malnova spuro de tio, ke iu en Hungario kompatis la laborantajn kamparanojn. La bonanima episkopo el Venecio kunprenis ĉi tiun kulturon de la koro. Kaj la sama konversacio estas ankaŭ en tria rilato la plej praa atestaĵo: ĉi tiu estis, por profane esprimiĝi, la unua hotela interparolo, nokte, en lito, inter du ĉi tien trafintaj eksterlandanoj, rekta praulo de tiuj interparoloj, kiuj nuntempe aŭdiĝas en Danub-bordaj elegantaj hoteloj ĉe malfermitaj fenestroj, tra kiuj dum someraj noktoj enaŭdiĝas la zumado de la vapormuelejoj de Buda kaj la kafeja ciganmuziko. Mi enmetis tion kiel enkondukon, ĉar mi ŝatus reagi al kelkaj strangaj, etaj observoj de ĉi tie veturantaj eksterlandanoj, ne tre esplorante, ĉu ili pravas aŭ ne, pri kelkaj niaj kutimoj, pri kiuj ĉi tiuj eksterlandanoj tiel same ridetas, kiel antaŭ naŭcent jaroj la itala Gerhardo kaj la germana Walther pri la hungara kanto. La muzikhistorio konkludis el ĉi tiu rideto pri la hungara nacia muziko. Eble ankaŭ el la de mi notitaj ridetoj oni povas konkludi al iaj hungaraj naciaj proprecoj.

*

– Vi estas komikaj pro via senĉesa manpremado – rimarkis germano. – En kafejo iu foriras de la tablo, kaj anstataŭ klini sin kaj adiaŭi per kelkaj vortoj, li ĉirkaŭiras kaj premadas al ĉiuj la manon. Kiu manĝas, tiu devas demeti la forkon pro li. Kiu legas, tiu devas mallevi la gazeton. Kiu fumas cigaredon, tiu devas rapide remeti la cigaredon en la buŝon. La adiaŭanto ĝenas ĉiujn per la manpremaĉado, sed ŝajnas, ke vi ne rimarkas tion. Vi renkontas unu la alian surstrate, vi manpremas. Kial? Ni manpremas, se iu vizitas nin en nia loĝejo, se iu forveturas aŭ revenas el vojaĝo, ni konservis la pli seriozan signifon de la manpremado: ni esprimas per ĝi ĉiam ion pli varman, pli amikan, pli seriozan. Mi kredas, ke vi en tiaj okazoj devus almenaŭ interkisi vin, ĉar via manpremado jam esprimas nenion. Mi eĉ ne parolas pri tio, kiel ne bongusta afero estas unu posttagmezon premadi dudek-tridek fremdajn, nudajn manojn. Al mi frapis la okulojn, kiom malpli serioza afero ĝi estas ĉe vi, kaj kiom vi molestas per ĝi unu la aliajn. Mi aŭdis, ke ĉi tie estas ofendo, se mi ne prenas la manon de tiu, kun kiu mi parolas. Mi do deviĝis paciĝi kun tio. Sed oni priridis min, kiam oni rimarkis, ke mi devas rigardi malsupren al la mano de la alia homo, por scii, en kiu direkto li etendas ĝin... vi eĉ ne alrigardas, vi rigardas okul-al-okule,

kaj tamen trafas la manon de la alia en stomakoalto. Nenie en la mondo mi spertis tion. Ĉi tiu mankulto nervozigas, ĝenas min, mi konsideras ĝin komediado, ne sincera gesto.

*

– La vortaĵon „honesto homo” – rimarkis alia fremdulo – nenie mi aŭdis eldiri tiomfoje kaj kun tia devoto kiel en Budapeŝto. Mi demandadis pri ĝi ĉe viaj kolegoj, konatoj, kaj ĉi tiuj vortoj „honesto homo” ĉe kelkaj ĉiufoje reaŭdiĝas kvazaŭ ia tre grava, tre kurioza, tre interesa kaj tre rara afero. El tio, kun kia gravmienado vi diras, kiom vi emfazas ĉi tiun vortaĵon ĉe kelkaj viaj konatoj, mi devis konkludi, ke ĉe vi honestaj homoj estas pli raraj ekzempleroj ol en aliaj landoj. Sed oni klarigis al mi, ke tio estas nur sekvo de la koruptita publika vivo. Sed dum mi ne kutimiĝas al ĉi tiu konstanta menciado de la demando pri honesteco aŭ malhonesteco en Hungario, ĉi tiu kutimo faras al mi la impreson, kvazaŭ mi aŭdus ion tian: „Ĉu s-ro Z? Li estas purĉemiza homo.” Tiel natura estas ĉe certa socia klaso la pureco de la ĉemizo, ke estus konsternite, se ekzemple demandante pri deputito subite mi aŭdus diri tre serioze, ke „...ho, tiu havas puran ĉemizon!” Kaj ankoraŭ io. Mi spertis, ke ĉe vi por havi la titolon „honesto homo” sufiĉas, se iu ne estas fraŭdisto, ne estas trompisto, ne subaĉeteblas. Kvankam nur la kvina aŭ dudek-oka postulo de la homo honesteco estas la materiala nekoncernateco. Mi diras ĝin la kvina aŭ dudek-oka, ĉar en publika kariero ĉi tiu postulo pli antaŭas ol ĉe privatulo. Sed ke la nocio de honesteco preskaŭ elĉerpas la materiala senriproĉeco, tion mi spertis nur en Hungario.

*

– Estas interese – diris germano –, kiel aĉajn obscenaĵojn diras viroj inter si en Budapeŝto. Ja preskaŭ ĉie almenaŭ la duonon de la viraj interparoladoj okupas t.n. obscenaĵoj. Sed vi jam eĉ ne rimarkas, kiom saturitaj estas eĉ politikaj, literaturaj, prisociaj diskutoj de brutalaj komparoj, esprimoj. Miaspeca germano nur miras (kiu same kutimiĝis en Berlino al brutale erotikaj aŭ simile ne al virina societo deca parolo), se li aŭdas, ke ankaŭ diskuto de du hungaroj pri ekstera politiko plenas de obscenaĵoj, sed tiel, ke la du hungaroj eĉ ne rimarkas, kion ili diras. Kiam mi unuafoje aŭdis ion tian, mi ridis, ĉar mi kredis, ke por mia amuzo oni komparas Montenegron al certa intima ejo, ke pro aparta ŝerco oni uzas anstataŭ ĉiu predikato

pornografian verbon. Sed post kiam mi partoprenis en pli multaj tiaj viraj diskutoj, mi rekonis, ke tio estas speciale hungara vira stilo. Ne prudaĵo, ke tio frapas miajn okulojn, ĉar min ne tuŝas, kion ajn mi aŭdas, mi estas plenkreskulo, mi toleras ĉion. Sed fine jam fariĝis al mi komika tio, ke se ni, viroj restas solaj en ajna societo, tuj ekpluvas obscenaĵoj sen ĉia speciala celo, nur kiel aparta lingvaĵo, kiel ia esprima plifaciligo, kvazaŭ estus pli oportune tiel kompili frazojn, replikojn, argumentadon. Iaspeca kampula oportunigo de la diskutado estas, se oni tuj uzas krudaĵojn, kvazaŭ por antaŭi al tio, ke la alia elpoŝigu same krudajn esprimojn. Estas ja kompreneble, ke por ordinara homo estas pli facila, pli mallonga kaj pli frapa la prezentado, se li lasas libere moviĝi sian buŝon kaj povas kompletigi siajn frazojn el la rondo de la plej sekretaj naturaĵoj. Sed ĉe urbanoj mi trovis tian helprimedon en tia grado nur en Budapeŝto.

*

— En Budapeŝto — diris usona teatra intendanto — la homoj tiom laŭdas unu la aliajn, ke nun mi jam al neniuj kredas ion ajn. Ĉi tie, ŝajnas, oni kredas, ke kolegemo aŭ patrujamo konsistas en tio, ke oni ne diras kritikon pri aliaj antaŭ eksterlandano, kaj eble multaj timas, ke la koncernato ekscios, kion oni diris pri li post lia dorso. Sed por miaspeca usonano faris seniluziigan impreson, kiam, anstataŭ rekte esprimi sin kaj kritiki konvene al saĝa homo, pro ia malbone komprenita kaj ankaŭ ne sincera kolegemo, ĉiu verkisto, ĉiu komponisto, ĉiu aktoro, kiujn mi kiel negocisto petis pri opinio, laŭdis malvarme, sensente sed ĝisĉiele sian kolegon. Mi komprenas, se iu ne volas paroli pri sia kolego, ĉar li ne ŝatas klaĉojn, aŭ volas malutili al neniuj. Sed akcepti la peton diri opinion kaj diri nenion ceteran ol plej supergradan laŭdon sen ĉia konvinkigo pri aferoj, pri kiuj pli malfrue ja certe evidentiĝos, ke ili ne multe valoras, tion ili ne devus fari. Mi spertis tion en teatraĵoj, literaturaj, artistaj societoj. Fine mi havis la impreson, ke tuta Budapeŝto estas granda komplico, kaj mi kredis al neniuj. En Vieno la sama societo mallaŭdas unu la aliajn kiel koĉero sian ĉevalaĉon. Tio estas almenaŭ homa feblo kaj komprenebla. Sed en ĉi tiu malvera laŭdoinundo estas ia malkuraĝo kaj nefidebleco, kiun sobra eksterlandano rajte ektimas...

*

Provizore nur ĉi kelkajn budapeŝtajn impresojn mi notis. Ne pro tio, ke ĉi tiuj estus niaj grandaj kaj seriozaj mankoj, sed ĉar vere eksterlandaj homoj atentigis min pri ili. Mi ankaŭ ne subskribas pri ĉiuj, ke ili estas mankoj. Sed por la oreloj de eksterlandaj homoj tio estas ŝajne tamen nur hungara nacia muziko, sakŝalmo de la hungaroj, *symphonia Ungarorum*, kiel Sankta Gerhardo diris ridetante en sia lito.

BOHEMIANECO

Du kompatindaj aviadistoj francaj ekbruliĝis ie super la nuboj kaj forbruliĝis tiel pura, brila, nigra karbo, ke – kiel mi legas – kiu derompis pecon el ili, tiu povis desegni per ĝi sur blanka papero. En tiaj okazoj la franca aviadistaro demandas la ceterajn, kiel ili opinias pri la afero. Kaj la ceteraj diras jam de jaroj, do ankaŭ en ĉi tiu kazo, ke tia senpripensa aviadisto ja meritas kompaton sed ne omaĝon, ŝuldatan al herooj, ĉar ne estas vera aviadisto, kiu mortas pro reklamo, pro „artolerto”, pro eksterordinara kuraĝo, ja vera aviadisto estas estas singarda, laboras prudente, silente super tio, ke la homaro iam povu flugi kun trankvila sekureco. La fama Pégoud, kiu faras transkapiĝojn en la aero, la aŭdaca Chervillard, kiu pli multe flugas kun la kapo malsupren ol ordinare, estas ne popularaj figuroj en fakaj rondoj. La veraj aviadistoj, en certaj rilatoj, malestimas tiajn, multe pli alte taksas ekzemple Blériot, kiu faris kelkajn flugojn, poste elmaŝiniĝis, kaj nun li jam laboras nur por la futuro de la homaro en sia fabriko: li konstruacias. Nun jam, post apenaŭ kelkjara publika vivo la vera aviado rekonis, ke pravis la maljuna Voisin, kiu, kiel unu el la patroj de la franca aviado, jam antaŭ longe deklaris, ke aviadisto povas fini sian karieron nur dumaniere: aŭ por ĉiam li elmaŝiniĝas aŭ mortas. La progreso de la franca aviado komenciĝis per tio, ke oni preferis la duan parton de la leĝo de la maljuna Voisin, la t.n. *Voisin-lex*, oni taksis alte kiel heroojn de la aero tiujn, kiuj mortis pro la altoj. Nun oni jam venis ĝis tie, ke oni koleras tiujn, kiuj mortas. La rekono de la hodiaŭo apartenas al la saĝaj, singardaj, al tiuj, kiuj por ĉiam elmaŝiniĝas. La plej bela morala atesto de la franca kuraĝo, franca mortospita aŭdaco estas, ke en Parizo ne plu okazas nacia funebro por ĉiu pereinta aviadisto. La nura fakto de morto, kaŭzita pro flugado ne plu imponas al oni. El la kraŝintoj kaj bruligoj oni elektas tiujn, kiuj mortis sen propra kulpo, kaj tiujn oni estimas. Kiuj pereas pro facilanimeco aŭ aŭdaco, al tiuj ne ŝuldiĝas la kortega funebro de la nacio. La morto tiom firme asociiĝis kun la ideo de aviado, ke nun jam ĉiu kazo postulas reviziadon. Kvazaŭ oni dirus: „estas ruza, vanta figuro, kiu mortas, nur por ricevi la gloron de la martiroj de aviado!” Kaj oni ne donas ĝin al ĉiuj. La gloron ne ricevas la trokuraĝaj transkapiĝantoj, eĉ se ili volas aĉeti ĝin per sia vivo; la gloro apartenas al la prudentaj, seriozaj singarduloj, kiujn sobbatas neatendita ventopuŝego sur la teron. Kiu mortas pro tio, ĉar li kunprenis malbonan motoron aŭ malmultan benzinon inter la nubojn, tiu

ne ricevas la rangon de martiro, ĉar oni diras, ke li ne flugu kun malbona motoro, kaj kiu ne havas sufiĉan benzinon, tiu restu sur la tero. Oni diras: la mondo bezonas ne sensaciajn martirojn, sed bonajn konstruistojn. La principo estas prava, bona, utila, eĉ humana. Sed nin, kiuj ne flugas, devas surprizi tiu granda filistra ideofluo, kiu jen kundravigis la plej facilaniman popolon de la mondo, la francajn hombirdojn. Nun jam vere oni ne devas moki la burĝajn elementojn pro filistreco, se ankaŭ la pilotoj jam ne estimas la pasion, strebanta senpripense alĉiele.

Jam pasis ĉirkaŭ sesdek-sepdek jaroj de tiam, kiam plene floris malamo al filistreco kaj estimo de ekstrecoj de individueco, fantazio, pasioj. La bona Petőfi¹⁴ cerbumis pri neniam viditaj ĉapeloj, kaj kiam li aperis surstrate kun terura kapornamo kaj vesto kun buntaj floroj, kudrita el brila atlaso, li ricevis nur kelkajn rimarkojn de siaj amikoj, sed sekvatage jam ĉiu estimis ĉi tiun ekstrecon. Albert Pálffy rimarkis pri li jam en la unua tago: „Kiam ĉi tiu Sándor aperas antaŭ ni, li ĉiufoje surhavas ion, kio igas nin sonĝi pri li.” Sed Jókai¹⁵ jam diris pri li, ke „ĉi tiu ekstravaganceco konvenis al li, ĝi estis lia gusto, trudis ĝin al neniu.” La ŝercema Lisznyay, kiu neniel nomeblis filistro, ĉar kiam ĉiu surhavis nigran, li promenis en helblua, buntaĉa dolmano, kun hirtaj haroj, sen koltuko kaj kun hakilbastono en la mano, jene gratulis al Petőfi pro lia bela poemo: „Aleksandro, vi manĝas ĉielon kaj vomas diojn!”

Sed ankaŭ Petőfi faris ne pro modesteco aŭ estimo, ke la poemon *Himno*¹⁶ de Vörösmarty li deklamis en Pápa, antaŭ devota kunvenintaro, sen ĉia kialo kun *paloca*¹⁷ akĉento, terure serioze tiel, ke la publiko komence tenis al si la ventron pro rido, sed fine la publiko tiom skandaliĝis, ke ĝi volis elĵeti la deklamanton.

Ĉi tiuj junuloj cerbumis pri similaĵoj kaj vespere vizitis la faman Depscher-laktovendejon, kie ili ĉiuj vespermanĝis lakton kaj buteron, bele adiaŭis sin kaj hejmeniris kun stomako plena de lakto, por verki ekscese ebrulajn vinkantojn. Ĉi tiu estas la epoko, kiam honesta civitano tre hontis sian monotonan vivon, kaj kaŝis sin sub la lito pro timo, kiam sub lia fen-

¹⁴ Petőfi, Sándor (1824-1849): „la plej granda hungara” poeto, revoluciulo.

¹⁵ Jókai, Mór (1825-1904): romantika romanisto, amiko de Petőfi.

¹⁶ Nun jam oficiala himno de la hungararo.

¹⁷ Palocoj: hungaroj kun specifa akĉento.

estro eksonis la laŭdo de „sanktaj frenezaĵoj”, kiam oni adoris Victor Hugo kaj Shakespeare en nia patrujo ne pro tio, kio estis en ili eterne arta, sed pro iliaj diaj ekscesaĵoj, knalantaj skandalajoj. Ĉi tiu modo sieĝi la ĉielojn daŭris kun milda malkresĉendo preskaŭ ĝis niaj tagoj. Sed nun ĉi tiu malkresĉendo atingis la teron, kaj estas tute certe, ke la granda sieĝo ne plu modas. Fino. Jen, nun ankaŭ tiuj negas ĝin, kiuj laŭvorte flugadis inter la nuboj.

Unu el la stacioj de ĉi tiu malleviĝo, malrapida descendo, jam tre proksima al la tero, tamen ankoraŭ parenca kun la nuboj, estis la tiel nomata bohemianeco, kiu aparte en Budapeŝto kaŭzis tiajn damaĝojn, ke ĝi jam egalas al pli bona speco de spirita akridinvado. Kio estis bela en la ĉielsieĝo de Petőfi kaj similuloj estis tiu ofte menciata morala fundamento, kiun ĉi tiuj „ĉielvorantaj kaj dio-vomantaj” bravuloj propre eĉ por momento ne rezignis. Refoje mi devas referenci al ilia gvidanto, al la plej ekstrema, la plej nebridebla, al Petőfi, pri kiu pruviĝis, ke kiam li ricevis de sia eldonisto la unuan pli grandan sumon por siaj versaĵoj, li donis la tutan monon tiel, kiel li ricevis ĝin, ĝis la lasta groŝo al siaj bankrotintaj gepatroj, tamen samtage li verkis ĉi tiun poemon:

*Ne por havi monon mi akiras,
Sed ja gluti, drinki mi deziras!*

Same la famaj bohemianoj de Murger¹⁸ staras por la postepoko sur tiel firma fundamento de la kristana moralo malgraŭ siaj efektivaj nefidebleco, trompetoj, eĉ ŝteletoj, ke ilin neniam povos forpuŝi de tie la pseŭdobohemianoj, kiuj pro ekonomiaj kialoj bohemianumis per la mono, kaj kiuj ĝuste inverse laboris: ili vualis ne sian fortan moralan senton per la bunta ŝtofo de bohemiaj frivolaĵoj, sed kolorigis sian denaskan fiemon per frivolaĵoj, kovris ĝin per ĉi tiu florplena tuko, pri kiu la homaro jam-jam kredis, ke ĝi kovras ĉiufoje infane bonan koron, noblan kaj morale puran animon.

La lasta kaj sendube la plej profunda punkto de ĉi tiu malkresĉendo estas sendube la kazo, kiu okazis hazarde same en ĉi tiu semajno, kiel la silentiĝo de la aviadistoj. En Vieno policistoj forkondukis de la sceneja provo

¹⁸ Henry Murger (1822-1861): franca novelisto kaj poeto.

aktorineton, kiu pliigis siajn bohemianaĵojn ĝis tia grado, ke ŝi trompis unu juveliston post aliaj per pezaj miloj da kronoj. Ankaŭ tio estis iam nemankebla akcesoraĵo de la ĉielstreba bohemianeco: la lerta miskonduko de kreditoroj. Memorinda estas la kazo de aktoro, kiun lia kreditoro, simile kiel la vianan fraŭlinon, vizitis dum la antaŭtagmeza provo en la teatro, kaj kiu tiel longe promenis kun sia kreditoro sur la scenejo, ĝis tiu paŝis sur la sinkilon, kaj por la serena ĝojo de la tuta trupo li estis sinkigita en la nigran kelon. Vera legendaro plektiĝis el tiuj okazoj, kiam malriĉaj poetoj, pentristoj, muzikistoj kaj aktoroj priruzis siajn mornajn kreditorojn, kiuj venis oj-vei por sia mono. Kaj klare rimarkeblas, ke dum sesdek jaroj ĉi tiu ĝenro tute triviĝis. Hodiaŭ jam neniu ridus pri tiaj ŝercoj, se ili hodiaŭ okazus. Nur ilia malnoveco donas al ili iom da tolerebla glazuro. Sed se nuntempe „bohemiano” faras ion similan, al oni tuj memoriĝas la paragrafo pri kredita fraŭdo, kaj sekvas acerbaj rimarkoj. La feĉo de la homaro tiel rapide transprenis de la veraj bonkoraj kaj infananimaj bohemianoj tiujn ideojn, kun kiuj kuniras materiala utilo, ĉi tiu feĉo tiel forte fidis tion, ke la romantika kaj poetika glazuro de ĉi tiuj ideoj ŝirmos ilin de tiuj riproĉoj, kiujn elmeritas trompistoj kaj ajnaj ŝerecemaj sed de akiremo pelataj etaj krimuloj, ke fine ili senkreditigis ankaŭ tion, kio estis en tio vere gaja, vere kara, junuleca kaj pardonebla; la bohemianeco mallarĝiĝis en ilia mano iom post iom limlinio, kiu dividas la gajan honestecon disde la serioza krimuala kodo. Tiaj aferoj poste finiĝas, kompreneble, kiel la kazo de la viena bohemiana fraŭlino atestas, kiu tiel longe bohemianumis kun la kreditoro, ĝis foje venis por ŝi policistoj kaj kondukis ŝin el la teatro en karceron. Kaj la fina rezulto estas, ke ĉi-momente ne ekzistas bohemianoj en la mondo, kiuj prenis la partion de la fraŭlino en ĉi tiu afero. La bohemianoj tediĝis de la vorado de la ĉielo, post kiam tiom da preŭdobo-hemianoj voradis la ĉielon cele al sinsatigo. La bohemianoj tiel same filistriĝis kiel la aviadistoj. Ili ekspiras vere plifaciligite, se ili legas pri granda eksterlanda poeto aŭ pentristo, kiu montras sin kun pura kolumo aŭ se ili legas pri pentristo, kiu estas ekzemplodona fameliestro kaj pedanta homo. Kiel inter la hombirdoj triviĝis tiaj teruraj ideoj kiel la senseca morto, eĉ, ĝi fariĝis por ili ĝena, tiel same triviĝis ĉe la bohemianoj de arto kaj literaturo la diversaj modoj de la homa malordo, ĉar oni misuzis ilin. Nian plej belan kredon vortigis Anatole France, kiam konstatinte ĉe la statuo de Renan, ke ĉi tiu brilmensa homo ne estis genie malordema bohemiano sed pedanta homo, kaj li aldonis, ke li trovas tion ankaŭ natura, ĉar kiu

tiel belege trovis inter la diaj kaj homaj aferoj la ordon kreantan kaj regantan la mondon, tiu kial ne povus teni ordon sur sia skribotablo.

LA ROTHSCHILD'OJ

Unu tagon, kiam la postlasaĵo de Rothschild verŝis kuleron da mono interalie ankaŭ en la maron de la budapeŝta mizero, mi sentis, ke ĉi tiu interesa kaj enviata familio estas denove aktuala. Oni estus povinta kaj povus skribi pri ili multajn diversaĵojn, ĉar baze ili estas misteraj kaj multe pli interesaj ol ekzemple la usonaj miliarduloj, kies kariero estas pli brila, kies mono estas pli multa ol tiuj de la Rothschild'oj. Iel ĉi tiuj usonaj mongigantoj staras sub pli granda kontrolo ol la eŭropaj. Povas esti, ke ties kaŭzo estas la troevoluinteco de la usona gazetaro, eĉ en certa rilato ĝia trokoruptiĝo, tamen nepre certas, ke pri la proprietaĵo kaj negocoj de la familioj Rockefeller, Vanderbilt, Carnegie, Astor, Gould, Harriman ĉiu gazeleganta homo estas precize informita, kaj kio koncernas ilian biografion, averaĝe dufoje en semajno ili rakontas ĝin al intervjuvantaj ĵurnalistoj aŭ eternigas ilin en libroj. Propre ĉiu ambicias unu kaj saman gloron: montri, ke ili komencis kun ŝulaĉoj kaj finas kun fervojaj retoj aŭ ŝtaluzinaj kvartaloj. Iam tio estis nova, sensacia, romantika, nun estas tiel same monotona ol antaŭ longe estis la legendoj pri la riĉigo de la grandbienuloj.

Mi do metis min al laboro, por kompili la koncizan familian historion de la Rothschild'oj kun precizaj donitaĵoj, ni diru, fosserĉante en la universitata biblioteko, kaj poste, subtenata de ĉi tiuj donitaĵoj, mi rakontos pri ili tion, kion mi volas diri. Dank' al Dio, ĉe ĉi tiu preskaŭ scienca esploro malhelpis min la granda helpanto de la ĵurnalistoj: la hazardo. La hazardo ĉi-foje nomigis József Keszler. Ni kuntrafis en societo, kaj dum mi cerbumis pri la Rothschild-temo, subite mi aŭdas, ke Keszler parolas pri la Rothschild'oj. Se mi devas elekti inter li kaj la universitata biblioteko, mi pensis, mi elektos la unuan. Unue, li scias tiom, kiom la universitata biblioteko. Due mi prenas por certa tion, ke li, kiu rakontas per anekdotoj, kiel Paganini parolis per sia violono, pli bone klarigos al mi la tutmondan rolon de la Rothschild'oj ol kiu ajn libro.

Tio do, kio nun sekvas, estas ne intervjuo, nek diktita anekdotaro sed kaŝaŭditaj societaj babiloj, kiujn mi klopodos redoni per la vortoj de prof. Keszler, ĉar mi opinias, ke se li tiel bele ĵetis lumon sur la vivon de la Rothschild'oj, ankaŭ la publiko tiel sentos.

*

Li rakontis interalie:

– Ĉiu scias la historion, kiel la Rothschild’oj fundamentis sian komercistan famon. En mil okcent ses la heslanda princo-elektisto Vilhelmo devis fuĝi antaŭ la francoj. Samloke, en Frankfurto loĝis la Rothschild-praulo, kiun hodiaŭ oni nomas elegante Mayer-Anzelm, sed tiutempe oni alparolis lin per Amschel. La princo-elektisto donis al li sian tutan havaĵon, por ke li gardu ĝin. La historio diras nur, ke Amschel redonis al li lian monon. Sed kiel tio okazis, tion ne ĉiu scias. Okazis tiel, ke la princo, kiam li revenis al Frankfurto, eĉ ne postulis la monon de Amschel. Li prenis tiel certa, ke la judo ne redonos ĝin al li, tiel ke li eĉ ne repostulis ĝin. Sed iun tagon oni anoncis al li, ke aperis Amschel Rothschild kaj volas paroli kun li. Oni enlasis lin.

– Sinjoro – diras Amschel –, jen mi venis, por redoni al vi la monon.

– Kiun monon?

– La monon de via princa moŝto, kiun vi konfidis al mi. Malsupre, antaŭ la dompordo staras la ĉaregoj, en ĝi troviĝas la havaĵo kaj ses procentoj da interezo. Bonvolu sendi iun malsupren, por transpreni ĝin.

– Ej nu – miras la princo –, ĉu do la mono konserviĝis?

– Kial ĝi ne estus konservita, kiam vi bonvolis konfidi ĝin al mi.

La princo gape miris:

– Sed mi aŭdis tiel, kara Amschel, ke vi estis prirabita.

– Ĝuste.

– Nu, kaj ĉu la rabistoj ne tuŝis mian monon? Kiel tio eblas?

– Tiel, ke via moŝto havis bonŝancon. Mi tenis la monon de via princa moŝto en la kelo, kaj la mian en la teretaĝo. Kaj la rabisto pripredis nur la teretaĝon. Tiel restis netuŝita via mono.

La princo frapetis la ŝultron al la judo. Li diris al li:

– Se tiel, premie por via honesteco retenu almenaŭ la interezojn kaj kvaronon de la sumo.

– Kio? – ekbolis Amschel. – Ĉu via moŝto volas min pagi pro tio, ke mi ne ŝtelis vian monon. Kaj vi volas rezigni la interezojn, kiuj ŝuldiĝas al vi?

Mi ja cirkuligis ĉi tiun monon, investis ĝin en miaj negocoj, per ĝi mi gajnis, akiris, mi estas ja pagita. Lasu min en paco, via princa moŝto!

Li diris kaj kolere foriris. Li havis kvin filojn. Ĉu li povus postlasi pli belan heredaĵon al siaj kvin filoj (kvankam li postlasis al ili ankaŭ multon ceteran) ol ĉi tiun anekdoton? Tre eraras, kiu kredas, ke tia anekdoto, kiu krome estas ankaŭ vera, ne produktas milionojn. Jes ja, ĝi produktis.

*

– Sed unu lia posteulo Jakab, la fama pariza James Rothschild, foje ricevis ion, pro kio li ne dankis. Krome de ne pli malgranda homo ol Heine. La maljuna James tre ŝatis Heine, kiu tiutempe vivis en Parizo. Li tre ambiciis, ke la tiam jam fama poeto foje vizitu lin por vespermanĝo, ne en granda societo sed sola, tiel, ke nur ili du sidadu ĉe la tablo. La ruza James volis mem ĝui la interesan, spritan homon. Iel li ankaŭ sukcesis inviti al si la poeton. Tiu ankaŭ aperis ĉe la vespermanĝo, kaj post mallonga babilo ili ambaŭ sidiĝis ĉe la malgranda tablo. Vi povas imagi, kiel elektite bonaj kaj multekostaj pladoj aperis sur la tablotuko. Foje diras James:

– Nu, kara Heine, nun ni trinkos ion tre fajnan.

Li mangestas al la ĉambristo, kiu alportas, kun granda devoto, polvokovritan vinbotelon. Li plenigas el ĝi belege orflavan, fajrogustan vinon al la du homoj. Ili gustumas ĝin.

– Kio estas tio? – demandas Heine.

– Botelo da vera, originala Lacrimae Christi. Multekosta, tre multekosta...

Iĝas silento. James Rothschild sorbas iom el la multekosta likvo kaj turnas sin al Heine.

– Diru, Heine... vi ja estas tiel saĝa homo... per kio vi povus klarigi, ke ĉi tiun vinon oni nomas Lacrimae Christi, larmoj de Kristo... nu, ni aŭdu ian sagacan argumentadon!

Kaj li atendas la spritaĵon.

Heine ĵetas al li rigardon, malgaja rideto aperas sur liaj lipoj kaj mallaŭte li respondas:

– Barona moŝto, ĉi tiuj estas larmoj de Kristo. Ĉar Kristo multe ploris. Kaj ankaŭ nun Li ploras, supre en la ĉielo, sidante ĉe la dekstro de Dio Patro li

ploras, se li rigardas malsupren kaj vidas, ke du tiel mizeraj judoj kiel ni trinkas tiel eskvizitan vinon.

Poste James ne plu metis al provo la spritecon de Heine.

*

– Troviĝas en Parizo Rothschild-hospitalo. Ĉiufoje, kiam malriĉa pola judo alvenas en Parizo, lia unua farendo estas iri el la stacidomo rekte al la Rothschild-hospitalo kaj kuŝi tie tri semajnojn. Ĉu li estas malsana, ĉu ne. Se malsana, pro tio, ke li estas malsana. Kaj se ne malsana, do por la trisemajna bona provizado, fajnaj pladoj, kaj pro tio, kial li donacu ĉi tri semajnojn al Rothschild? Do estas certe, ke la unua farendo de ĉiu judo estas ĉi tiu trisemajna malsanumado. Foje venis malriĉa, tre malriĉa rabeno el Pollando al Parizo, trakuŝis la kutimajn tri semajnojn, kaj iris el la hospitalo rekte al Rothschild.

– Via humila servisto!

– Bonan tagon – diras Rothschild, kaj jam etendas la manon en la poŝon –, per kio mi povas servi vin?

– Barona moŝto – diras la rabeno tre memkonscie –, mi ne estas almozulo, mi venis nur, ĉar mi ĉie vizitas la eminentajn homojn. Mi venis, por fari al vi la honoron.

– Jes, jes – diras Rothschild kaj metas la manon en la poŝon, kie la pli grandaj ormoneroj, la dudek-frankaj luidoroj kaŝiĝas. – Vi venis, por fari al mi la honoron.

– Jes.

– Do jen al vi ormonero.

– Dankon – balbutas la rabeno –, mi dankas vin!

Li enpoŝigas la monon kaj ekiras. La barono milde postvokas lin:

– Respektinda sinjoro, mi petas vin...

– Bonvolu!

– Se vi ankaŭ alifoje venos al mi, por fari la honoron... ĉar mi konjektas, vi ankoraŭ venos al mi..., nu, do..., hm, ne lacigu vin veni supren en la

etaĝon, sed turnu vin en la teretaĝo maldekstren en la korton, kie troviĝas mia bonfara kontoro, tie funkcias s-ro Kohn, tiu... hm... do mallonge, bonvolu turni vin rekte al li.

– Via humila servisto – diras la rabeno kaj foriras. Post du semajnoj li ree aperas, sed li ne iras en la korton al s-ro Kohn, sed denove alsupras la etaĝon rekte al barono Rothschild. Kial? Ĉar s-ro Kohn ĉiumarde disdonadis arĝentajn monerojn. Kvinfrankajn talerojn. La rabeno sciis tion, kaj al li ne sufiĉis la arĝenta donaco. Li do iras denove al la barono. Tiu multe miras.

– Barona moŝto – salutas la rabeno –, mi venis, por fari mian honoron.

– Jes, sinjoro – diras la barono kaj transdonas al li ree dudek frankojn en oro.

– Dankon – balbutas la rabeno kaj volas foriri. La barono ree postvokas lin:

– Respektinda sinjoro, foje mi jam instruis al vi, nun mi modeste ripetas... en la korto maldekstre, ĉiumarde, *monsieur* Kohn... bonvolu noti al vi bone: *monsieur* Kohn, en la korto, ĉiumarde, maldekstre.

La rabeno revenas de la pordo kaj kolere replikas:

– Ej nu, barona moŝto! Kia afero estas tio? Kiu vi estas? Vi estas barono Rothschild, la plej riĉa homo de la mondo. Kaj volas vi instrui al mi almozi?

*

Bruema almozetanto foje supreniras al la pariza Rothschild.

– Aŭdu la sinjoro – li diras –, estas ja indignige, ke vi havas tridek milionojn, kaj mi malsatmortos. Kiel vi akordigas tion kun la penso de egaleco?

– Bone, bone, sinjoro – diras Rothschild trankvile –, jen unu franko, prenu ĝin!

La homo rikanas:

– Ĉu unu franko? Ĉu vi donas al mi unu frankon?

– Jes. Vi diras, ke mi havas tridek milionojn. Sed ankaŭ da francoj vivas tridek milionoj en ĉi tiu lando. Al ĉiu haviĝas do po unu franko. Jen ĝi es-

tas. Kiel vi akordigas tion kun la penso de egaleco, ke al vi haviĝus pli multe ol al aliuloj?

*

La sama Rothschild foje rigardis en Amsterdam la faman kolektaĵon de la urbestro Six. Al li ekplaĉis kvar bildoj: po unu de Van der Mer van Delft, Ruysdael, Rembrandt kaj Peeter de Hoog. Li alpaŝis la urbestron kaj diris al li:

– Mi aĉetus ĉi kvar bildojn. Mi estas Rothschild.

– Ne vendeblaj – respondis malvarme kaj orgojle la urbestro kaj turnis al li la dorson.

– Sinjoro – diris Rothschild –, mi diris nur, ke mi aĉetus ilin. Tion mi ankaŭ plu rezervas. Se ili estos vendeblaj, skribu al mi kelkajn liniojn, kaj mi donos al vi ajnan sumon por ĉi kvar bildoj.

Post du jaroj Rothschild ricevis leteron kun la subskribo de la urbestro. En ĝi estis skribita nur jeno:

Vendeblaj. Prezo du milionoj da frankoj.

Sekvatage, antaŭ ol ricevi la bildojn, Rothschild sendis al la urbestro ĉekon pri du milionoj kaj skribis nur tiom sur bileto:

Mi petas nur, pakigu zorge la bildojn.

La kvar bildoj troviĝas de tiam en la Rothschild-muzeo. Tiel aĉetis bildojn Alfonz Rothschild. La nunaj bankieroj, ŝajnas, ne lernis de li.

TUTISTOJ KAJ NIMLISTOJ

Unu el la plej bonaj aŭstraj verkistoj Felix Salten vizitis Budapeŝton, faris voĉlegadon, partoprenis ankaŭ en kelkaj amuzkunvenoj, poste reveturis al Vieno kaj skribis felietonon en *Berliner Tageblatt* pri Budapeŝto. Ni povis vere ĝoji pri ĉi tiu interesa kaj bela felietono, ĉar li skribas kun vera entuziasmo pri Budapeŝto, iom li ŝatis ankaŭ nian politikon, kun kompreno kaj simpatio, ne spertita ĝis nun de eksterlandanoj, li skribis pri la hungara lingvo, kaj parolis pri tiu agopreteco, entuziasmo, subite ekflamanta sovaĝeco, brua kaj tamen intensa agado, kiujn li observis ĉi tie. Kun amo li skribas pri ni, videblas, ke dum lia kelktaga restado ravis lin la stranga kaj tute speciala elano de ĉi tiu urbo, sed krome li ne ĵetis en angulon ankaŭ sian ĵurnalistan saĝon kaj ĝenerale li prave juĝas pri ni.

Ĉefe du liaj rimarkoj kaptis nian atenton. Unu, en kiu li diras, ke ni estas pasiaj ĝuantoj. La alia, en kiu li diras, ke terure rapide ni evoluas, niaj palacoj, vendejoj kreskas el la tero kiel fungoj post pluvo. Kiam li tiel konstatas la rapidan kaj intensan ĝuadon kaj la rapidritman entreprenadon, li pravas. Li eraras nur pri unu punkto. Ne tiuj ĝuas, kiuj entreprenas. Ni devas klarigi al li – mi ĝojas havi okazon por tio –, ke ne kalkulante kelkmil homojn kun normala vivo, la loĝantaro de Budapeŝto konsistas el du elementoj. Por ĝuste komprenigi nin, ni bezonas voki helpe du budapeŝtajn slangajojn. Unu estas *tutisto* kaj la alia *nimolisto*. La unua vorto estis farita el la franca *tout*, itala *tutto*, *tutti*, kaj signifas la tutan bonon, do sukceson, monon, feliĉon, potencon, aŭtoritaton, sekve tutisto estas ĉiohavanto, potenculo, monfaranto, aŭtoritatulo, orĉenulo, figuro kun aplomba aspekto, feliĉulo, al kiu eĉ koko donas ovojn, antaŭ kiu ĉiu pordo estas malfermita. Tutisto do estas Leó Lánczy, Khuen-Héderváry, tutisto estas Carnegie kaj László Beöthy, la germana imperiestro kaj Gyula Csontos, ĉiu, kiu havas feliĉon, forton, potencon, kiu modas. Male, la vorto *nimolisto*, kiu estas farita el la vortoj ne, neniu, *nihil*, *niemand*, signifas kompletan nenion, misŝancon, tristan malsukceson, elmodiĝon, vanan luktadon, eĉ se ĝi pariĝas kun honesteco kaj talento. *Nimolisto* do estas malriĉulo, kiu venas petegi por dungo kun fasko da atestiloj, *nimolisto* estas Gyula Justh, *nimolisto* estas la rusa caro, kompatinda, *nimolisto* estas la tuta serba patrujo, *nimolistoj* estas Haverda, Jánosi kaj Vojta, male tutisto

estas la reĝa plej supera kortumo, por esti pli komprenebla: la primaso princo estas *nimolisto*, grafo György Mailáth estas tutisto, en la literaturo Petőfi estas *nimolisto* (juneco, talento, malriĉeco, malfeliĉa amo, frua morto), Gusztáv Heinrich estas tutisto (alta posteno, malforta talento, aŭtoritata barbo, brua kaj lerta elpaŝo, bona reklamo), en la pikturo Simon Hollósy estas *nimolisto* (talento, vivmallerto, malriĉeco, ekskluditeco), Fülöp László estas tutisto (lerto, koneksoj, senarteco, plaĉa aspekto, vivlerto, riĉeco). Jen jam la budapeŝtano mem, ĉi tiu miksita nokta, kafeja, artista, keltera kaj koĉera lingvaĵo starigis la dividan linion inter la du grandaj tendaroj, el kiuj la loĝantaro de ĉi tiu urbo konsistas.

Se serioze respondi la demandon: tutistoj estas, pri kiuj Salten skribas, ke ili faras palacojn, brilajn negocojn kaj havaĵojn. Ĉiu havaĵo, kiam ĝi estas kreata, estiĝas per violenta vojo. En grandaj kaj tre ordigitaj ŝtatoj kiel Germanio, Francio, Anglio estas havaĵoj, kiujn oni kolektis per formika laboro de jarcentoj, kiujn per formika laboro kolektis avoj, patroj kaj filoj. Ĉi tie ĉe ni havaĵoj fariĝas dum unu-du jaroj, rapide, dum la havaĵakiranto vivas, kaj tio ne okazas sen perforto kaj rabado. Ĉi tie oni decidas, komencas la monfaradon, tratretas ĉion, subaĉetas oficistojn, bankdirektorojn, dompedelojn, municipajn ekonomiajn respondeculojn, pseŭdofurnalistojn kaj faras entreprenon. Oni senhavigas kamparanojn, elĵetas malsanulojn, forpiedbatas sian naskintan patrinon, forpuŝas sian familio el la vojo, delogas firme dungitojn, forprenas duongroŝan utilon de entreprenistoj, fraŭdas, ŝtelas, rabas kaj murdas, elpiedbatas almozulojn, donacas por neniaj celoj, nur kuregas post havaĵoj kaj ankaŭ akiras ilin per sanga perforto, frakula friponeco, uzuro, dancvesperoj, aŭtomobiloj sur la ruinoj de la honoro de malriĉiĝintaj deputitoj kaj oficistoj kun ŝanceliĝinta honesto. La havaĵo dikiĝas dum dudek-tridek jaroj, dume la granda rabobesto maljuniĝas, ricevas la nemankeblan renmalsanon aŭ arteriosklerozon, pro la multaj borsumado, cigaroj, stresoj, spekulacioj lia koro kadukiĝas, li ankoraŭ trenas sin dum tempeto en Nauheim kaj sur la Margit-insulo, poste li mortas. Kompreneble, la feliĉa Salten vidas nur la palacon, kiun tiu konstruigis kaj la dudek elektrajn lanternojn, kiuj brulas antaŭ lia vendejo. Ĉe ili, ĉe Salten en Vieno tiu palaco estas jam griza de malnoveco, la filo jam heredis ĝin de sia patro, kiu havas fabrikon en Ĉeĥio kaj akiris sian havaĵon per tio, ke li pakis ne en nigran sed ruĝan paperon la kurdrilojn, kiujn li eksportis al Sud-Ameriko, kaj tiel li superis la anglojn, kiuj faras pli bon-

ajn kudrilojn, sed eĉ pro la deziro de la roma papo ili ne devius de tiu sia kutimo, involvi kudrilojn en nigran paperon, kvankam la sud-amerika aĉetanto estas aparte superstiĉa kaj reĵetas al la komercisto la nigran pak-aĵon, kiel mi legis tion en raporto de komerca fakorespondanto. En la patrujo de Salten, en Vieno la havaĵoj estas tiel kreataj, ke iu trovas min-ejon kaj ekspluatas ĝin, kaj ĉe ni tiel, ke du tutistoj interkonsentas en kafejo kaj diras: ni devas eltordi la kolon de ĉi tiu Grünbaum, ni malfermos apud lia kafejo pli grandan, pli ornamitan kaj ni bankrotigos lin. Poste li mem donos al ni la frukton de sia tuta vivo. La brava vojaĝisto vidas nur la belegan kafejon, flagrantan en la nokta elektra lumo. Mi scias, ke Grünbaum devis mortpafi sin pro tio, kaj nun li kuŝas ekstere en la tombejo.

La ĝuantoj, priskribitaj de Salten, estas, miaj damoj kaj sinjoroj, la ĝuantoj estas ĉiuj *nimolistoj*. Ĉi tie ĝuas tiu, kiu havas nenion. La unuan de la monatoj vi forpagas vian salajron por domlucio, tajloro, lavado, sendas hejmen kvardek forintojn al la hejmanoj en Böszörmény, venas la ŝuisto por sia mono, pagendas la gasfakturo, studkotizo por la infanoj kaj kontribuo por la reeldono de la algebro de s-ro instruisto d-ro Ampleksig, kaj fine restas al vi sume dek ok kronoj. Ĉiu homo, en kiu estas iom da vivokono kaj rekono, povas diri: ĉu la averaĝa *nimolisto* ne pravas, se kun ĉi tiuj dek ok forintoj li iras en kabaredon, trinkas ses botelojn da biero, sendas unu forinton al la cigano, por ke li ludu la kanzoneton *Tinti-tinti sonor*, poste antaŭ ol li hejmeniĝas, li eniras la kafejon Mahagóni kaj trinkas tie por dudek fileroj tason da nigra likva malpuraĵo, asertata kafo, legas ĉiujn vesperajn gazetojn krom unu, kiun li elŝtelas el la legokadro, por havi ion legi en la lito, gapas laŭvice al la bronzaĵ garnaĵoj kaj ŝlifitaj speguloj, primiras la inkrustitan japanan ia-arbon kaj la vitromozaikajn kiĉotablojn kun opal-blua imitita pseŭdomarmoro, petas *Illustrated London News*, li ne ricevas ĝin, ankaŭ ne tro li volas ĝin, li dormemiĝas, eligas du sakrojn mallaŭte, unu laŭte, dehokigas bonan peltitan mantelon, li vidas, ke ĝi ne estas la lia, li ŝatus kunpreni ĝin, tamen li ektimas malliberigon, prenas maleme sian partopage aĉetitan intersezonan palton kun haŭter-plena kolumo, kontrolas siajn monerojn, li ankoraŭ havas unu forinton kaj kvardek, li do sidiĝas en droŝko, veturigas sin hejmen, tie li interŝanĝas vangofrapojn kun la koĉero, denuncas lin, li ricevas teditajn krudaĵojn de policisto, la dompedelo ne elvenas, poste la dompedelo elvenas, la lifto ne venas, malfunkcias, li al-supras perpiede en la kvaran etaĝon, kie ŝvebasodoro de brasikaĵo kaj

servistinaĵoj kaj dormodoro, kaj li kuŝiĝas por dormi kaj li endormiĝas kaj hodiaŭ li estis bonvivanto, vera *Lebemann*, diboĉulo, ĝuanto; kaj la eminenta, saĝa kaj brava Salten hazarde ekvidis lin hodiaŭ noktumi kaj skribis pri li en *Berliner Tageblatt*, ke li estas vivĝuanto, fajra hungara ĝuulo, eĉ ĝu-hamstro, kiu plaŭdis en orientaj voluptoj kaj diboĉis tranokte kun hungara pasio. Kvankam..., kvankam li, kompatinda scias, ke li estas *nimolisto* kaj ĝuas nur pro tio, ke se li eĉ ne ĝuus, li vere putrus sur rubaĵoj pro tiu kulturo kaj tiu burĝa komforto, kiun prezentas ĉi tiu fea urbo al malriĉuloj. Mi alvokas kiel atestantojn la plej proksimajn observantojn de la tiel nomataj plezuroj, la posedantojn kaj kelnerojn de la noktaj amuzejoj por eldiri, ĉi tio estas ja pura vero. Ĉu ne plej raras la okazoj en Budapeŝto, kiam riĉulo elspezas monon nokte en hej-ho-hola-hop-kafejoj, ĉu ne duforintaj kaj seskronaj fakturoj vivtenas la noktan vivon, kun escepto de tiuj du-tri mil fraŭdistoj, kiuj elspezas eĉ sepdek-okdek kronojn, kaj kies sorto decidiĝas en la printempaj ĉeval-vetkuroj, ĉar nome tiam ili remetas la monon, aŭ ne remetas ĝin. Ne unuafoje mi konstatas, sed ĉar de tiam mi eĉ pli konvinkigis pri la realo, mi devas ripeti: ĉi tiuj kafejaj kaj kabaredaj fakturoj, ĉi tiuj en distriktaj kazinogrotoj for-bakarat-umitaj okdek kronoj kaj naŭ kronoj kaj tridek sep kronoj kaj kvindek fileroj estas nenio alia ol nuraj *abortitaj kapitaloj*, kapital-fetoj, kiujn etkapitalistoj en Parizo flankenmetas en poŝtŝparkasoj aŭ en sia malgranda banko, kiujn budapeŝta etburĝo foramuzas, disŝutas, akuŝas ilin ankoraŭ en ilia fet-aĝo, ĉar ne valoras al li kolekti havaĵetojn, ne valoras elteni la gravedecon je etkapitalo dum naŭ kaj naŭdek jaroj, ĉar li ja eĉ tiam pagas duoble tiom por la loĝejo, ol li devus, eĉ tiam kvinoble oni prenas de li la prezon de viando, kafo, faruno, pano, trafiko, kaj fine eĉ tiam li vivtenas sin ne per sia laboro, sed el la favoro de iu rabema tutisto aŭ protekto de la onklo de sia bofrato, aŭ el tio, ke pro hazardo foje la ĉefkelnero pli multe redonas al li el dudekkrono ol li devus. Ĉi tiu granda malrealeco, ĉi tiu en-aero-ŝvebado, ĉi tiu malcerteco de la tuta et-monula vivo kaj tiu cirkonstanco, ke la grandaj rabistoj ĵetas sin ĝuste sur la vivnecesaĵojn, kiel pano, loĝejo, tramo, lumigado, bovinviando anstataŭ ĉarlatani per orminejoj, do ĉio ĉi sekvigas, ke ethomo ne povas ordeme dividi sian monon, ne povas flankenmeti, ne povas postlasi al sia infano kelkmil kronojn, tio sekvigas, ke ethomo trudiĝas sidiĝi en kafosinagogo kaj versper-gazeta baziliko, Mahagóni-kafejo en la avenuo Andrásy aŭ en Babária en Dombóvár, kie la ciganmuzikistoj kantas tutgorĝe judajn, anglajn, hungarajn popolkantojn, kiuj havas jam pli da

teleroj ol violonoj; tio sekvigas, ke la brava, pozitivema, realsenta kaj honesta germana verkisto aperas ĉi tie, kaj vidante ĉi tiun nespertitan gradon de voluptoj, dronadon en noktaj voluptoplezuroj, kio konsistas en tio, ke Schwarc ankoraŭ je duono post noktomezo velkadas en la kafejo, ĉar hejme ne estas hejtate, kaj la buŝo de Schwarc murmuretas nekomprenebl-aĵojn pri mizero, ne-baniĝinteco, ŝuldoj, morgaŭa pagodato kaj pri la honto, ke posttagmeze je la unua kaj duono li mendis glaseton da biero, kaj de tiam nenion, ke la sukerojn li enpoŝigis, kaj kiomfoje Babári el Dombóvár kun la telero volis rideti al li, li elkuris en la necesejon, kaj ĉar por ĉio ĉi lumas kvar arkolampoj kaj Babári el Dombóvár kantas la Grüner-marŝon, kaj ĉar en la kafejo estas varme kaj malbonodore, tial Schwarc devas legi pri si en *Berliner Tageblatt*, ke li estas ĝuanto. Orienta voluptulo. Palackonstruanto. Kvankam li scias, mi scias kaj ni scias, ke li estas *nimolisto*. Kaj Manfréd Weisz kaj Leó Lánczy kaj grafo Mihály Károlyi estas tri tutistoj. Sed tiujn Felix Salten tute ne vidis ĝui.

Pro nenio en la mondo iu kredu, ke ni volis ironii pri ĉi tiu vere eminenta kaj ankaŭ en la mondliteraturo signifa verkisto pro lia felietono pri Budapeŝto. Li estu tutkore dankita, ke li starigis sian verkistajn famon kaj talenton, eĉ se nur por unu tago, en la servon de nia urbo. Kiel subtitolon de sia felietono li donis: *eine Ansichtskarte*. Bildkarto. Kaj li skribis por ĝi ankaŭ la tekston. Estu al ni, indiĝenoj, permesite liveri ĉi-pere al ĉi tiu poŝtkarto ankaŭ la bildon.

ARTO VIVI

Pri la karmemora Ödön Salamon, la reĝe orgojla bohemiano mi jam ofte rememoris. Li estis saĝa kaj nobla menso, kaj kiuj konis lin, tiuj agnoskas, ke troviĝas multaj okazoj, kiam eblas referenci al li, se temas pri saĝeco kaj eminenteco de la animo. Tiel revenis en mian menson, ke iu diris: budapeŝtano ne scipovas uzi sian monon, ĉar li elspezas dudek kronojn tiel, ke ili ŝajnas du kronoj. La mono valoras ne tiom, kiom estas surskribite, sed tiom, kiom ĝi montras, kaj ne estas ŝerco, ke dudek kronoj de milionulo pli valoras ol tiuj de malriĉulo, vane oni kutimdiras, ke ankaŭ mia mono valoras tiom, kiom la via.

Ni loĝis sur la Margit-insulo, eta verkista kaj ĵurnalista kolonio antaŭ ĉ. dek du jaroj. En la societo oni nomis Ödön Salamon reĝo, ĉar li ŝajnis inter ni la plej moŝta. Monon li ne havis. Se en lia poŝo tintis du forintoj, li jam sentis sin riĉa. Tamen li vestis sin kiel la forpasinta princo Sagan. Kiu unuafoje vidis lin, tiu ne dirus pri li, ke li estas la plej malriĉa ĵurnalisto de la mondo, sed almenaŭ tion, ke iu tre bonhava bienulo, kiu nun venis el la Nacia Kazino kaj rigardas la horaron, por veturi morgaŭ al Parizo por ĉeval-vetkuroj. La samon oni povis kredi pri li, ankaŭ kiam li havis dudek filerojn en la poŝo, kio estis pli ofta okazo. Unu fojon – tiu estis ne unusola okazo – neniu el ni havis monon por tagmanĝo. Tiafoje ni, pli junaj kaj malpli spertaj laŭ praa kutimo tagmanĝis kaj restis ŝuldataj per la prezo de la tagmanĝo.

– Ne – diris la reĝo –, tio ne estas ĝusta. Oni ne estas respektata en tia gastejo, kie oni restas ŝulda per la prezo de la tagmanĝo. Kvankam nepras, ke oni estu respektata.

Ni multe miris:

– Sed se ni ne havas monon.

– Tiam oni ne tagmanĝas.

Iu intermetis:

– Ĉu vi do havas?

– Ankaŭ mi ne havas – li diris kun nobla simpleco –, pli ĝuste, ke mi havas: precize kvardek filerojn.

– Do vi ne tagmanĝos, aŭ vi iros en tavernon, kie oni tagmanĝas por kvardek fileroj.

– Ne mi! Sinjoro tagmanĝas en eleganta gastejo. Se tio vere interesas vin, okulatestu, kiel mi tagmanĝos en ĉi tiu gastejo, kie la plej malmultekosta plado kostas okdek filerojn, per kvardek fileroj tiel, ke neniu rigardos min malŝate, ĉiu respektos min, kaj neniu kredos, ke ĝuste nur ĉi tiuj kvardek fileroj kuŝas en mia poŝo.

Ni ariĝis ĉirkaŭ li kaj gapis. Al ĉiu, kiu ŝatas lerni en la vivo, mi rekomendas ĉi tiun anekdoton. Oni povas lerni el ĝi pli multe por la vivo ol el ajna libro. La tagmanĝo okazis jene.

– Kelnero –, diris tedite Salamon –, kio bona troviĝas sur la manĝokarto?

La kelnero etendas la manĝokarton, Salamon tedite trakuras ĝin per sia rigardo, poste flankenĵetas ĝin:

– Ne valoras ĉe vi manĝi pretan pladon... nuraj malfreŝaĵoj, sengustaĵoj. Mi farigos ion alian. Ion satigan, ĉar hodiaŭ mi estas malsata.

Ni nur gapis.

La reĝo diris:

– Farigu al mi haketitan bifstekon... pli precize ne el bovino sed el delikata, bela bovidviando, el ĝia plej bona parto, iom rostetu ĝin super fajro, por ke ĝi kraketu, donu al ĝi ian bonan legomaĵon, ni diru pizojn. Sed multajn.

Streĉitaj ni rigardis, atendis la finon. Pasis ĉirkaŭ dudek minutoj, la kelnero alportas la menditan pladon. Belegan, ruĝrostitan, kraketantan bifstekon, kiu malgraŭ sia nomo pretiĝis ne el bovinviando, kun belega pizogarnaĵo ĉirkaŭ ĝi. Li demetas ĝin sur la tablon.

– Ej nu – diras Salamon –, ĉu vi ne hontas?

– Kial, sinjoro? – balbutas la kelnero.

– Ĉu tio estas viandaĵo?

– Jes, je via servo.

– Ĉu tio? Ĝi ja estas trorostita, ĝi estas bruligita, ĝi estas farita eble en porcelanbaka forno, tiel malmola ĝi estas... mi diris, ke iom rostetu ĝin, sed ne ke vi brulbaku ĝin!

– Sed mi petas vin... – provas klarigi la kelnero.

– Ne replikaĉu! – diras Salamon kun vizaĝo, kvazaŭ por replikado estus preskribita en la kriminala kodo dek jaroj da rigora malfermo.

– Kiel vi deziras – diras milde la kelnero –, mi reportos ĝin.

– Kaj ĉu vi kredas, ke mi denove atendas ĉi tie duonhoron, ĝis vi fuŝos alian, aŭ ke mi manĝos iom el ĉi tiu fuŝita manĝokarto. Mi petas pardonon, sed mia stomako ne toleras ion tian. Mi jam estas pli delikatkusta homo.

La kelnero staras senkonsile.

– Reportu la viandaĵon en la kuirejon – diras Salamon kun pli paciĝema voĉo –, diru, ke mi ne akceptas ĝin, kaj neniam mi venos en ĉi tiun gast-ejon!

La kelnero etendas la manon por la plado.

– La legomaĵon lasu ĉi tie! – li alkrias lin. – Mi ja ne povas malsatmorti.

La kelnero elprenas la viandon el la plado, lasas tie la pizaĵon kaj foriras. Salamon bonguste konsumas la pizaĵon, almanĝas pecon da pano, poste vokas la timigitan kelneron:

– Alportu ananason!

La kelnero ne respondas. Sed je lia vizaĝo videblas, ke li estas tre ĝenata.

– Alportu ananason! – alkrias lin ree la reĝo.

– Pardonon – tiu balbutas –, ni ne havas ananason.

– Bela gastejo! Ĉi tien oni venas por incitiĝi. Alsendu la ĉefkelneron, mi pagos, min ĉi tie vi ne plu vidos.

Aperas la ĉefkelnero, klinadas sin.

– Aŭskultu – diras Salamon al li –, ĉi tiu gastejo estas absurda. Mi mendas viandaĵon, oni fuŝas ĝin. Mi mendas ananason, tutan ananason, por regali ankaŭ miajn amikojn, ĉar ili estas jam post la tagmanĝo, kaj ĝi ne ricev-

eblas. Tiel do nun mi pagos por la legomaĵo kaj peco da pano. Hontu vi ĉiuj!

– Dudek fileroj – diras la ĉefkelnero.

Salamon demetas dudek filerojn sur la tablon. Li donas dek filerojn da trinkmono al la ĉefkelnero, dek filerojn al la priservanto, poste stariĝas kaj volas foriri. Kiam li prenas sian ĉapelon, aperas kun ektima mieno la gastejestro.

– Pardonu min, por momento, s-ro Salamon – li diras –, mi volus ion diri.

– Ni aŭdu! – sonas en tono plej moŝta de la mondo.

– Vidu, mi nur volas peti pardonon de s-ro Salamon, ĉar vi bonvolis malbone tagmanĝi ĉe mi, kaj mi promesas, ke de nun tio neniam okazos. Mi petas vin, ne koleru nin, kaj honoru nin ankaŭ alifoje per via vizito.

Salamon ne respondas, bonvole klinetas la kapon, kaj inter la riverencantaj spaliroj de ĉiuj kelneroj li forlasas la gastejon. La gastejestro akompanas lin ĝis la enirejo kaj tie klinas sin ĝistere antaŭ li.

– Vidu, knaboj – li diras –, jen kiel oni tagmanĝu elegante por kvardek fileroj. Tamen notu al vi unu aferon. Tio fareblas nur unufoje en la sama gastejo. Ĉe la sekva okazo, se mi havos dek forintojn, mi fortagmanĝos ĉi tie ĉiujn miajn dek forintojn.

Tio estas en eta dimensio kaj karikature tio, kion oni nomas arto vivi. Tio estas, kion francoj scipovas kaj ni ne. Tio estas, kion oni devus fari en ĉiuj aferoj de la homo dum la tuta vivo. „Devus”, mi diras, ĉar mi, Dio atestas, same ne faris, kvankam tio estas tiu io, kio konservas la eksteran aspekton de homo, desegnas, kolorigas kaj faras ĝin karaktera. Budapeŝtano donas finsume pli multe al droŝkisto ol berlinano al ŝoforo. Tamen berlinanon la ŝoforoj salutas per ĉaposvingado, kiam li eliras el la aŭtomobilo, kaj al budapeŝtano koĉeroj postsendas stalodorajn rimarkojn. Budapeŝtano pli multe elspezas en duaklasaj tavernetoj ol parizano en pli bona gastejo, tamen budapeŝtano la kelneroj malestimas, ĉar li trinkas nur ŝprucvinon, kaj parizanon la kelneroj riverence estimas pro stranga kaj malmultekosta minerala akvo, kiun li mendis. Budapeŝtano elspezas por sia vestaro tiom, kiom virino, sed li faras tion kredite, kaj tial la tajloro lasas lin atendi kaj malestimas, kvankam se li vivus malpli koste kaj pagus per kontanta

mono, tiam aliaj devus atendi lin, kiam li surprovas veston. Prave, al ĉio ĉi kontribuas ankaŭ, ke budapeŝtano ne havas kontantan monon, tamen ne eblas negi ankaŭ, ke ĉe ni eĉ tiuj laborigas sian tajloron kredite, al kiuj ne estus malfacile pagi la prezon de la vesto per kontanta mono. Dio scias, kvazaŭ oni farus tion, por vivi pli koste kaj pli malbone. Ĉe ni estas advokatoj, kiuj tiom elspezas por droŝko, ke el tiu mono ili povus teni tre elegantan, unuĉevalan, kaŭĉukradan, nenumeritan veturilon kun livrea koĉero. Ne. Prefere ili kverelas kun la koĉeroj, lasas sekiĝi sur si la falsan glazuron de avaremo pro sia multa, kara mono, vivas pli malbone, amuziĝas malpli multe kaj elspezas pli multe.

Ĉio ĉi ne estas grava problemo, sed apartenas al la arto vivi, ĉar la vivo konsistas el ŝajnoj por la granda plimulto, kaj ne ekzistas eĉ nur du el cent homoj, kiuj travivas sian vivon por si kun rideto, superemo, kiuj entute ne bezonas ĉi tiun falsan, trompistan arton. Do ĉi tiu arto estas utila scienco, ĉar la vivo apartenas tamen al trompisto, kaj nun mi pensas neniel pri Salamon, kiu kovris sian noblan, puran kaj fieran malriĉecon antaŭ la amaso per ĉi sia metodo. Sed mi pensas pri tiu miliono da homoj, kiuj plenkreskas, blankhariĝas, trabatalas la vivon, kaj ĉiam plu ne scias, ke ili vivas ne por si, sed por la mondo; kaj tiuj, kiuj vivas por aliuloj, devus ja ankaŭ ridi alimaniere, ankaŭ pagi alimaniere, ankaŭ tagmanĝi alimaniere, veni, iri, labori, agi tute alimaniere ol ili ŝatus.

LA PERANTO

Jenő Heltai esprimis foje en versoj sian opinion pri la bonfaremaj monsuĉuloj en sia milda kaj saĝa maniero en la gazeto *Pesti Hírlap*. Malgraŭ tio mi deviĝas prikanti ĉi tiun temon, ĉar, mi asertas serioze, ne ekzistas tia epidemio, kiu ĉi-jare pli sukcese kaj pli diligente pereigus en nia patrujo kiel ĝuste la bonfaremaj monsuĉuloj, Dio gardu ilian specon. Ĉi-jare estis bonfarema ĉiu, kiu havis uzeblajn krurojn. Mi kredas, ke se ĉi-jare tiel multaj bonfaremuloj estus donintaj monon por bonfaraj celoj, kiom kolektis, jam ĉiu humancela societo elpendigus la tabulon „Plena”. Bonfaranto estis la bonkora uzuristo, la ŝtonkora kaj ŝtalanima filantropo, bonfaradis la dommastro, kiu demetinte la poŝtranĉilon, per kiu li senhauĉigis la loĝantojn de la kvara etaĝo, levis la monskatolon kaj kolektis por senhejmujoj, bonfarema iĝis la bela damo, kiu savas al si ĉiusezone kvincent-sescent kronojn da krommono el tiaj kolektoj, bonfarema estis, kompreneble, el kolekta vidpunkto, barono Amar, ĉe kiu la kvinforintaj almozuloj ricevis de la lakeo nenion alian krom vangofrapoj, bonfaradis la kortega konsilisto kaj la publika ftizoanĝelo Pitanim de Avar, kiu ankoraŭ faros kelkajn tiajn kolektojn dum nemultaj jaroj, por tute elmeriti la hungaran nobelecon, kiun li estis ricevinta por ĉi tiu fervoro je dudek krejceroj malpli koste, bonfaradis la ĉefkelnero, kiu kolektis koste de mia monujo por la dua bilardejo de la somerdomo de kadukiĝintaj poentistoj per papagokolora poŝtmarko, kiun li gluis sur poentopapero, sur kiu estis presita „kvar fileroj”, tamen li kalkulis por ĝi kvar krejcerojn¹⁹, pagigis por ĝi ok, kaj restituate la tropagon, li retenis ankoraŭ du pliajn; en salonoj kolektis la aktorino, kiu jam ne ricevis rolojn, do ŝi, kiel bonfarema anĝelo, forridetis de acidvizaĝaj maljunaj sinjoroj kelkajn kronojn, kiujn, spicitajn per subvoĉe murmuritaj malbenoj, transdonis la nomitaj gajaj troaĝuloj; bonfaris mia blankhara avo, kiu estis falinta en la batalo ĉe Isaszeg, sed releviĝis el sia morto, kaj nun pro sia blanka pseŭdobarbo li prezidas en la societo, progresiganta la sanktan aferon de hundokremacio; bonfaris mia nepeto, kiu vizitadis nokte la kafejon Helvécia kun monkolektujo en la mano, kaj vokis la ciganmuzikistojn en sian separeon; bonfaris mia nevo, kiu alprenis la taskon, igi min senkoste voĉlegi por bonfara celo en la kazino; bonfar-

¹⁹ Dum certa tempo cirkulis samtempe la malnova krejceroj kaj la nova fileroj; 1 krejceroj = 2 fileroj.

ema estis mia morganata onklo, kiu petis min persvadi la paron Góth, ke ili senrekompence veturu al la norda limo por la speciale por ĉi tiu celo aranĝota koncerto de la loka societo, batalanta kontraŭ gastrito; bonfarema estis ĉi tie, Dio mizerikorda en la ĉielo, ĉiu, kiu kapablis, ĉiu, kiu povis saltigi iun alian en iajn laboron, elspezon aŭ pezan servon sub la preteksto de bonfarado, mallonge kaj sincere: ĉi tie ĉiu bonfaradis, kiu eĉ unu krejceron ne volis doni por bonfara celo, kaj tion li volis lerte vuali.

Mi devas rakonti belan, malnovan anekdoton, ĉar ankoraŭ neniam ĝi konvenis tiel kiel nun. Kiu konas, tiu ne legu ĝin. Kompatinda judo staras ĉe stratangulo en Vieno kaj amare ploras. Preteriras alia izraelido kaj alparolas lin:

– Kial vi ploras, kompatinda homo?

– Kial mi ne plorus – respondas tiu –, kiam mi havas dek tri infanojn, dek du kuŝas malsanaj, mia edzino estas mortonta, kaj mi ne havas eĉ rompitan krejceron.

– Per kiom da mono oni povus helpi vin, amiko?

– Per mil forintoj.

– Venu – diris la bonkorulo –, mi akiros por vi dum duonhoro la mil forintojn.

Tiu mire iras kun li, kaj li kondukas la malfeliĉan rekte al la maljuna Rothschild. Ili supreniras al li, la bonkorulo prezentas lin kaj rakontas, ke per mil forintoj li estus helpita. Rothschild enpoŝigas la manon, elprenas mil forintojn, donas ĝin al la ploranta homo, kiu, balbutante dankon, forkuras. La alia restas kaj senvorte staras plu antaŭ Rothschild. Li staras kaj staras obstine. Rothschild demandas lin:

– Kaj vi, kion vi atendas?

– Kion mi atendas? – diras tiu –, kion mi atendus? Mi atendas la provizion. *Ja alkondukis mi la figuron!*

En ĉi tiu ŝerco mi trovis bona tion jam antaŭ mili jaroj, kiam mi unuafoje aŭdis ĝin, ke la bonkorulo nomas la almozulon figuro. La kerno de la ŝerco troviĝas propre en tiu perversa ideo, ke li petas provizion de tiu, kiu donacis mil forintojn. Sed la perspektivo, homkono kaj mondosago kaŝiĝas

en tio, ke li konsideras la almozulon, kiu petas kaj ricevas, dupo, figuro, viktimo, tia, kiu fiaskis en la negoco. Ke ne tiu estas la dupo, el kiu ili elvringis mil forintojn, sed tiu, kiu persvadeblis por tio, ke Rothschild demonstreu je li sian bonan koron. Kaj per tio tuj ŝajnas al mi pravigita lia postulo de provizio, li ja venigis tiel maloftan ekzempleron, ke estis vere neta gajno, bona negoco, eĉ uzuro deflanke de Rothschild, ke li donis al li nur mil forintojn.

Mi volas ofendi neniun bonfaran societon, ja vere troviĝas inter ili bonegaj, kiuj estas baptitaj per nomoj de teruraj malsanoj. Tamen ekzistas kolektantoj, al kiuj homoj, bone melkeblaj bovinoj ne povas rifuzi, kaj je kiuj ĉiu etkoste povas kontentigi sian bonfaremon, kio, kompreneble, konsistas en naŭdek naŭ kazoj el cent ne en tio, ke io jukas ilin bonfari, sed en tio, ke al ili jukas la mano de malriĉuloj, tial ili mem iras kolekti anstataŭ tiuj. Kaj ĝuste la granda armeo de tiaj homoj, ĝuste ĉi tiuj kelkmil sinjoroj kaj damoj, kolektantaj pasie, gardostaras en la pordo de la hungara bonfarado kaj skandaliĝas, se iu aŭdacas levi objetojn kontraŭ ĉi tiu speco de bonfarado. Ili estas tiuj, kiuj nomas ŝtonkoraj homojn, kiuj elĵetas ilin kune kun iliaj kolektolistoj kaj monkolektujoj, ili estas tiuj, kiuj post ĉiu tia artikolo, kia estas ankaŭ la jena, skribas anoniman leteron al la verkisto, dirante, ke vi estas cinika kaj senkora hundo, vi avaras doni al malriĉuloj, kvankam vi glutegas ĉampanon, kuŝu do malsana en via hejtita ĉambro, ne vivu longe kaj elfalu al vi ĉiuj haroj, s-ro verkisto. Ili estas tiuj homoj, kiuj skribas je-non, kaj mi legas iliajn leterojn kun neesprimebla plezuro, ĉar mi vidas el iliaj leteroj, ke ili krevas de furiozo, se troviĝas iu, kiu rigardas al ili en la kartojn, kaj kiu frapas al ili sur la ungojn. Kaj ĉi tiuj homoj, multopaj kaj diversaj, ja troviĝas inter ili eminentaj, ekscelencaj moŝtoj kaj damoj, kaj same ankaŭ malriĉuloj, staras en potenca falankso kontraŭ ni, elvringenda homaro, ke bezonatas kuraĝo, naskita de vere altgrada agaciĝo, por ke oni diru al ili sian opinion.

Kaj nun, ke mi sat-krudumis kontraŭ ili, sekvas tiu certa opinio, dividita en punktoj, kiun ni ĉiuj volus diri al ili.

1) Bonfara homo en Hungario estas ne tiu, kiu donas monon por bonfaraj celoj, ĉar tiu havas alian nomon, tiu estas avara porko. Ankaŭ tiu ne estas bonfara homo, kiu ricevas la monon, ĉar ankaŭ tiu havas alian nomon; ties nomo estas „ĝoju, ke vi vivas, kaj ĝoju, ke vi ricevis tiom, ĉar se vi an-

koraŭ elpepos vorton, neniam vi ricevos eĉ nur groŝon de la societo, vi sendanka hundo”. Jen tio estas lia nomo. Inter la du estaĵoj, la avara porko kaj la sendanka hundo staras la bonfara homo, li estas, kiu nek donas, nek ricevas, sed peras la negocon inter la avara porko kaj la sendanka hundo, kaj el tio li plej ofte ankaŭ tiras moralan, kelkfoje ankaŭ materialan utilon. Kial plibeligi la aferon. Li vivas el tio.

2) La bonfara homo ne nur postulas, sed ankaŭ ricevas la provizion de Rothschild. Ĉar kiu estas Rothschild? Li estas mi, li estas vi, li estas ni, li estas vi ceteraj. Kiu ĵetas du krejcerojn en la monkollektujon, tiu estas Rothschild-ero, kaj ni dek mil, kiuj donas, kune ni estas kompleta Rothschild, al kiu la bonkora filantropo etendas sian manon por provizio, kaj ni ankaŭ donas ĝin al li en formo de ĝenerala estimo, hungara nobeleco, kortega konsilisteco, alta honorposteno, brila jubileo aŭ impona enterigo. Jes, ĉi tie videblas akre kaj klare, ke la donacanto ŝuldas provizion, kaj ni donas al la bonfara homo popularecon kaj tutlandan prestiĝon ne pro tio, ke ni amas kaj estimas lin, sed ĉar li estas tiu, kiu liberigas nin de niaj rimorsoj, kiuj konsistas en tio, ke „estas ja fie, ke dum mi vespermanĝas en la restoracio Hungária ĉe ciganmuziko, en Angyalföld oni tranĉas la gorĝon de malriĉa vagabondo, ĉar li havas kvindek krejcerojn”, jes ja, li liberigas nin ĉiusemajne de ĉi tiuj rimorsoj, kaj relative etkoste, ĉar ni devas pagi por tio nur kelkajn kronojn.

3) La bonfara homo tiras provizion en Hungario ankaŭ de malriĉulo, antaŭ kiu li gravmienas, donante al li mian monon. Kaj se li forprenas de li nenion alian ol tion, ke en tiu momento li reprezentas antaŭ la mizera almozulo, ploranta de ĝojo, la koron de la homaro kaj la instruon de Kristo, jam ankaŭ pro ĉi nura faro li meritas, ke oni starigu lin antaŭ tombokavon sur la korto de kazerno kun benditaj okuloj, kaj dudek soldatoj alcelu lin kun ŝargitaj armiloj, poste laŭ la ordono de la komandanta oficiro la soldatoj alkuru kaj regalu lin per kelkaj sonoraj vangofrapoj. En mia infanaĝo mi vidis feston, kiam societo provizis per vestoj malriĉajn infanojn el la mono, kiun ĝi senindulge kolektis de pli bonhavaj lernantoj. Sinjoro kun vangobarbo, kiu kontribuis al la bonfara afero certe per ne pli ol du dek krejceroj, transdonis botojn kun tiel radiantaj rideto al plorantaj malriĉuloj, kun tiel sublima mieno li enkasigis la dankon de la malriĉaj patrinoj, kun tia ĝuo lasis kisi sian manon, tiel plezuravide li traĝuis ĉi tiujn minutojn, ke, mi kredas, li imagis sin dio, kiu desupris el la ĉielo por porti botojn kaj

peltojakojn al la malsatantaj infanoj, dum li efikis sur mian sobran kaj simplan infankoron jam tiam kun tiel naŭza impresoj, ke mi volis alkrii lin: „kial vi igas kisi vian manon, ja la monon kundonis ni, kaj kiu ne alportis ĝin jaŭde, tiu „restis enfermita”.

4) Se mallonge resumi la antaŭajn tri punktojn: la peranto staras ĉi-monde en neniuj sferoj sur tiel alta ŝtupo kiel en tiu de bonfarado, estas do nature, ke tiu estas la kariero, en kiu neniuj estas tiel stulta stariĝi al la flanko de postulo kaj propono, se li volas fari karieron, sed ĉiu strebas al perado.

5) La hungara, kaj speciale la budapeŝta bonfarado estas tiu, kiu kreas la tipon de profesia malriĉulo.

Kial? Ĉar ĉe ni okazas ne tiel, ke antaŭe estas ia malfeliĉo, kiun oni bezonas ripari, kaj por la riparo de la malfeliĉo oni fondas societon, sed inverse. Unue kunvenas dudek homoj, kiuj volas montri sin, ludi rolon, avanci en sia ofico, deziras registaran agnoskon aŭ reĝan favoraĵon; tiuj dudek fondas la societon, poste serĉas por ĝi iun malsanon aŭ mizeron, kaj kiam ankaŭ ĝi estas trovita, ili serĉas por la mizero malriĉulojn. Mi povas imagi, ke ekzistas malriĉuloj, bonvenataj belbarbaj maljunuloj, kiuj pro la pli granda premio lasas sin helpi prefere de la novfondita societo, kaj mi havas certan informon pri tio, ke ĝuste la societoj kaj kunteblanaroj, vestantaj malriĉajn infanojn, delogas reciproke la helpotojn kiel futbalaj kluboj la ludistojn.

Jen kion mi volis rakonti kun estimo en ĉi tiuj pezaj tagoj, kiam la sinmon-tremo de barono Amar konfidas ne al mi pagi bele sekrete la lu-monon de mia malriĉa kolego, kaj en ĉi tiu konscio trankvile elĵeti tiujn du baronedzinojn, kiuj vekas min matene kun monokolektujo en la mano, sed li postulas de mi servi per miaj kronoj tiujn celojn, por kiuj li ricevos unue reĝan, poste kortegan konsilistecon, kaj se lia filino edziniĝos, li rolos en la gazetoj kiel konata filantropo. Kaj kiuj ŝprucigas al mi sian galon per la morala potenco havata en la ideo de bonfarado, kiuj supozas pri mi, ke eĉ ekpepi mi ne kuraĝos, vidante iliajn trompajn ludetojn, ĉar mi timas, ke oni konsideros min cinika fripono kaj skribos al mi en anonima letero, ke mi estas avara kaj senkora hundo, nu, mi ne pentas; agrablis al mia koro iom ĵeti al ili la veron en la vizaĝon. Ankaŭ al ili ne estu la vivo glite glata.

DIALOGO

Dialogo pri la ofte menciata nokta vivo en Budapeŝto kaj pri la demando, kial ekzistas ĉe ni tuta etsocio, kiu vivas ekskluzive nokte. Kompreneble du homoj traparolas ĉi tiun dialogon, unu estas ordema kaj la alia malordema homo.

La ordema: Se estus io vera el tio, kion eksterlandaj pornografiaj verkoj kaj malicaj germanaj gazetartikoloj skribas, nome ke en Budapeŝto estas mondfama nokta vivo, en kies elektra lumo la plej belaj koketulinaj brilas, ardokulaj „tzigandinetoj”²⁰ kaj vlahaj jupulinaj el Transilvanio dancas meze de la avenuo Andrásy „bovidan frikasaĵon” ĉe muziko, sveltaj hungaraj banditoj kaj fulmokulaj brunaj grenagentoj piedpuŝas la polvon en ĉardoj, kaj ĉirkaŭ mateno kisas sin reciproke la tuta mondo, kaj la kelneroj priserivas rostitan „brodaschon” kaj „prevegdon” kun orkolora „tokaya vino”, tiam mi ne mirus, ke ĝuste la plej saĝaj, ingeniaj homoj: verkistoj, ĵurnalistoj, komponistoj, aktoroj kaj ceteraj artistoj enlitiĝas matene kaj ellitiĝas vespere. Sed tiel...

La malordema: Laŭŝajne vi ja pravas. Sed se vi profitas la okazon, kaj de mi, malnova noktumulo aŭskultos la klarigon de la nokta vivo, tuj vi ŝanĝos vian vidpunkton kaj scipovos klarigi al la ceteraj ordemuloj, ke la budapeŝta noktumado – mi celas, kompreneble, ne la diboĉadon sed la profesion, obstine praktikatan noktan vivon – havas multe pli profundajn kaj pli belajn kaŭzojn ol ordemuloj kredas.

La ordema: Ni aŭdu, ni aŭdu!

La malordema: Simpla kaŭzo de tio, ke ĉi tie almenaŭ kvincent homoj vivas noktan vivon, estas tio, ke nokte en Budapeŝto oni povas multe pli bone, pli honeste vivi ol tage.

La ordema: Ni aŭdu ekzemplojn!

La malordema: Sen ordo kaj logiko mi listigos la avantaĝojn de la nokta vivo. Unue nokte oni ne bruas. Artisto, kiu ne havas monon, por konstruigi al si vilaon en Hűvösvölgy, trudiĝas loĝi en la bulvarado Erzsébet kaj verki

²⁰ „Tzigandineto” = ciganineto, „brodascho” = popola brodaĵo, „prevegdo” = prefekto, „tokaya vino” = tokaja vino laŭ germana elparolo kaj ortografio.

nokte siajn romanojn, ĉar nur nokte estas kviete. Kiu laboras nokte, tiu bezonas manĝi same nokte. La nokta taverno havas negrandan gastaron, do ĝi multe pli bone kaj pli bonguste kuiras ol la taga. Do nokte oni povas pli bone manĝi en Budapeŝto ol tage. Tage en la kafejo priservas averaĝe ses kelneroj kvarcent gastojn. Nokte estas tri kelneroj, tamen ne ducent gastoj sed nur dudek. Do dum tage unu kelnero priservas ĉ. sepdek gastojn, nokte unu sep gastojn. La priservo do estas precize dekoble pli bona nokte ol tage. Ni vidu plu. Ni devas supozi, ke tage almenaŭ okcent mil loĝantoj el la naŭcent miloj maldormas. Do mi vivas inter okcent mil homoj. Nokte maksimume du-tri mil maldormas, do mi loĝas en urbo, kiu havas por mi, noktumulo nur du-tri mil loĝantojn, do mi loĝas en vilaĝo, kiu estas iluminita per elektro, estas pavimita, en kiu troviĝas brilaj kafejoj, kaj el kies du mil loĝantoj ĉ. mil estas policistoj. Kiel vi opinias pri ĉi tiu fabel-eca vilaĝo, tia publika sekureco, kie ĉiun homon gardas unu policano.

La ordema: Ĝi estas ideala.

La malordema: Utopio de ĉiu nervoza homo, kiu faras spiritan laboron, estas kvietita vilaĝeto, en kiu tamen ekzistas ĉiuj atingajoj de la kulturo. La plej malbrua vilaĝo aŭ elektrejo aŭ banloko de la mondo estas iu metropolo nokte. Ĉe ĉiu angulo troveblas droŝko, ĉe ĉiu angulo troveblas gastejo, kafejo, en ĉiu kafejo kuracisto, advokato, inĝeniero, ĉio, kio bezonatas. Vera noktumulo neniam embarasiĝas. Se sekvatage li havas gravan intertraktadon, li scias, en kiu kafejo li trovas advokaton, se lin trafas malbonfarto, li scias, kiu noktumanta doktoro en kiu kafejo distriĝas, mi ne konas profesion branĉon, kies reprezentantoj nokte ne estus ie troveblaj, krome kutime ĝuste la plej talentaj, la plej bonaj. Nokte troveblas eĉ ŝtatsekretario, se ne paroli pri noktumantaj deputitoj, ĥemiistoj, komercistoj kaj ceteraj.

La ordema: Kaj ili sidas en kafejoj kaj faras nenion.

La malordema: Ili interparolas, kelkaj retiriĝas al soleca tablo kaj aranĝas sian korespondadon aŭ verkas literature, kelkaj komponas, aliaj kalkulas, triaj konkludas negocojn; ĉi tie pulsas propre malvastigita, miniatura, tamen samtiel intensa vivo kiel tage, kaj jen tio estas, kion ordemuloj ne kapablas kompreni, kiam ili prujuĝas tiujn homojn, kiuj sidas tutnokte en kafejoj anstataŭ dormi nokte kaj vekiĝinte matene rapidi al sia laborejo. Ili ne volas kompreni, ke en Budapeŝto nokte okazas ne diboĉado, kelkfoje,

jes ja, ankaŭ ĝi, sed ne en la granda plimulto de la okazoj, sed stranga kaj kompare kun la budapeŝtaj malriĉecaj cirkonstantoj konvena, ordema viveto, fuĝinta de la taghelo, ĉu pro tio, ĉar oni estas nervoza kaj ne eltenas la tagan bruon kaj tumulton, aŭ, ĉar oni ne povas pagi por akceptebla loĝejo, kie oni povus certigi al si kvieton por sia laboro, aŭ pro ceteraj kialoj.

La ordema: Kiuj estas la ceteraj kialoj?

La malordema: Sub ceteraj kaŭzoj mi komprenas tiun senfinan oportunon de la vivo, kiun nur la nokto donas al malriĉaj kaj inteligentaj homoj. Kiu foje gustumis ĝin, kaj poste provis ree vivi tage, tiu sopiras sian noktan grandan oportunon kaj tiun plifaciligitan vivon, kiun la noktoj prezentas. Kompreneble temas nure pri homoj de la artoj, ĵurnalistoj aŭ almenaŭ pri tiaj, por kiuj estas indiferece, kiam ili maldormas. Ĉar bona verkisto aŭ ĥemiisto oni povas esti ankaŭ nokte, sed ne bona ministeria oficisto aŭ bona instruisto.

La ordema: Nu, kaj kiuj estas la grandaj oportunajoj?

La malordema: Ankaŭ tiujn mi listigas nur senelekte. Ekzemple la malplenaj stratoj. Kie mi promenas, kiel al mi plaĉas, kie mi ne bezonas eviti, preteriri, reciproki salutojn, tumultoj kaj atenti veturilojn ĉe transiroj. Ĉu vi scias, kion signifas tage transiri la avenuo Rákóczi? Ĉu vi scias, kio estas tio por nervoza homo? Kaj nokte nenio: agrabla promeneto. Alia oportunaĵo estas la eblo mediti. Nokte oni bombardas min per nenio, ne serĉas min leterportisto, tajloro, senlabora samlernejano, geonkloj, pseŭdoamiko, konato, kiu „ĝuste preteriris”, nokte mi estas mia sinjoro, ĉar kelkaj paŝoj – kaj mi estas sola.

La ordema: Tio estas jam io.

La malordema: Se tage mi volas sidiĝi en fiakro, la koĉero supermas, ĉar li donas al mi favoron, se li veturigas min. Kvankam nokte la veturiloj ne estas tiel belaj kiel tage, sed se mi iras al la stacidomo, mi elektas mem, la koĉeroj ĝojas, ke ili povas veturigi min. Same rilatas al mi la kafejoj, gast-ejoj, frumatenaĵ vendistoj, vaporbanejoj en la fruaj horoj, ĉio, kio nokte aŭ frumatene estas malfermita.

La ordema: Ankaŭ tio estas io.

La malordema: Ĉion, kio estas misa kaj malbona en Budapeŝto, ĉion, kio estas tage Budapeŝto en Budapeŝto, tion la nokto riparas. Ĉiuj niaj institucioj estas malvastaj por ĉi tiu rapide evoluanta urbo. Pli multaj, grandaj estas la bezonoj ol la kontentigo. Ĉar nokte la socio estas multe pli malgranda ĉe la samaj kontentigoj, la vivo estas pli komforta kaj pli agrabla. Nokte la strato Baross ne estas mallargha por la trafiko, kaj nokte la tramtrafiko sur la placo Kalvin ne estas vivdangera. Mi diras pli, nokte nenio estas multekosta, ĉar la vendejoj estas fermitaj, ne eblas aĉeti. Tial la nokto ankaŭ ne vekas dezirojn en ni. Ni ne ekvidas aĵojn en la montrofenestroj, kiujn neprus aĉeti. Ni ne vidas admirindajn virinojn, kiujn ni volas akiri, ĉar kiujn ni vidas, tiujn ni povas akiri, se ni havas emon por tio. Nokte ĉiu viro estas konkeranto, grandega virinĉasisto; kiel en Budapeŝto oni diras: li ne povas esti tiel malbela, tiel plumpa kaj tiel mallerta, ke ajna virino, kiun li elektas al si, ne amus lin. La stranga instaligo de la grandurbo, la polica saĝo kaj la homa prudeco faras, ke nokte la mondo estas simple renversita: ne viroj postĉasas virinojn sed inverse. Kaj estas multaj etvivaj, etdeziraj, apenaŭsukcesaj, stultaj viroj, kies memkonscion kaj vivemon tio pliigas.

La ordema: Nu, se vi konsideras tiujn virinoj...

La malordema: Mi devas, dum la Di-Sinjoro konsideras ilin virinoj. Kaj en ĉi tiu demando Li sola estas kompetenta, dum Li zorgas pri nia kreado. Se vi instalos la mondon per viroj, virinoj, plantoj, ŝtonoj kaj ĉio cetera, tiam vin mi demandos, kiun mi konsideru virino kaj kiun viro. Sed porteme mi devas agnoski, ke unu el la plej interesaj sociaj fenomenoj estas tiu kvar- ĝis kvinhora tempo, en kiu la natura rilato inter viro kaj virino simple inversiĝas.

La ordema: Pro tio, ke nokte la socio estas pli malgranda, ĝi estas tiel same eltenebla aŭ ne eltenebla kiel tage. Pro tio, ke ĝi konsistas el malpli multaj homoj, ĝi ne ŝanĝiĝas.

La malordema: Jen ĝuste eraro granda. Ju pli malgranda estas socio, des pli ĝi estas bona. Pensu pri la ĝis nun priskribita plej malgranda socio, la insulo de Robinsono, kie la tuta socio konsistis el Robinsono Kruso kaj lia amiko Vendredo. Kiel bela, bona, amoplena, eta socio ĝi estis! Tri homoj estas jam malpli bona socio, kvar eĉ malpli kaj tiel plu. Mi almenaŭ per tio klarigas tiun misteran ligan, opiniatan neklarigebla de multaj, kiu kunkroĉas la homojn de la nokta socio. Koĉeroj estas pli ĝentilaj, gastoj pli paci-

encaj, kelneroj pli servopretaj ol tage, ĉiu estas pli bona, pli varma, pli komunikema, pli homama ol ekzemple tagmeze. Riĉaj sinjoroj tiafoje intime babilas kun malriĉaj almozuloj, vivhistorioj aŭdiĝas el la buŝo de homoj, pri kiuj nenio interesas nin tage, serioze aŭskultas la rakontojn homoj, kiuj tage preteriras indiferece eĉ grandajn malfeliĉojn. Pri tio eĉ ne eblas diskuti, ja ĉiu diras tion al vi el la propra sperto: nokte la homoj multe pli amas unu la aliajn ol tage.

La ordema: Do ĉu mi tiru el ĉio ĉi la konsekvencon, ke malsaĝa estas, kiu vivas tage, kaj vi, viaj kvincent aŭ mil kunhomoj pravas, kiam vi nomas la nokton tago?

La malordema: Pro nenio mi asertus tion. Mi nur petas komprenon de vi, sanaj homoj, praktikantaj valorajn profesiojn por tiuj, kiuj kun alia nervaro faras alian laboron, kaj kiuj rekonis, ke la nokto pli konvenas al ili ol la klara kaj sunluma parto de la tago. Pro tio, ke diboĉuloj kvalifikis la nokton malmorala tagoparto, inteligentaj kaj pensemaj homoj ne devas kredi, ke nokto ne povas esti laborplena, normala, morala, ke nokte ne eblas fari laborplenan, normalan, moralan kaj seriozan vivon. Ĉefe en urbo kiel la nia, kie la polico eĉ por tio ne havis tempon pro la multa politiko, ke ĝi instruu la koĉerojn veturi inter ĉiuj cirkonstancoj maldekstre, kaj avanci dekstre, kaj tial droŝkistoj estas tage pli vivdanĝeraj ol aviadiloj nokte. Oni bezonas nur apartigi la sabatajn diboĉantojn, la daŭre diboĉantajn taŭzvivulojn de tiuj plurcent homoj, kiuj spite ĉiun oferon, malestimon, publikan malestimon vivas nokte pro la simpla kaŭzo, ĉar tage ili ne povas vivi. Se iam oni skribos la historion de la nuna vivo de Budapeŝto, la tiel nomata postepoko parolos pri tiuj noktaj estaĵoj, kiel pri ia pli bona, pli sentema, pli evoluinta, pli malsaneca sed pli pura sekto, kiu apartiĝis de la koruptita kaj ĝisekstreme fiiginta socio, por vivi por si kaj por similuloj en kluboj, kafejoj, gastejoj, surstrate, tie, kie la ceteraj – nur ne tiam, kiam la ceteraj. Kaj se al vi estas indiferece, ĉu mi loĝas en Peŝto aŭ Buda, tiam estu indiferece ankaŭ, ĉu mi vivas tage aŭ nokte. Mi scias, ke mi ne konvinkis vin, sed almenaŭ mi eldiris, kio pezas sur mia koro. Mi ŝatas la noktojn, sed pro tio mi vere ne prijuĝas tiujn, kiuj vivas tage.

HUNGARIO KAJ EKSTERLANDO

Ĉiufoje, kiam oni skoldas nin eksterlande, ree kaj denove ni urĝas starigi specon de internacia gazetara buroo, kiu informus la eksterlandon pri hungaraj aferoj. Estas ja kompreneble, ke ni havos tre longan blankan barbon, ĝis troviĝos hungara registaro, kiu rekonas ties neceson. Dume ni nur urĝas la aferon, ja tio estas nia devo. Mi nun notos gajan kaj iom fantazian kazon, eble povos uzi ĝin tiu, al kiu oni konfidos studi la rilatojn inter Hungario kaj la eksterlando.

Estas iu konata kaj bone enspezanta, eĉ tre talenta angla verkisto, kiun oni nomas Louis Napoleon Parker. Antaŭ kelkaj jaroj oni prezentis unu lian teatraĵon *La kardinalo* en la budapeŝta Nacia Teatro. Mi havis la bonŝancon foje persone konatiĝi kaj pasigi kun li horeton, kies historion mi nun volus prezenti per la precizeco de memoraĵverkisto.

Ni konatiĝis sur la fundo de ŝipo. La ŝipo navigis el Dover al la franca bordo, kaj mi retiriĝis kun mia angla konato aktoro pro la forta vento en la fundon de la ŝipo, kie jam pluraj homoj sidis ĉirkaŭ tabletoj kaj trinkis viskion kun sodakvo. Ĉe tableto sidis sola pli maljuna, modesta sinjoro kun multe-vivinta vizaĝo, oficista aspekto, kun blankecaj grandaj liparoj, sur la okulojn tirita ĉapelo. La aktoro diris al mi:

– Tiu sinjoro estas Louis Napoleon Parker, la fama verkisto, ŝatato de la angla publiko. Ĉu vi volas konatiĝis kun li?

– Jes ja, kompreneble – mi diras kun ĝojo, kaj ni jam iras al la tablo. La aktoro prezentas min, ni sidiĝas, ankaŭ ni ricevas bonan, kerozenodoran ŝipo-viskion, kaj disvolviĝas inter ni teda, agaca konversacio. Mi ekscias, ke s-ro Parker veturas al Parizo, por spekti teatraĵon. Se ĝi plaĉos al li, li prilaboros ĝin por Londono. S-ro Parker estas tre morna kaj negoceca, kaj en ĉi tiu momento mi sentas min cent milionojn da mejloj for de hejme, de la bela Budapeŝto, de la flavaj tramoj, de Ĉen-ponto, de la placo Oktogon, de ĉio, kion mi ŝatas. Ĉi tie sidas kontraŭ mi agaca, maljuna, negocanima angla verkisto kaj demandadas min, kiom enspezigis la teatraĵo, kies aŭtoro mi estas. Mi rakontas, ke mi estas hungaro, kaj mia registaro ne konsideras sia devo de-

fendi la interesojn de siaj civitanoj, do al hungara verkisto nek Dio nek diablo pagas honoraron en tuta Ameriko.

– Kiel, ĉu vi estas hungaro? – demandas subite gaje majstro Parker.

– Tio mi estas.

– Do vi certe scias, ke oni prezentis mian teatraĵon *La kardinalo* en la *National Theater*.

– Kial mi ne scius?

– Estas interese – li diras –, Hungario devas esti gaja lando.

– Sufiĉe gaja – mi diras –, sed kial ĝuste la gajecon vi bonvolas elekti el niaj naciaj trajtoj?

– Ĉar mi havis tre strangan kazon kun hungaroj.

– Ni aŭdu ĝin!

– Oni prezentis mian teatraĵon en via Nacia Teatro, kaj ĉar mi mendis ĉe entrepreno ricevi ĉiujn kritikojn pri miaj teatraĵoj, prezentataj en ajna parto de la mondo, mi ricevis ankaŭ la hungarajn. Kompreneble, mi ne komprenis ilin, kaj estis neniuj, kiu tradukus al mi eĉ nur unu. Sed mi ricevis ankaŭ du-tri germanlingvaj, kaj inter ili unu estis bonega.

– Ĉu bonega? En kiu senco?

– La kritikisto tiris mian teatraĵon tute ĝis en la koton. Li ŝutis sur min riproĉojn, li skribis, ke mi ne havas talenton, ke mia teatraĵo estas kompilaĉaĵo, sed al tio mi jam tute kutimiĝis, io tia ne tuŝas min. Sed en ĝia fino li skribis ŝercon, kiu restis en mia memoro.

– Nu?

– Li skribis, ke kial nomiĝas Napoleono tiu, kiu verkas tiel malbonan teatraĵon. Ĉar se iu nomiĝas Napoleono, tiu verku pli bonan. Kiel vi opinias pri tio?

– Ne malbone – mi diras –, kritikisto havas la devon ne nur instrui la publikon, sed ankaŭ amuzi ĝin, kaj se li tiel volis amuzi sian publikon, li ja havas rajton je tio. Kaj cetere, ĉe ni sub la efiko de la germana gazetaro parto de la kritiko dediĉas sin al ŝercoj, kiujn la publiko tre ŝatas.

– Nu jes – diras la ruza onklo Parker –, sed mi skribis leteron al ĉi tiu s-ro kritikisto.

– Kion vi skribis al li?

– Proksimume jenon: Estimata sinjoro! Mi legas en via tre aprezata kritiko, ke vi faris riproĉon kontraŭ mia nomo. Eksciu do, ke kiam temis pri tio, je kiu nomo oni min baptu, kvankam mi ĉeestis, mi havis tre malmultan eblon sciigi mian opinion, fakte oni eĉ ne demandis min, kiun nomon mi volas. Do vi estas maljusta al mi, kiam vi kulpigas min pro io, pri kio mi ne estas respondeca. Tamen permesu al mi certigi vin, ke se naskiĝos al mi filo, kaj temos pri tio, je kiu nomo bapti lin, tiam, tre estimata sinjoro, telegrafe mi nepre demandos vin, kaj procedos laŭ via afabla konsilo. Kun altestimaj salutoj ktp.

– Ĉu vi ankaŭ sendis la leteron?

– Jes. Ankaŭ respondon mi ricevis. La hungara s-ro kritikisto skribis en tre bela angla lingvo kaj en tre afabla letero li senkulpigis sin, ke de tiam mi ne koleras lin, eĉ, se vi volas, mi ankaŭ rekonas, ke li pravas.

– Do tial vi diras, ke Hungario estas gaja lando?

– Tial.

La cetero, pri kio ni babilis, ne apartenas al la afero. Poste mi adiaŭis majstron Parker kaj post tiam mi ne plu vidis lin. Sed reveninte al Budapeŝto, la unuan okazon mi, kompreneble, demandis tiun kolegon, pri kiu temas en la historio, ĉu tiel okazis la kazo. Efektive ĝi tiel okazis.

La tuta historio ne estas ia sensaciaĵo, tamen unu afero estas certa. Ke en la okuloj de s-ro Parker Hungario nun jam restos por longa tempo gaja lando. Okazu ĉi tie kio ajn, eblos legi, ke ĉi tie okazas revolucio, kaj ke tertremo skuis la landon, li ĉiufoje ekridetos kaj diros, ke Hungario estas gaja loko, ĉar tie oni levis riproĉon kontraŭ lia nomo. Hungario povos disvolviĝi, povos redividi la terbienojn inter la civitanoj, povos krei novajn leĝojn, implikiĝi en militon, por onklo Parker ĝi restos nomomoka lando, kie simpla terkulturanta kamparano flegme amblas post sia plugilo kaj meditas pri tio, kial oni nomas lin Napoleono, kaj vespere vilaĝfine kolektiĝas junulinoj kaj fraŭloj, kaj pasie diskutas pri tio, ĉu *La kardinalo* estas sufiĉe bona teatraĵo por tio, ke lian aŭtoron oni nomu Napoleono.

Kio estas ankaŭ natura, ĉar ekzemple foje tre saĝa homo diris orelateste de pluraj homoj, ke Florenco estas la plej abomeninda urbo de la mondo, ĉar li foje vizitis ĝin, kaj tiam aktoro nomata Csákvári elvringis el li tridek forintojn en ĉi tiu urbo, kiujn tridek forintojn li neniam dum sia vivo rericevis. La homoj ne estas malsaĝaj, por esti objektivaj, kaj ĉiu ŝatas la maron en Ostende laŭ tio, ĉu li gajnis en la bakarato aŭ ne. Jes ja, la homoj diras, mi estas la mezo de la mondo kaj dependas de mi, kia lando estas Hungario, de mi dependas, ĉu Florenco estas belega aŭ abomeninda.

Mi nun volus veni al la konkludo, ke ni, hungaroj faras ĉiujfoje internacian simpation nur tiel, ke ni submetas nin al similaj vidpunktoj de unuopaj homoj aŭ korporacioj. Mia kolego, la kritikisto haste senkulpigis sin antaŭ majstro Parker, por ke li ne havu malbonan opinion pri la hungaroj. Se fremda ĵurnalistoj anoncas sin ĉe ni, oni festas lin en la Hejmo kaj Societo de Ĵurnalistoj, promenveturigas lin, akiras por li abonbileton, pagas lian fiakron, muzikigas en liajn orelojn per la ciganbando de Béla Radics, igas inviti lin por tagmanĝoj al eminentuloj, kaj oni kredas, ke per tio ĉio estas jam en ordo. Kvankam se ĉe lia forveturo fervoja konduktoro ĵetas nur du duaklasajn krudaĵojn kontraŭ la kapon de ĉi tiu fremda ĵurnalistoj, tiam Radics jam vane violonis, la Hejmo vane festis lin, la ĉefnobelo vane donis al li tagmanĝon, ĉar tiam Hungario estas jam malbona lando, kie la konduktoroj estas krudaj. La fama angla Klubo de Okdekuloj naĝis en plezuroj kaj amuzoj, kiam ĝi ekskursis al Hungario. En tiu tempo ne estis pli bela nacia tasko ol ŝmiri la okdekulojn per ĉiu dolĉo kaj mielo. Kaj dume Scotus Viator, la hungarofendan anglon oni elĵetis de ie, kien li volis eniri sen bileto, sekve la maljunuleto pikis tiel grandan vundon en Hungaron en la angla gazetaro, ke se la okdekuloj farus ĉiuj naŭdek nenion alian ĝis la fino de sia vivo, nur laŭdus la hungaran patrujon, eĉ tiam ne eblus kompensi tiun elĵeton.

Estus ĝuste, se ni ŝirus kun ĉi tiu tiel nomata persona sistemo. Ja superfluas diskuti pri tio, ke ĉi tiu sistemo lasas ĵetiĝi ĉiujn ĉantaĝantajn pseŭdoĵurnalistojn kaj pseŭdovojaĝantojn sur nin, kvankam tiuj pli bone scipovas ĉantaĝe pseŭdoĵurnalistumi ol la niaj, kaj ankaŭ ne kontentiĝas per kvin kronoj. Krome malgraŭ ĉiu sia honorinda fervoro estas infaneca kaj malsaĝa tiu maniero, kiu volas akiri po unu kaj po okdek amikojn por la hungara afero en Eŭropo. Jes ja, ĉe tio oni bezonas alpaŝi decide, eĉ arogante. Ĉi tiu naiva gastofestado ne nur ne utilas, sed rekte damaĝas. Oni ja diras,

kiom mizera devas esti ĉi tiu loko, kie oni tiom amas fremdulojn. Ja bela, tre bela estas gastamo, sed malsimpation, disvastiĝintan kontraŭ ni en la gvidaj landoj de la mondo oni devas superi ne per tiel velkaj rimedetoj. La sperto montras, ke ni estas timemaj, kaj se io malbona trafas ĉe ni fremdulon, tuj ni punas fajre-glave tiujn fiulojn, kiuj ne kuraĝis ekzemple ĉantaĝi fremdulon. Kiun ja ĉantaĝu malfeliĉaj ĉantaĝantoj, se ne fremdulojn? Ĉu pariza koĉero ĉantaĝas ne fremdulojn? Ĉu itala bagaĝisto ne vomas krudaĵojn kontraŭ fremduloj? Nek en Francio nek en Italio oni tiom dorlotas vojaĝantojn kiel ĉi tie. Ĉe ni oni dorlotas ilin tiom, ke ĉiu kredas, ke li nun estas konkerinda adversulo, kies guston oni ĉiuminute klopodas diveni, kiu estas terure grava persono, kaj kies devo estas fine elmontri, kiom kulturita li estas kaj skoldi ĉi tiun malfeliĉan landon. Sub decida kaj aroganta elpaŝo ni komprenas tion, ke oni ne bezonas zorgi tiom pri la kontentiĝo de unuopuloj. Oni ne bezonas pravigi ekzemple la germanan ĉefkonsulon, kiu ekfulmis kontraŭ ni, ĉar trompaj hungaraj komercistoj en Germanio trovis al si dupojn. En Hispanio de jardekoj heredaĵtrompisto ĉasas dupojn, sed mi ne kredus, ke ĉefkonsulo aŭ ambasadoro kuraĝus minaci pro tio Hispanion. Sed kiuj tiel demonstros ĉiuokaze, kiom grava estas por ili la simpatio de unuopuloj, kiuj, por diri simple kaj klare, tiel dorlotas eksterlandanojn kiel ni, tiuj meritas esti tiel traktataj. Se por la duono de tiu amaso da mono, kiu elspeziĝas ĉe ni por gastofestado, ni starigus seriozan kaj batalpretan gazetaran buroon, ni multe pli utilis por la hungara afero. Sed dum ni viktimiĝas al unuopuloj, dum ni konfuzas la privatan sentemon de Parker'oj kaj iliaj similuloj kun la opinio, pri ni, de la mondo, ni estas elmetataj al skoldoj. La fakto, ke iu koleras nin, ankoraŭ ne estas sufiĉa kaŭzo por repaciĝi kun li. Kaj ni daŭre repaciĝas kun ĉiu eksterlandano. La vivo estas tiel instalita, ke kolerantojn oni kelkfoje bezonas ankaŭ bati. Ni devas resaniĝi el ĉi tiu manko de memfiero. Se eksterlandano ne bone sentas sin ĉi tie, do li ne bone sentas sin. Se ne plaĉas al li ĉi tie, li ne plu venu ĉi tien. Kaj se li ofendas nin, se li klaĉas pri ni malbonaĵojn kaj mensogojn, do ni ne repaciĝu kun li, sed, por esprimi min tute popolanece, ni frapu al li sur la cerbujon. Ankaŭ pro la nura kialo, ke pro tio oni kutime rehas sian menson ĝustaloke.

NATURSCIENCA SOIFO

Mia adorata naskiĝvilaĝo, la bela Budapeŝto estas urbo, kie ne eblas sufiĉe ofte rakonti la kazon de pariza nigrula mondumano. La pariza negra dando vivis en tiu epoko, kiam princo Sagan, la modreĝo rikoltis siajn plej belajn sukcesojn. La negro estis nekredeble riĉa kaj konkuris kun princo Sagan en eliteco, ĉefe tamen en moda vestiĝo. Ĉi tiu nigra junulo ĝenis princon Sagan, sed amuzis la parizanojn, liaj frakoj, cilindraj ĉapeloj, veŝtoj kaj retingotoj inde konkuris kun la vestaro de la princo. Domaĝe, lia gloro daŭris ne longe. Unu tagon nome okazis al li io terura. En la Granda Operejo estis premiero, kaj la negro alvenis hejmen en la lasta minuto, por salti en sian frakon. Haste-rapide li vestis sin, kaj kuregis en la operejon, aperis en sia kutima loko en la partero, sed ne pasis pli ol kvin minutoj, jam lin rigardis la tuta publiko, ekestis rumoro, eĉ malkontento, la malkvieto ĉiam pli kreskis tiel, ke preskaŭ haltis la prezentado. La sensacio, kiun la bela nigrulo vekis, havis tre simplan kaŭzon. La bela nigrulo nome tiom rapidis kun la vestiĝo, ke li forgesis surmeti pantalonon. Post ĉ. dek minutoj ankaŭ li mem rimarkis ĉi tiun malgravan vestiĝan mankon, stariĝis kaj kun dignaj paŝoj forlasis la spektejon de la operejo. La publiko akompanis lin per aplaŭdoj, kaj la negron neniam plu oni vidis en Parizo. La kazon notis por la postepoko Dumas la pli maljuna por la instruo, ke eleganta homo devas naskiĝi. Parvenuo povas kunteni en la konkuro dum certa tempo, sed foje tamen elsaltas el li la nudeco, kiun li heredis de siaj prapatroj.

Tiel ni statas propre pri la t.n. seksa demando. Ni ĉiam statas tiel pri io, al ni kaŭzas konstantan ĝojon, ke ĉe kelkaj punktoj ni kaptas la eŭropan superkulturon aŭ ties elkreskaĵojn, kaj fieras pri ili kiel tiu negro pri siaj frakoj. Kvazaŭ ni ĉiam dirus: „ja ne estas tiel grandaj arto kaj lerto ĉi tiu *haut-goût*, delikata gusto de la plej okcidenta, iom putranta, sed ĝuste en ĝia dekadenco spicodora kaj narkote fosforeska kulturo, ankaŭ ni ja kapablas ĝin.” Nun ni diradas fiere pri la nova maniero eksplicke la seksan demandon, ke ankaŭ ni kapablas ĝin. Rimarkendas, ke ekstere, de kie ni povas enporti niajn modojn, la suno de ĉi tiu merkata sciencobranĉo estas jam subiranta, ekstere ĉi tiu demando jam ne estas tiel „grava”, ne tiel „brula”, ne tiel „dolora” kiel ĉe ni. Sed ni fiere batas la bruston, ke ni estas modernaj, sekskonsciaj, ke ni estas apertaj kaj kuraĝaj, ni eksplicas kaj esploras, ni ne estas speco de postrestinta, pruda Balkano, sed ja bela, fiere,

spicodora okcidento, ĉar en seksaj aferoj ni postrestas neniun popolon en la mondo. Kaj kien ajn vi iras, vi vidas ĉie feliĉajn kaj liberajn homojn, kiuj kredas, ke nun jam ĉio estas aranĝita, la seksa demando ne plu estas pornografio sed sociologio kaj naturscienco, kaj jen, je via plej granda surprizo vi vidos, ke dum ĝis nun la edzino de la vicjuĝisto Pornicsek el la Interna Urbo kaj Ilona Fidibusz el Terézváros ne emis gustumi la natursciencojn, vane invitis ilin la Naturscienca Societo al senkostaj, belaj kaj instruplenaj prelegoj pri la faŭno de la maro kaj pri la praepoka flaŭro de Tero, nun ne troviĝas pli natursciencema vicjuĝista edzino en la tuta strato Veres Pálné kaj nek pli sociologiema Ilona en la tuta strato Aradi ol ĝuste ili. Sed kial? Kial?? Kial??? Ĉar nun ĉio, pri kio antaŭ kelkaj jaroj la vicjuĝisto diris al sia edzino, ke „tio ja ne konvenas al honesta edzino”, kaj ĉio, pro kio Ilona ricevis en la rozkolora sereno de la dolĉe rava knabinĉambro mallaŭtajn sed decidajn patrinajn vangofrapojn, estas nun naturscienco kaj sociologio, klerismo kaj modernismo, ĉio tio nun konvenas, modas kaj nepras. Se temus ne pri virinoj, mi devus diri, ke estas tamen impertinento konfuzi tiun senton, kiu nun pelas ĉi tiun aŭskultantaron en la brakojn de naturscienco kaj sociologio, kun sciencosoifo.

Kompreneble, mi devas halti ĉi tie por kelkaj minutoj kaj laŭdeve defendi min kontraŭ la letero de d-ino Ibolyka Mandel, kiun ŝi morgaŭ skribos al ni kun la subskribo „iu moderna knabino” en tiu senco, ke estante modernaj, kiel ni povas paroli tiel ironie pri ĉi tiu sankta kaj scienca movado, kaj ĉu ankaŭ ni apartenas al tiuj postrestintoj, kiujn ne inspiris ĉi tiu fluo, kiu venas, blovas, tempestas de okcidento. Ni devas diri, ke ni aprezus kun vere granda raviĝo ĉi tiun sciencosoifon, se ĝi etendiĝus al ĉiuj branĉoj de la scienco, kaj se el ĉi tiu soifo haviĝus por la seksa vivo ĝuste nur tiom, kiom da interesiĝo la demando de la seksa vivo meritas, envicigita en la ceteraj demandoj de la scienco kaj klasifita en sia rangŝtupo. Oni devas diri al Ibolyka, ke suspekto malmulta interesiĝo vekiĝas ekzemple pri la malsanoj de la spirorganoj en la sciencosoifa knabinsocio de Budapeŝto, kvankam laŭ mia scio oni iel-tiel povas ekzisti sen seksa vivo, sed sen spiri tre malmultaj eltenas tra tagoj. Oni devas diri al Ibolyka, ke ŝi pravas: ĉiu knabino rajtas elekti al si ĝuste tiun sciencobranĉon, kiu ŝin interesas, kaj ni povas devigi nek ŝin, nek Ilonka, ke ili okupiĝu pri la embriologio de la parazita omaro *Rysokephalus*, se ŝi volas gurdi en sian memoron la amologion de la fama germana universitata profesoro d-ro Obscen. Ni nur

devas rimarki, ke estas okulfrape, ke en unu urbo miloj kaj miloj da knabinoj kaj edzinoj samtempe, kvazaŭ interkonsente, ĵetas sin sur unu saman sciencobranĉon. KREDU MIN, estus tiel same okulfrapa kaj donus okazon al skribo de ĝuste tiel longa artikolo ankaŭ tio, se tiuj samaj plurmiloj da damoj, kiuj nun vizitas la prelegojn de d-ro Obscen kaj voras la dikegajn volumojn de d-ro Ekscit, neatendite estus senescepte ĵetintaj sin sur botanikon. Vi povas imagi, kiom okulfrape estas, ke ĉiuj komencis vori kun brilantaj okuloj la konojn ne de botaniko, sed sekve de la surpriza renkontiĝo de gustoj hazarde ĝuste tiujn de seksologio, kun la senbrida fanatismo de sciencosoifaj modernaj mensohavaj estuloj, eĉ, kio estas plej incite, kun la sinteno de miskomprenitoj, pro stulteco mokitoj, do martiroj. Oni devas diri al Ibolyka, ke ĉi tiun movadon iniciatis en Okcidento ne grandaj scienculoj, kaj eĉ tiuj malmultaj grandaj scienculoj, kiuj dediĉis sin al la movado, baldaŭ elsaltis el ĝi. La movado estis organizita unuflanke de eldonaj firmaoj, kiuj faris grandiozajn negocojn el la rezultoj de la bonkreda kaj scienca vivo de iu Forel, kaj disvastigis kun granda fervoro Ivan Bloch ĝuste tiel, kiel la Angla Biblia Societo la Biblion, kaj aliflanke de bankrotontaj germanaj koncertfirmaoj, kiuj jam ne sukcesis ricevi pli bonajn muzikistojn, kantistojn kaj poetojn, tial ili komencis komerci per nebonhavaj universitataj profesoroj, kiuj por tiaj pseŭdosciencaj, sekse spicitaj prelegoj ricevis du-tri mil markojn, kaj perlaborinte dum unu sezono dudektridek mil markojn, pli malfrue ankaŭ ili mem komencis kredi, ke ili plenumas sanktan homan mision. Tiel venis kelkaj eminentaj germanaj scienculoj, kies loko estus en hospitaloj, laboratorioj, aŭditorioj aŭ ĉe skribotabloj, sur la podiojn de koncerthaloj, por fari – sen ĉia hezito ni povas eldiri – sekse ekscitajn prelegojn antaŭ sovaĝiĝintaj kaj neglektataj pseŭdo-Nora’j;²¹ kaj knabinoj, travivantaj la varmajn tempestojn de pubereco. Kaj tiaj „sciencaj koncertoj” gajnis laŭ valoro kaj intereso per tio, ke ankaŭ virojn oni enlasis en la halojn, kaj pro ĉi tiu novigo ili nediskuteble alprenis la karakteron kaj sciencon valoron de sekse spicita kino. Tiel malrapide sed certe la prelegoj fariĝis tre belaj societaj ludoj, kaj ili nun jam nur per tio diferencas de pornografiaj legaĵoj, ke oni sidas ne solaj, kiam oni lasas efiki sur siajn nervojn la vortojn de la germana universitata profesoro d-ro Obscen, sed apudas modernaj knabinoj kun ekscitruĝa vizaĝo aŭ nekompreneblaj virinoj kun vualitaj okuloj. Oni devas diri al Ilonka, kiom ajn tio

²¹ Aludo al la ĉefheroo de la Ibsen’a tragedio.

aŭdiĝas kontraŭliberece kaj kontraŭprogrese, ke la tuta movado estas nenio alia ol terorado de honestaj individuoj per modaj sloganoj. Ja ĉi tie en Budapeŝto ni jam estas tiom progresintaj, ke la vere progresinta kaj moderna homo jam ne kuraĝas malfermi la buŝon pro la multaj superbruantaj artefaritaj modernaĵoj, ĉar suprajemuloj, teroristoj, sensciuloj, negroj, vestitaj en frako sed forgesintaj surmeti pantalonon, fingromontras al li surstrate: jen ĉi tie iras la konservativa bovo. Hodiaŭ jam ĉi tie, en ĉi tiu ĥaoso de malklereco, senscieco, sensistema kulturvoraĉado oni bezonas pli grandan kuraĝon por certa konservativismo ol por anarĥio. Se vi ne estas tuj la plej ekstreme radikala en impertinente kaj sen aktualeco lanĉita detaleta, vi tuj ricevos leteron de Ibolyka, kun la bondeziro, ke vi mortu kaj igu vin enterigi, ĉar vi devus vivi propre en la pasinta jarcento, kaj nur pro hazardo vi trafis en tiun epokon, en kiu la okuloj de Ilonka malfermiĝis.

Nu, estimataj damoj, tio estas ja nek scienco, nek progreso. Tio estas parte tre bona negoco, bazita sur spektej-luo kaj biletvendado, aliparte avida profito el la okazo, ke de kelkaj jaroj ĉiu honesta virino povas lasi tikli la nervojn sen tio, ke pro tio kiu ajn povus skoldi ŝin, ĉar nun tiu bruligos al si la fingrojn, kiu riproĉas ŝin pro tio. Nun jam – certe ke ne plu longe, sed domaĝe, tamen pli longe ol ekzemple en Vieno – tiu konsideriĝas malmorala, kiu ne emas akcepti, ke ĉi tiu misio estas seriozaĵo kaj scienco; estas malpudora tiu, kiu ne konsideras la priseksan demandon la plej grava demando de la mondo. Kvankam se foje tiu scienculo povus vere kaj sincere eldiri sian opinion pri la sekso antaŭ sia publiko, li devus komenci per tio, ke pudoro estas tre esenca apartenaĵo de la sekseco, inokulita en ni de la naturo, kaj ke la pudoron elpensis ne tropruduloj, sed la brava naturo patriino mem, kiu donis la pruvon de sia opinio per nepridubeblaj signoj, tiaj signoj, kiuj apartenas al la paĝoj de la vera scienco, do nek ĉi tie, nek en koncertejoj ili povas esti traktataj. Mia kredo estas forta pri tio, ke nek la viena profesoro d-ro Obscen, nek la budapeŝta kulturknabino d-ino Ibolyka ŝanĝos la ordon de la mondo eĉ en ĉi tiu detaleta, ke estas aferoj, kiuj surhavas ĝis eternaj tempoj la devigan stampon de inter-kvar-okuleco. Ne-longe-portempe povas esti modo trakti ĉi tiujn aferojn publike, sed kiam formiĝos la ordo de nova kaj sana socio, kaj la viena profesoro kaj ankaŭ Ibolyka jam delonge dormos en la tombejo, estos jam por ĉiuj tute certa tio, ke la naturo ne sen ĉiu kialo kaj celo aranĝis la aman vivon ĝuste por

du personoj, kaj ne por tri aŭ kvar. Ĝis tiam ne estas terura malfeliĉo, se profesoroj kaj fraŭlinoj amuziĝas ĝissate, nur ili ne volu kredigi al ni tiun unu aferon, ke tio estas scienco. Kaj se tio estas tamen scienco, tiam ili unue ellernu la ceterajn, bazajn sciencojn, alie ili povos trafi en tian embarason kiel la supre menciita negro, kiu transsaltis el sia nudeco rekte sur la pinton de la pariza modo.



Ferenc Monár (1878-1952): hungara verkisto, dramisto, ĵurnalisto, milita korespondanto naskiĝis en germana juda familio. Jam frue kontribuis al pluraj gazetoj, samtempe komencis verki literature. Estis majstro de amuza rakontado, tamen malantaŭ la amuza formo kaŝiĝas serioza socia kritiko, kiun li ofte esprimas per satiraj rimedoj. Liaj verkoj aperis en multaj lingvoj, liaj teatraĵoj estis prezentitaj en multaj landoj, pluraj ankaŭ filmigitaj. *La sekreto de la arbaro Aruvimi* fokusas al dilemoj de honestulo: ĉu elekti luksan

vivon, rezignante honestecon aŭ resti honesta sed malriĉa. La volumo enhavas krome multajn liajn satirojn kaj satirajn artikolojn.

- *Terinjo, malfermu la pordon por la sinjoro, poste tuj vi povos surtabligi la vespermanĝon. Kaj vi infanoj, Geoĉjo, Steĉjo, Aleĉo, Fraĉjo, Luĉjo, Deĉjo, Daĉjo, Niĉjo, Geĉjo, Joĉjo, Elinjo, Anjo, Injo, Enjo, Henjo, Genjo, Manjo, Etenjo kaj Magdanjo sidiĝu bele ĉe la tablo, kaj ne alsturmu, kiel kutime, vian kompatindan Paĉjon, kiam li venos vespere laca el la oficejo!*

[..] *Mi ripetas, li kuleris la supon, post kiam li eksciis, ke Bernardo Braunauer vizitis lian loĝejon, kaj sen ĉia mesaĝo postlasis al li sesdek kronojn en koverto. Sed lian magran, ostecan kapon trakuris ruĝo, kiam li enpoŝigis la koverton, ĉar Ludoviko Honest estis honestulo kaj akiris la fidon de la ŝtatsekretario Tordomens ĝuste per tio, ke neniam ajnulo aljnmaniere povis subaĉeti lin.*

- *Kia mono ĝi estas? - demandis lia edzino.*

- *Malpura - murmuris Ludoviko Honest -, morgaŭ matene mi reportos ĝin al li.*